

V-18679
/ (1937)

1937

JARLIBRO

de la

INTERNACIA

ESPERANTO-LIGO

1887 — 1937

JUBILEO

DE ESPERANTO

JARLIBRO

de la Internacia
Esperanto-Ligo

1937

Prof. MIECZ. SYGNARSKI

Ex Libris

L. 134

La enhavo de ĉi-tiu Jarlibro ne
povas esti represata, ĉu tute, ĉu
parte, sen la permeso de I.E.L.

Copyright by Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

*Prof. Sygnarski
junio 1946.*

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo



PRINTED IN ENGLAND

ENHAVO

	Paĝo
Antaŭparolo. La Prezidanto	4
Enkonduko. La Ĝenerala Sekretario	8
<hr/>	
Adresaro, Rimarkoj pri la	146
Ĉef-Delegitoj	144
Delegitoj kaj Grupoj	148
Delegitoj, Konsiloj al la	140
Domo, La I.E.L.	12
Dumvivaj Membroj	16
Espero, La	28
Fak-Delegitoj, Listo de	255
Gazetaro Esperantista	34
Grava Noto	143
Honoraj Membroj	15
Informpeto, Regularo pri la servo de	147
Internacia Esperanto-Muzeo	97
Komitato kaj Estraro	10
Landaj Asocioj Esperantistaj	30
Landaj Raportoj	101
Lernejo, Esperanto en la	41
Librolisto	81
Lingva Komitato kaj Akademio	18
Mortintoj, 1936, La	24
Pariza Konferenco, La, Pentekosto 1937	44
Perantoj	145
Propagando de Esperanto, La. E. Malmgren	69
Radio, Esperanto kaj	130
Reklamoj kaj Entreprenoj, Listo de	257
Universalaj Kongresoj	47
Varsovio	136
Viena Kongreso	48

ANTAŬPAROLO

Antaŭ naŭ monatoj mi verkis antaŭparolon por la Jarlibro 1936 de Universala Esperanto-Asocio. En tiu momento mi tute ne atendis, ke post tiom mallonga tempo mi verkos antaŭparolon por la unua jarlibro de tute nova organizaĵo. Tia estas la sorto. Sed, ĉar multaj ne ankoraŭ klare komprenis, kial starigo de tiu nova organizaĵo fariĝis necesa, mi devas prezenti klarigon.

Nesufiĉa disvastiĝo de nia movado post preskaŭ 50 jaroj, kaj kritikoj pri administrado de U.E.A., kiu senprofite por la propagando formaniĝis la gravajn donacitajn monrezervojn, incitis la Landajn Asociojn ludi efektivan rolon en nia Centra Asocio. Ŝajnis tute logike ke, same kiel la Esperantistoj grupiĝas en asocioj en ĉiu lando, same tiuj asocioj grupiĝu en internacia Centro. La malnova konflikto pliakriĝis inter tiuj, kiuj volis ke U.E.A. restu nura grupiĝo de izoluloj, kaj tiuj, kiuj insistis, por ke U.E.A. fariĝu ligilo inter la Asocioj, kaj, sekve, impulsa centro de la propagando sur la internacia kampo.

En 1933, post dumjaraj diskutoj, U.E.A., kiu sidis en tre danĝera situacio laŭ financa vidpunkto, fine akceptis kunlaboradon kun la Landaj Asocioj (Interkonsento de Kolonjo), esperante, ke ili dank'al siaj membroj alportos finanĉan helpon. Sed la nova statuto zorge konservis la principon de la unuopa membreco. La Landaj Asocioj aligis siajn "simplajn" membrojn, sed ne estis mem membroj de U.E.A. Ili elektis komitatanojn por tri jaroj, sed la suverena instanco estis ĝenerala voĉdonado de la delegitoj aŭ de la "aktivaj" membroj.

La principa Interkonsento de Kolonjo ĉesigis—provizore—multjaran diskutadon, en kiu bedaŭrinde enmiksiĝis pripersonaj atakoj, kaj en 1934 la nova statuto estis voĉdonita kaj aprobata.

Dum la Stokholm'a kongreso (1934) la gvidantoj de U.E.A. estis ŝanĝitaj. Sed la prifinancaj malfacilaĵoj estis ankoraŭ pli gravaj, ol ni pensis. En la lasta jarlibro mi skribis, ke la proponita programo necesigas tutan aron da rimedoj, kiujn la Estraro, dum sia Paska kunveno, tre zorge pristudis.

En nia programo du punktoj estis speciale gravaj: Antaŭenpuŝi la propagadon, kaj atingi larĝan ekvilibron de nia budĝeto favore al la propagando.

La plej urĝa estis la financa situacio. Unu kaj duonjara sperto post la Stokholm'aj okazintaĵoj estis montrinta ke en Svislando ni povas nur vegeti pro alteco de la kostoj, sed ne povas efektiviĝi nian programon. Tial la komitato voĉdonis translokigon de la Centra Oficejo al Anglujo, kaj akceptis S-ron Goldsmith kiel direktoron. Oni rajtis esperi, ke la membroj akceptos tiun decidon sen protesto. Tamen kelkaj svisaj membroj malakceptis, kaj klopodis malhelpi la translokigon per leĝa proceso, formale postulante voĉdonadon de la delegitoj.

Esperante, ke tio kontentigos ilin, ni tuj aranĝis tiun voĉdonadon de la delegitoj. La balotado estas kontrolita en la Centra Oficejo en Genevo la 4an de Julio, 1936, kaj la rezulto montriĝis jene:

Kovertoj senditaj al la Delegitoj: 1,400.

Revenis 858 kovertoj kun 901 voĉdonoj.

El ili 710 aprobis la translokigon, kaj 191 malaprobis.

Ĉar 80% de la Delegitoj aprobis, ni rajtis esperi, ke la svisaj protestintoj ĉesigos la proceson, kaj ĝis la Viena kongreso (Aŭgusto, 1936) ni tenis tiun esperon. Bedaŭrinde, fine de la kongreso, mi ricevis leteron el Ĝenevo, kiu nuligis tiun esperon. Tiun leteron la ĉestantaj komitatanoj konsideris dum tre longa tempo, kaj jen la protokolo de tiu kunveno:

Protokolo de Kunsido de U.E.A.-Komitato en Vieno la 15an de Aŭgusto, 1936.

Ĉeestis: la Prezidanto (Int. Gen. L. Bastien), P. W. Baas (Nederlando), O. Bujwid (Polujo), I. R. G. Isbrücker (Nederlando), P. Kempeneers (Belujo), E. Malmgren (Svedujo), A. C. Oliver (Britujo), P. Petit (Francujo) kaj J. R. Scherer (Usono).

La ĉestantaj komitatanoj de U.E.A., post lego

(1) de la letero de S-ro Bouvier, de la 30a de Julio, 1936, kiu antaŭvidigas esperon de akordiĝo pri la nuna proceso.

(2) de la letero de S-ro Bouvier, de la 13a de Aŭgusto, 1936, kiu malaperigas tiun esperon kaj montras, ke la protestintoj estas decidintaj konduki la proceson ĝis la fino.

Konsiderante, ke tiu decido de la protestintoj malhelpos la translokigon de la oficejo de U.E.A. al Londono dum pluraj monatoj; ke tio igas neebla la komencon de la laboro por la venonta jaro kaj eĉ ĉiun seriozantan laboron dum pluraj monatoj; ke en la nunaj cirkonstancoj tio signifas la morton de U.E.A.

Komisias sian Prezidanton por fari ĉe S-ro Stettler kaj ĉe la protestintoj lastan klopodon por ke tiuj ĉi rezignu sian agadon, kaj por eviti la baldaŭ timotan katastrofon.

En okazo de malsukceso aŭ de netuja sukceso decidis, ke la Landaj Asocioj, respektive la Komitatanoj, estos petitaj, ke ili tuj eksigu el U.E.A. kaj fondu novan Asocion sidantan en Londono; ne akceptas la eksigon de S-ro Goldsmith kiel Direktoro, kaj decidis, ke li estos proponita kiel Generala Sekretario de la nova Asocio.

Komisias sian Prezidanton kaj sian Direktoron por pristudi post konsiliĝo kun juristoj, la demandojn, kiujn sekvigas tiu rezolucio; provizora statuto, forlaso de la posedajo de U.E.A., ktp.

Pri la nuna proceso:

En la dirita okazo de malsukceso, decidis, ke la proceso, kiu ne plu interesos la novan Asocion, estos forlasita, post konsiliĝo kun juristoj.

Laŭ la deziro esprimita en tiu rezolucio, mi vizitis en Bern S-ron Stettler, kiu ne deziris enmiksiĝi en tiun aferon; poste mi vizitis en Ĝenevo S-ron Bouvier, la unuan reprezentanton de la protestintoj, kaj priparolis kun li la tutan aferon, esperante, ke ni venos al interkonsento por eviti starigon de la proponita nova asocio. Eĉ tiu espero malaperis en la fino de aŭgusto, kiam mi ricevis leteron dirantan, ke oni ĉesigos la proceson nur se ni ree voĉdonigos unue la komitatanojn, kaj poste la delegitojn, kaj ke intertempe la oficejo devas resti en Ĝenevo. Mi faros nur unu rimarkon: respondante tiamaniere, la protestintoj konis la estontajn sekvojn de sia necedemo.

Tiujn postulojn ni ne povis akcepti, ĉar la voĉdonadoj postultaj bezonus multajn monatojn—supozante ke poste oni ne plu proceduros—, kaj ni estus povintaj pagi la kurantajn elspezojn dum tiu tempo nur se ni ĉerpus el la restanta kapitalo, kiun ni estis konservintaj por pagi niajn kreditorojn. Krome, dum tiu periodo ni povus preskaŭ nenion utilan entrepreni pro la necerteco.

La komitatanoj kiuj ĉeestis la kongreson en Vieno, kaj tiuj kun kiuj ni intertempe korespondis, opiniante ke forta internacia organizaĵo, kiu volas kaj povas labori en la intereso de la movado, estas pli grava ol iu nomo, decidis starigi novan organizaĵon kun la nomo "Internacia Esperanto-Ligo." La 18an Septembro, 1936, mi sendis cirkuleron tiucele al la Landaj Organizaĵoj, kaj tiu dato estas do la naskiĝtago de nia nuna internacia organizaĵo.

Resume, la financa situacio estas grava, sed okaza kaŭzo de la konflikto; ĝiaj veraj kaŭzoj estas pli profundaj: la Landaj Asocioj, bone organizitaj en preskaŭ ĉiuj landoj, volas nun plenumi la ĉefan rolon en nia internacia organizaĵo, dum ĝis nun la teoria suvereneco sidis en la manoj de izolaj membroj de U.E.A., malfacile demandebaj, kaj ofte ne tre bone informitaj.

Eĉ en ĝiaj unuaj tagoj nia nova I.E.L. havis bonŝancon, ĉar du bonvolaj geesperantistoj en Londono donacis al ni belan domon en granda ĝardeno por ĝia Centra Oficejo. Mi deziras ĉi tie publike esprimi nian dankon al ili pro tiu helpa gesto. Formala inaŭguro de la domo okazis la 12an de Decembro, 1936.

Nia nova entrepreno ricevis tre bonan akcepton. Jam aliĝis al I.E.L. ĉiuj Landaj Asocioj, kiuj antaŭe estis en U.E.A., kun escepto de la hispanaj asocioj (kiuj ne povas aliĝi pro la milito, sed kunlaboras) kaj la svisa. Jam aliĝis preskaŭ mil delegitoj, kaj novaj aliĝoj alvenas ĉiutage: la venontan jaron ili devos superi du mil. Kontrakto estas farita kun S-ro Teo Jung, nun en Nederlando, laŭ kiu lia semajna gazeto "Heroldo de Esperanto" estas oficiala organo de la Ligo. Li ankaŭ redaktas "Esperanto Internacia," nian monatan organon. Ni jam komencis organizi la internacian propagandon, kaj esperas multon fari tiurilate. En la nuna momento ni pretigas la statuton de I.E.L., kiu baldaŭ estos sendata al la Landaj Asocioj por voĉdonado. Ni klopodas fari ĝin kiel eble plej kontentiga por ĉiuj, por ke estonte ni evitu disputon.

Kaj la estonteco? Mi opinias, ke se ĉiuj bone kunlaboros,—la internacia organizaĵo, la Landaj Asocioj, la Fakaj Asocioj kaj la individuaj Esperantistoj—nia movado baldaŭ estos pli forta ol ĝi iam estis. Nia unua jaro estos la plej malfacila, ĉar en tiu jaro niaj elspezoj estos la plej altaj pro la neceso komenci ĉion. Tiu jaro estas la Jubilea Jaro de Esperanto. Ĉiu klopodu festi tiun jaron per plifortigo de I.E.L., varbu membrojn, mem aliĝu kiel Membro-Subtenanto aŭ eĉ kiel Patrono, kaj propagandu la lingvon. Ni deziras registri 20,000 membrojn dum nia unua jaro, kaj el tiu nombro almenaŭ 5,000 aktivajn membrojn. Kun via helpo ni certe sukcesos.

L. BASTIEN.

ENKONDUKO

Kvankam I.E.L. fondiĝis antaŭ nur proksimume kvin monatoj, jen la jarlibro 1937. Ni kredas, ke la tuta informo en ĝi estas fidinda, sed se iu trovus erarojn ni danke ricevus informon.

Multaj Esperantistoj opinias, ke la kompilado de Jarlibro almenaŭ rilate al la informo pri la urboj, estas simpla afero. Ŝajne oni bezonas nur sendi Respondilojn al la Delegitoj, kaj kunmeti la respondojn. La afero ne estas tiel simpla. Nur proksimume la duono de la Delegitoj resendas tiujn Respondilojn, kaj en tiuj ricevitaj troviĝas multaj strangaĵoj. Ekzemple: el unu urbo ni ricevis respondilojn de kvar delegitoj kun informoj pri la sama grupo—sed eĉ ne du konsentis pri la adreso aŭ la horo de la kunvenoj: multaj delegitoj ŝajne ne scias kiel literumi siajn proprajn nomojn kaj adresojn—ĉar ili skribas ilin malsame sur la Delegita Respondilo kaj la Jarlibra Respondilo: sed eble la plej stranga afero estas ke unu delegito priskribis sin 'sinjoro' sur unu respondilo kaj 'sinjorino' sur alia! Ni faris nian eblon kontroli ĉion, kaj esperas ke la rezulto ne malplaĉos al iu ajn.

Oni rimarkos, ke ni enkondukis kelkajn novajn rubrikojn kaj ni esperas, ke ili trovos ĝeneralan aprobon. Ni deziras, ke la Jarlibro de I.E.L. estu la plej utila libro en la biblioteko de ĉiu Esperantisto kaj volonte ricevos proponojn pri plibonigoj por venontaj jaroj. Bonvolu noti tamen, ke ni deziras presigi en ĝi nur informon pri la esperantista vivo kaj ne tiun informon, kiun oni povas trovi en ordinara enciklopedio. Ĝi estu la ĉiama poŝlibro de la Esperantistaro.

Ni esperas, ke ĉiu membro faros sian eblon plifortigi I.E.L. per la varbado de novaj membroj. Ni deziras vidi tiel grandan nombron da membroj, ke la ekstera mondo rimarku el tiu la gravecon de nia movado. Ĉiu helpu, tiel ke ni atingu nian celon en nia unua jaro—La Jubilea Jaro de Esperanto.

CECIL C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

CENTRA OFICEJO DE I.E.L.

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Telefono: Chorley Wood 138

Ĝenerala Sekretario: Cecil C. Goldsmith.

Oficistoj:

E. W. Amos, F-inoj E. C. Goldsmith, Renée Rivollet.

Banko:

Barclay's Bank Ltd., Rickmansworth.

Oficialaj Organoj:

Semajna: Heroldo de Esperanto.

Monata: Esperanto Internacia.

Redaktoro:

Teo Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

Filia Oficejo—Propaganda fako
Tegelbacken, Stockholm, Svedujo.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Fondita : 18 Septembro 1936.

Prezidanto:

Intendant-Generalo L. Bastien, Paris.

Komitato :

Francisko Azorin Izquierdo, Str. Alvarez de Castro 9, Madrid, Hispanujo.

P. W. Baas, C. Krusemanstr. 43, Amsterdam-Z., Nederlando.

Intendant-Generalo L. Bastien, 116, rue de Vaugirard, Paris VI., Francujo.

P. Blaise, 19 Litchfield Avenue, Morden (Surrey), Anglujo.

Kapitano R. Bugge-Paulsen, Schivesgate 1. IV., Oslo, Norvegujo.

Univ. Prof. D-ro Odo Bujwid, Lubicz 34, Kraków, Polujo.

Univ. Prof. D-ro med., D-ro jur. Giorgio Canuto, Via Pallamaglio 15, Torino, Italujo.

D-ro J. Couteaux, Faubourg St. Jacques 27, Paris XIV., Francujo.

Einar Dahl, Södergatan 26, Uddevalla, Svedujo.

Delfi Dalmau, Valencia 245, Barcelona, Hispanujo.

D-ro Carlos Domingues, Rue Marechal Floriano 212.10, Rio de Janeiro.

René Dubois, 130 Rue Amelot, Paris XI., Francujo.

K. Th. Hansen, Oresunds Apotek, Strandvej, Köbenhavn, Danujo.

P. Hendriks, Vertolkstraat 7, Leeuwarden, Nederlando.

Rektoro Sam Jansson, Bergsvägen 41, Lidingö, Svedujo.

Prof. D-ro St. Kamaryt, Zochova 3, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo.

D-ro Paul Kempeneers, 19, Avenue Montjoie, Uccle 3, Belgujo.

Bernard E. Long, p.a. Brita Esp. Asocio, 142 High Holborn, London, W.C.1., Anglujo.

E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm 1., Svedujo.
Prof. St. Minkov, ul. Sredna Gora 129, Sofia, Bulgarujo.
A. C. Oliver, 28 Clarence Road, London, N.22., Anglujo.
P. Petit, 59 rue de Neuilly, Rosny-sous-Bois (Seine), Francujo.

M. Rollet de l'Isle, 35 rue du Sommerard, Paris V., Francujo.

Joseph R. Scherer, 4474 West Adams Blvd., Los Angeles (California), Usono.

Prof. Ing. C. Scholze, Klotildenstrasse 6. II., Reichenberg-Liberec, Ĉeĥoslovakujo.


Kortega Konsilisto H. Steiner, Neue Burg, Heldenplatz, Wien I., Aŭstrio.

Estraro

Prezidanto : Intendant-Generalo L. Bastien, Paris.

Membroj : Prof. D-ro St. Kamaryt, Bratislava.
E. Malmgren, Stockholm.

Kortega Konsilisto H. Steiner, Wien.



INTERNACIA ESPERANTO-LIGO ————— Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LA I.E.L.—DOMO

La nova domo de I.E.L. situas en la vilaĝeto Heronsgate, proksime al la urbo Rickmansworth, kiu kuŝas en bela kaj monteta kamparo 30 Km. de la mezo de Londono, kaj estas atingebla de tie en proksimume duonhoru per elektra vagonaro. La domo, kiun I.E.L. ricevis donace de du bonkoraj geesperantistoj, staras en granda ĝardeno (10,000 kvadratmetroj), kiu aspektas tre bela dum la somero. La ĝardeno enhavas diversajn fruktoarbojn, precipe pomujojn, kaj la tuta tereno estas iom ĉirkaŭata de alispecaj arboj. La domo mem, kiel montras la apuda fotografaĵo, estas sufiĉe granda. Ĝi estas tute moderne ekipita (ekzemple, kun centra hejtado kaj elektra kuirejo) kaj havas dek grandajn ĉambrojn, du banĉambrojn kaj du aŭtomobilejojn. Ĉar la sekretario kaj lia familio ankaŭ loĝas en la domo, ĝi estas preskaŭ ĉiam vizitebla laŭ antaŭa aranĝo.



Al Esperantistoj speciale

la utileco de "Good Companion" (bona kunulo) portebla skribmaŝino estas tuj videbla. La uzado estas simpla, kaj, se dezirate, ni povas aldoni klavojn por Esperanto. La "Good Companion" kostas nur **£12-12-0**. Monataj partpagoj estas aranĝeblaj.

Imperial

"Good Companion" Skribmaŝino

Skribu por interesaj broŝuroj (anglalingvaj) al:

Imperial Typewriter Co. Ltd.

Ĉefoficejo kaj Fabriko:
LEICESTER, ANGLUJO

Honora Membraro de I.E.L.

Membroj Honoraj estas distingitaj de la Komitato per tiu titolo, pro gravaj servoj faritaj al I.E.L. aŭ al la Esperantomovado. Ili ne pagas kotizon.

- Baghy, S-ro Julio, Budapest (Hungarujo)
- Baudet, S-ro André, Paris (Francujo)
- Blaise, S-ro Paul, Morden (Britujo)
- Bosque, S-ro Antonio Carbonell y, Alcira (Hispanujo)
- Bouvier, S-ro Louis, Poix (Francujo)
- Briggs, S-ro Charles H., Minneapolis (Usono)
- Bujwid, S-ro Prof. Odo, Kraków (Polujo)
- Currie, S-ro Walter B., Burnley (Britujo)
- Deligny, S-ro Ernest, St. Omer (Francujo)
- Gasse, S-ro Emile, Le Havre (Francujo)
- Hetzl, Prof. H. W., Philadelphia (Usono)
- Hirst, S-ro William H., Huddersfield (Britujo)
- Humez, S-ro Alberic, Douai (Francujo)
- Jayet, S-ro Charles, Morges (Svisujo)
- Kalocsay, S-ro D-ro Kolomano de, Budapest (Hungarujo)
- Kudela, S-ro Antonín, Olomouc (Ĉeĥoslovakujo)
- Kunerth, S-ro Stefan, Merano (Italujo)
- La Colla, S-ro Stefano, Roma (Italujo)
- Landenne, S-ro Armand, Huy (Belgujo)
- Magnus-Focké, S-ino M., Orléans (Francujo)
- Martin, S-ro Auguste, Mâcon (Francujo)
- Noll, F-ino Margrethe, København (Danujo)
- Nylén, S-ro Paul, Stockholm (Svedujo)
- Page, S-ro William M., Edinburgh (Britujo)
- Parrish, S-ro Donald E., Los Angeles (Usono)
- Petit, S-ino Marthe, Dijon (Francujo)
- Ploussu, S-ro Augustin, Grenoble (Francujo)
- Rollet de l'Isle, S-ro M., Paris (Francujo)
- Soubranne, S-ro François, Tulle (Francujo)
- Stamatiadis, S-ro D-ro Anakreon, Athenai (Grekujo)
- Steiner, S-ro Hofrat Hugo, Wien (Aŭstrujo)

Dumviva Membraro de I.E.L.

- Aae, S-ro, København (Danujo)
Bartholomew, F-ino E. M., Letchworth (Britujo)
Bartholomew, F-ino F. M., Letchworth (Britujo)
Bastien, S-ro Intendantogeneralo L., Paris (Francujo)
Bayes, S-ro W., Hove (Britujo)
Boyer, S-ro André, Cannes (Francujo)
Buchanan, S-ro George D., Glasgow (Britujo)
Bünemann, S-ino Elisabeth, Hamburg (Germanujo)
Bünemann, S-ro Oscar, Hamburg (Germanujo)
Bušujev, S-ro J. A., Moskvo (Sovet-Unio)
Camuffo, S-ro Prof. Armando, Trieste (Italujo)
Cather, S-ro C. M., Port Said (Egiptujo)
Champy, F-ino Agnès, Antwerpen (Belgujo)
Clough, S-ro John S., Folkestone (Britujo)
van Coeverden, S-ro E. C. C., Diepenveen (Nederlando)
Cottrell, S-ro F. G., Washington (Usono)
Crowley, S-ro D-ro R. H., Tewin (Britujo)
Daglio, S-ro Clemente, Tortona (Italujo)
Dalmau, S-ro J. Delfi, Barcelona (Hispanujo)
Dietl, S-ro D-ro Wilhelm E., Baden bei Wien (Aŭstrujo)
Dinslage, S-ro J. F., London (Britujo)
van Doorne, S-ro C., Hillegersberg (Nederlando)
Dust, S-ro L. E., Wellington (Nov-Zelando)
Dziedzic, S-ro D-ro Ignacy, Toruń (Polujo)
Fairman, S-ro C. A., Epsom (Britujo)
Fasce, S-ro Ettore, Genova (Italujo)
Fréchet, S-ro Maurice, Paris (Francujo)
Gila, S-ro Carlo, Locarno (Svisujo)
Gillett, S-ino M. C., Banbury (Britujo)
Ginsburg, S-ro Jules, Antwerpen (Belgujo)
Goemans, S-ro Henk, Istanbul (Turkujo)
Hammer, S-ro H., Zürich (Svisujo)
Harris, S-ro W. H., Lampeter (Britujo)
Henry, S-ino J. B., Hawthorn (Aŭstralio)
Hetzl, Prof. H. W., Philadelphia (Usono)
Hinde, F-ino M., (Papuo)
Hindmarsh, S-ro Hugh K., Kinangop (Kenja Kolonio)
Hirzel, S-ro Fritz, Schaffhausen (Svisujo)
Holmes, S-ro John T., Torquay (Britujo)
Huttin, S-ro Henry, Bourg en Bresse (Francujo)
Huysman, S-ro J. J. W., Etterbeek (Belgujo)
Johnson, S-ro E. B., Guildford (Britujo)
Juneby, S-ro E., Jönköping (Svedujo)
King, S-ro W. H., Wellington (Nov-Zelando)
Lhermitte, S-ro Jules, Paris (Francujo)
Lukáš, S-ro Miloš, Hradec Královè (Ĉeĥoslovakujo)
McMann, S-ro Fred, Troy (Usono)
Magnus-Focké, S-ino M., Orléans (Francujo)
Marseille, S-ro Charles, Paris (Francujo)
Megahy, S-ro B. P., Preston (Britujo)
Meihuizen, S-ro D-ro P. W., Arnhem (Nederlando)
Moutinho, S-ro Aurelio C. L., Meda (Portugalujo)
Norvega Esperantista-Ligo, Oslo (Norvegujo)
Nowell, S-ro Hugh N., Sandwich (Britujo)
Parrish, S-ro Donald E., Los Angeles (Usono)
Petit, S-ino Marthe, Dijon (Francujo)
Phillips, S-ro E. G., London (Britujo)
Piñó Alegret, S-ro Andrés, Valencia (Hispanujo)
Pointer, S-ino Mary, St. Neots (Britujo)
Popper, S-ro Hugo, Böhmisĉ-Kamnitz (Ĉeĥoslovakujo)
Potts, S-ro B., Wellington (Nov-Zelando)
Raven-Hart, S-ro R., La Ciotat (Francujo)
Rollet de l'Isle, S-ro M., Paris (Francujo)
Roscoe, S-ro Norman K., South Croydon (Britujo)
Sing, S-ino Pauline, Kreuzlingen (Svisujo)
Spindler, S-ro Frédéric, Touques (Francujo)
Stojan, S-ro P., Blausasc-Escarène (Francujo)
Stromboli, S-ro D-ro A., Firenze (Italujo)
Szulz, S-ro S., Bydgoszcz (Polujo)
Taylor, S-ro Charles, Haverford (Usono)
Vaughan, S-ro R. F., Sandakan (Brita Nord-Borneo)
Vörös, S-ro D-ro Cyrill, Sátoraljaujhely (Hungarujo)
Williams, S-ro D-ro Frederick J. (Papuo)

ESPERANTISTA LINGVA KOMITATO KAJ AKADEMIO

Prezidanto :

M. Rollet de l'Isle, Paris.

Membroj de la Lingva Komitato:

- Alberich Jofrè, S., Perez Galdós, 45, Barcelona.
Andrejev, A. P., Spiridonovka N 15, ekspedejo "Esperanto," Moskva, I. U.S.S.R.
Archdeacon, Ernest, surŝipe de "Jafito Esperanto," Quai Carnot, St. Cloud, Seine-et-Oise (Francujo).
Aymonier, Camille, 34 Allées Damour, Bordeaux, Gironde.
Backheuser, D-ro E., Caixa postal 2494, Rio de Janeiro.
Baghy, Julio, Rottenbiller ut. 66, I, 20, Budapeŝt VII.
Bailey, Th. G., Laganville, Nether Street, London, N.3.
Bailey, W., Mara Domo, Glan-y-Mor Road, Penrhyn Bay (Caernarvonshire, Britujo).
Baird, F-ino Jane, 95 Bellevue Road, Edinburgh (Skotl.).
Bastien, Louis, 116 Rue de Vaugirard, Paris VI.
Belmont, Leon, Marszalkowska 97a, Warszawa (Polujo).
Bianchini, P. J., Cimpello de Pordenone (Friuli, Italujo).
Blicher, M., Hollønderdybet 2. 4. København 5 (Danlando).
Blok, H., Amstelaan 55, Amsterdam (Nederlando).
Bobin, M., 80 Rue de la Tour, Paris XVIIe.
Bodo, K., Szabolcska Mihaly ucca 18, fsz. 2, Budapeŝt I.
Bofill, M., Granada, N., Sindicato 188, I ero, Palma de Mallorca.
Boucon, H., 10 Boulevard du Lycée, Annecy, Haute-Savoie.
Bremon y Masgrau, D-ro J., Balmes 102, Barcelona.
Bugge Paulsen, R. E., Schivesgate 4-I, Oslo (Norvegujo).
Bulthuis, H. J. Kamillestraat 37, s'Gravenhage (Nederlando).
Bünemann, Oskar, Isestr. 79, II, Hamburg 37 (Germanujo).
Butler, Montagu C., 36 Penrhyn Road, Kingston-on-Thames (Surrey, Anglujo).
Chavet, Gabriel, Rue Gauthier de Chatillon 6, Lille.

- Cogen, Léon, 52 Drève, Ninove (Belgujo).
Couteaux, D-ro J., Hôpital Cochin, 27 Fbg. St. Jacques, Paris XIV.
Cseh (Ĉe), Andreo, Oostduinlaan 32, s'Gravenhage.
Czubrynski, D-ro A., Sienkewicza 53, m.8, Ostrowiec Kielecki (Polujo).
Dalmau, Delfi, 245 Valencia, Barcelona (Hispanujo).
Deligny, Ernest, 4 Rue Allent, St. Omer (Francujo).
Demidjuk, G., Degtjarnij per. 5, kv. 6, Moskva 6.
Diez, F., Zurbaran, 9, Begona, Bilbao (Hispanujo).
Domingues, D-ro C., Avenida Marechal Floriano 212-I, Rio de Janeiro.
Dreher, L., Starowislna 37, Kraków (Polujo).
Dresen, F-ino Helmi, Postkast 6, Tallinn (Estonio).
Drezen, Ernesto, Skatertni 3, kv. 5, Moskva 69 (U.S.S.R.).
Ellerbeck, D-ro Inĝ. L., Bayerische Str. 31, Berlin, W.1.
Ellersiek, F., Wilmsstr. 5, Berlin, S.W.61.
Esselin, A., 10 Place Vintimille, Paris, IX.
Fischer, Henriko, str. D. Istrate, 10, Bucuresti.
Ghezzeo, D-ro A., Via Montecucco 6, Trieste, (Italujo).
Grau Casas, Jaume, Casanova 155, Barcelona (Hispanujo).
Grenkamp-Kornfeld, S., 117 Bd. Jourdan, Paris XIV.
Harvey, W., 1 Craighill Gardens, Edinburgh (Skotlando).
Heilker, P., Hoofddorp (Nederlando).
Hodakowski, T., gimn. prof., Legjonow 17, Nowy Sacz (Polujo).
Hohlov, N., Marjino 22, Moskva 75 (U.S.S.R.).
Hromada, Rudolf, Socharska 333, Praha VII.
Inglada, V., Prof., Escuela superior de Guerra, Chinchilla, 2, Madrid.
Isbrücker, J. R. G., Oostduinlaan 32, s'Gravenhage (Nederlando).
Jansson, Sam. Sjn, Bergsvägen 41, Lidingö I. (Svedujo).
Jung, Teo, Harstenhoekweg 223, Scheveningen (Nederlando).
Ĵirkov, L., Trubnikovski per. 26, Lĝ. 8, Moskva 69.
Kalocsay, D-ro K., Mária u. 34, III, 4, Budapeŝt VIII.
Kamaryt, Prof. D-ro Stan., Zochova 3, Bratislava (Ĉeĥosl.).
Karolczyk, S., Eska, Marszalkowska 60, Warszawa (Polujo).

Kawasaki, Naokazu, 409 Hamagutityô Sumiosi-ku, Osaka (Japanujo).

Kenn, Won, Prof. D-ro P.O. Box 88, Canton (Ĥinujo).

Kengott, Prof. A., University of Texas, Austin (Texas).

Kostecki, J., Karłowicza 17m., Warszawa (Polujo).

Krestanoff, Ivan, ul. 6 Septemvri 2, Sofia (Bulgarujo).

Kühl, E., Secretario de la Legación Checoslovaca, Santiago de Chile (Ĉilo).

La Colla, Stefano, Via Dandolo 24, Roma.

Laignier, M., 30 Rue Dupont-des-Loges, Nancy (Francujo).

Lajarte, R. de, 4 Villa d'Orléans, Fontenay-sous-Bois, Seine.

Lejzerowicz, J., Skwerowa 20, Łódź (Polujo).

Lippmann, D-ro W., Leibnizstrasse 13, II, Leipzig.

Lundgren, John, Hedemora (Svedlando).

Migliorini, D-ro Bruno, Via Alessandro Poerio 33, Roma 144. Dum la lerneja periodo: ĉe "Université de Fribourg," Fribourg (Svislando).

Miĥalski, Eŭg., Poŝtkesto 720, Esperanto-Komitato, Stalino-Donbas (Ukraino).

Minor, Karl, 62 Cranwich Road, Stamford Hill, London, N.16.

Muĉnik, I., Kfar Jehoŝuo, apud Haifa (Palestino).

Neergaard, Paul, Kastelvej 21, København (Danlando).

Nekrasov, N., ul. Gorjkogo 113, kv. 1, Moskva 47 (U.S.S.R.).

Niŝimura, K., Oomoto, Kameoka, Kioto-hu (Japanujo).

Nylén, P., Gröna Villan, Huddinge, Stockholm.

Okamoto, 29 Yushima, 6, chome Hongooku, Tokio (Japan).

Pitlik, Augustin, D-ro, Kremencova 17, Praha II (Ĉeĥoslovakujo).

Porto Carreiro Neto, D-ro L. da Costa, Rua 24-de-Maio, 424, Rio de Janiero.

Privat, D-ro Edmond, Villa Bellavista, Locarno (Svislando).

Rakuŝa, Prof. R., Ciril-Methodova 18, Maribor (Jugoslavujo).

Reed, S-ino Ivy Kellerman, 1707 Surrey Lane, Washington (Usono).

Rollet de l'Isle, M., 35 Rue du Sommerard, Paris V.

Rotkviĉ, Ivo, Basariĉka st. 12, Zagreb (Jugoslavujo).

Rousseau, C., 2 Rue A. de Vigny, Bécon-les-Bruyères (Seine).

Rublev, S., Kazarmenny per. 7, Odessa.

Saldanha Carreira, J. A. de, Av. Duque de Loulé 50, III, Lisboa.

Scherer, Joseph R., 4474 West Adams Blvd., Los Angeles, Calif. (Usono).

Schmid, Jakob, Müsliweg 2, Elfenau, Bern (Svislando).

Schoor, Jan van, Julius de Geysterstraat, 131-1, Antwerpen.

Setälä, Vilho, Museokatu 40 A, Helsinki (Finlando).

Sevak, G., poŝtkesto, 78, Erivan (Armenujo).

Shafer, Ad., 45 Courthorpe Rd., Hampstead, London, N.W.3.

Spiridoviĉ, E., ul. Libkneĥta 45-12, Ĥarkov (Ukraino).

Stamatiadis, D-ro Anakréon, Rue Rodou 21, Athenai.

Stojan, Petro, Blausasc-Escarène (Alpes-Maritimes, Francujo).

Stroele, Georges, Maujobia 7, Neuchâtel (Svislando).

Szilagy, D-ro F., Csalogany-u., 33, Budapest II.

Šupichova, F-ino J., Mala Štepanka 6, Praha II.

Tellini, D-ro Achile, Piazza Vittorio Emanuele 9a, Udine.

Tschernochvostoff, G., Idrottsgatan 22, A. 10, Helsinki (Finlando).

Uitterdijck, D., "Domo Zamenhof," Hyacinntenlaan 1, Hilversum (Nederlando).

Wadham, F. E., "Holmbury," Woodcote Hurst, Epsom (Surrey, Anglujo).

Waringhien, Prof. G., 47 Rue de Douai, Lille (Francujo).

Wenger, J., Crêt Tacconnet 28, Neuchâtel (Svislando).

Wiesenfeld, E., Śniadeckich 13, Warszawa.

Zamenhof, F-ino Lidja, Krolewska 41, Warszawa.

Zon, Frato Wigbertus van, "Huize Steenwijk," Vught, N. Br. (Nederlando).

Akademio

(Vidu la adresojn en la laŭ-alfabeta listo de la L.K.-anoj)

Prezidanto:

M. Rollet de l'Isle, Paris.

Vic-Prezidanto:

P. Nylén, Stockholm.

Direktoroj:

Sekcio: Komuna Vortaro : W. Bailey, Penrhyn Bay (Brit.).

Gramatiko : D-ro W. Lippmann, Leipzig.

Kontrolo : M. Rollet de l'Isle, Paris.

Tekn. Vortaroj : ———

Sekretario-Kasisto:

R. de Lajarte, Fontenay-sous-Bois (Seine, Franc.).

Membroj:

J. Baghy, Intend.-Generalo L. Bastien, L. Belmont, Pastro
A. Cseh, Prof. V. Inglada, Prof. Ing. I.R.G. Isbrücker,
Prof. D-ro B. Migliorini, V. Setälä, D-ro A. Stamatiadis.

Korespondantoj:

F-ino L. Zamenhof (pola lingvo), E. Drezen (rusa lingvo),
A. Tellini (ladina lingvo), D-ro E. Backheuser (portugala
lingvo).

EDINBURGO

HISTORIA — ROMANTIKA — PENTRINDA



Abundas je lokoj pitoreskaj kaj historie
interesaj. Provizas por la libertempulo
senliman variecon de plezuro.

Oportuna centro por viziti
famajn Skotajn pejzaĝojn

Bonega servado vagonare kaj aŭtomobile
al ĉiu parto: ĉiutagaj ekskursoj dum la
somero al "La Trossachs," "Melrose,"
la "Scott" Kamparo kaj la skotaj lagoj

Vastaj oportunoj por la Golf-ludo, la Teniso
kaj aliaj sportoj

Por plena informo kaj oficiala gvidilo
oni sin turnu al

THE TOWN CLERK,
CITY CHAMBERS, EDINBURGH

NIAJ MORTINTOJ

Dum la jaro 1936 la morto forprenis el niaj vicoj la jenajn samideanojn :

Arabeno, Michele. La 26 an de Januaro, 1936, la morto forrabis el niaj vicoj unu el niaj pioniroj, Michele Arabeno. Esperantisto de 1911 li fervore laboris favore al nia movado. Tradukis novelojn, rakontojn, monologojn. Pro la traduko de *Devo de la Homo* de Mazzini li ricevis la titolon profesoro. Depost la sepa kongreso li ĉestis ĉiujn Universalajn Kongresojn.

Bertram, Steph. D-ro. Berlin N. 58.

Biest, W. Van Der, D-ro. Bruxelles.

Bonnet, Fanny, F-ino. Paris 9.

Breting, Oskar, Palanga (Litovujo).

Bury, Lucy E., S-ino., Liverpool. Malnova esperantistino kaj Komitato de la Grupo Liverpool.

Corret, Pierre, D-ro. La 7an de Aŭgusto, 1936, subite mortis en Parizo multjara fervora franca amiko de nia movado, D-ro Pierre Corret, en la aĝo de nur 55 jaroj. Esperantisto de la frua periodo, li estis ĝenerala sekretario de Societo Franca por la Propagando de Esperanto de 1908 ĝis 1911, kaj membro de la Akademio depost 1920.

Li akiris sian medicinan doktorecon de la fakultato de Parizo en 1908, per la tezo "Utileco kaj ebleco de alpreno de internacia helplingvo por la Medicino," kiun li prezentis kun tre granda sukceso.

Krom tiu tezo aperis el lia plumo : Raporto pri la 2a, 3a, 4a kaj 5a Universalaj Kongresoj de Esperanto (1906-1909), seslingva Internacia Radio-Leksikono (1925) kaj traduko de konata verko de Jules Romain *Knock* (1932), kiu estis prezentata

dum la XXIVa Universal Kongreso en Parizo, en Aŭgusto, 1932.

Senŝancelan fidelecon al nia senreforma lingvo li manifestis ĝis sia morto, per la prilingva organo *Zamenhofa Esperanto*, kiun li lastatempe eldonis.

Ankaŭ en *Internacia Scienca Revuo* li skribis, precipe pri radio, pri kiu li estis tre kompetenta. Li elpensis diversajn interesajn aparatojn. Inter liaj eltrovaĵoj speciale menciinda estas la uzado de doma elektra kurento anstataŭ la maloportunaj akumulatoroj. Li kunlaboris al multaj radiofoniaj organoj, estis prezidanto de Internacia Radio-Asocio (1924) kaj ĉefredaktoro de *Internacia Radio-Revuo* (1926).

Pere de la radio li interesiĝis ankaŭ pri stenografio. Li partoprenis aktive en la starigo de Stenografa Instituto Tutmonda, de kiu li estis konstanta komitatano, kaj en la eldonado de ĝia oficiala organo, la revuo *Fluganta Skribilo*.

Dvorak, František. Trutnov (Ĉeĥoslovakujo).

Goldzier, Julia, S-ino. Bayonne (Usono).

Legrand, Enrique, mortis en Montevideo, la 23-an de Oktobro, 1936. Li estis urugvajna verkisto kaj sciencisto, sufiĉe konata en sia patrolando pro siaj rilatoj en kleraj kaj politikaj rondoj ; aŭtoro de kelkaj laboraĵoj de karaktero astronomia kaj matematika. Kiel esperantisto depost 1919, li estis ankaŭ vaste konata en nia verda mondo pro sia fervoro kaj aktiveco. Li estis prezidanto de Urugvajna Esperanto-Societo dum pluraj periodoj kaj Korespondanto (Patrono) de I.C.K. kaj Konsilanto por Ameriko de 1926 ĝis 1930. Honora membro de Argentina Esperanto-Asocio de 1935. Li ĉestis la radio-amatoran kongreson en Parizo 1925, kie li defendis Esperanton sukcese, instigante ĝian aprobon. Vizitis plurajn universalajn kongresojn, kelkfoje kiel oficiala delegito de Urugvajna Registaro. Kunlaboris ĉe diversaj gazetoj, i.a. *Esperanto* kaj *Sudameriko*. Gvidis

Esperanto-parol- kaj radio-kursojn. Enrique Legrand tradukis el franca lingvo *Amfitrionon* de Molière, triaktan komedion (Esp. Centra Librejo, Paris 1922, 123 p.), kaj el la hispana triaktan dramon *La urbestro de Zalameo* de Calderón (presejo Botella Hnos., Montevideo 1925, 136 p.). Li estis prezidanto de Radio Club Uruguayo, prezidanto de la urugvaja Nacia Partio kaj, lastatempe, vic-prezidanto de la Nacia Sendependa Partio, ktp. Do, multrilate konata viro kaj fervora pioniro de nia afero.

Linares, Paul, Cordoba. Dumviva kaj honora membro de U.E.A.

Löderer, Parkstrasse 31, Mödling bei Wien, malnova esperantisto.

McDonald, M., Bulawayo (Rhodezio), Sudafriko.

Muñoz, Enrique, mortis en Montevideo. Esperantisto de la fino de l'pasinta jarcento s-ro Muñoz estis konsiderata kiel unu el la plej fervoraj kaj malnovaj pioniroj en tiu ĉi parto de la sudamerika kontinento, t.e. en Urugvajo. Je la komenco de la nuna jarcento li starigis en Montevideo librejon *Esperanto*. Laŭ nia scio ĝi estis la unua librejo instalita en Sudameriko por disvendi Esperanto-librojn kaj Esperantaĵojn. Li estis fondinto de la Esperantista Grupo "Montevideo" en 1912. Vizitis kelkajn universalajn kongresojn, i.a. la Vienan (1924), kie li paroladis en la nomo de la urugvaja esperantistaro. Li estis Konsilanto de I.C.K. por Ameriko de la 1-a de Junio, 1930. Honora membro de Argentina Esperanto-Asocio, ktp.

Petiau, Henri. Je la fino de Aprilo mortis la ĝenerala sekretario de Belga Ligo Esperantista, Henri Petiau. Dum multaj jaroj li estis prezidanto de la Konstanta Repraentaro de la naciaj societoj (K.R.). Li delonge laboris por la Esperanto-movado kaj en 1913 estis unu el la organizantoj de la *Esperantista Semajno* en la kadro de

sekretario de la Universala Ekspozicio en Gent. La saman jaron li fariĝis ĝenerala sekretario de Belga Ligo Esperantista kaj okupis tiun ĉi postenon ĝis sia lasta tago.

Pia, Benoit, Autun (Francujo).

Poensgen, Hans. Plantejestro, Solingen. Dumviva membro de U.E.A.

Sigel, Tobias, D-ro. En Usono mortis D-ro Tobias Sigel, dumviva membro de U.E.A. kaj delegito en la urbo Detroit jam dum multaj jaroj. Li forpasis subite sed pace la 23-an de Novembro, 1936. D-ro Sigel atingis 74 jarojn. Li lernis Esperanton en la jaro 1907 kaj ĉeestis la Universalan Kongreson en Washington en 1910. De tiam li estis fervora esperantisto kaj multe helpis nian aferon per verkado kaj mondonacoj. La loka esperantistaro de Detroit perdis sinceran amikon, kaj la Esperanto-movado entute perdis fidindan subtenanton.

Swan, L., F-ino. Thornton Heath (Britujo).

Trobat, Johano. Barcelona, malnova esperantisto.

Wessel, M. J. Soestdijk (Nederlando).

Esperantistaj Landaj Asocioj

*La asocioj indikitaj per * aliĝis al Internacia Esperanto-Ligo.*

- ARGENTINA ESPERANTO-ASOCIO, Misiones 369, Buenos-Aires.
Organo : Argentina Esperantisto.
- *AUSTRIA ESPERANTO-ASOCIO, Neue Burg, Heldenplatz, Wien I.
Organo : Aŭstria Esperantisto.
- *BELGA LIGO ESPERANTISTA, 21 Willemsstraat, Antwerpen.
Organo : Belga Esperantisto.
- *BRAZILA LIGO ESPERANTISTA, Ave. Marechal Floriano 212, Rio de Janeiro.
Organo : Brazila Esperantisto.
- *BRITA ESPERANTISTA ASOCIO, 142 High Holborn, London, W.C.1.
Organo : The British Esperantist.
- BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, Str. Alabin 50, Sofia.
Organo : Bulgara Esperantisto.
- *ESPERANTO-ASOCIO EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO, Uralské nám. 447, Praha-XIX.
Organo : Bulteno de EAĈSR.
- *GERMANA ESPERANTO-LIGO EN ĈEĤOSLOVAKIO, Klotildenstrasse, 6/II, Reichenberg.
Organo : Informilo de GLĈ.
- *CENTRA DANA ESPERANTISTA LIGO, Danmarks-gade 28, Randers.
Organo : Dansk Esp.-Blad.
- ESPERANTO-ASOCIO DE ESTONIO, Postkast 6, Tallinn.
Organo : Informoj de E.A.E.
- ESPERANTO-ASOCIO DE FINNLANDO, S-ro Hugo Salokannel, Uusikaupunki.
- FLANDRA LIGO ESPERANTISTA, Magdalenastraat 29, Kortrijk.
Organo : Flandra Esperantisto.
- *SOCIETO FRANCA POR LA PROPAGANDO DE ESPERANTO, 34 Rue de Chabrol, Paris X.
Organo : Franca Esperantisto.
- HELENA ESPERANTO-ASOCIO, Str. 3 Septembriur 28, Athenai.
Organo : Helena Esperantisto.
- HISPANA ESPERANTO-ASOCIO, Apartado de Correos 1089, Madrid.
Organo : Hispana Esp.-Gazeto.
- *HUNGARA ESPERANTO-FEDERACIO, Damjanich u. 43, Budapest VII.
Organo : Hungara Heroldo.
- *ITALA ESPERANTO-FEDERACIO, Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano.
Organo : L'Esperanto.
- *JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO, Hongoo-Motomaci, Tokio.
Organo : Revuo Orienta.
- JUGOSLAVIA ESPERANTO-LIGO, Primorska 11, Zagreb.
Organo : Bulteno de J.E.L.
- KANADA ESPERANTISTA ASOCIO, G.P.O. Box 272, Toronto.
- KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO, Valencia 245, Barcelona.
Organo : Kataluna Esp.
- LATVA ESPERANTO-SOCIETO, P.K. 844, Riga.
Organo : Ondo de Daugava.
- LITOVA ESPERANTO-ASOCIO, Ukmerges pl. 45 but. 5, Kaunas.
Organo : Litova Stelo.
- *NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO "LA ESTONTO ESTAS NIA," Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O.
Organo : Nederlanda Esperantisto.
- *NORVEGA ESPERANTISTA LIGO, Boks 353, Stabekk.
Organo : Norvega Esperantisto.
- NOVZELANDA ESPERANTO-ASOCIO, Room 47, G.P.O. Building, Wellington.
- *POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARŬ, Lubicz 34, Kraków.
Organo : Pola Esperantisto.
- RUMANA ESPERANTISTA SOCIETO, Str. Sf. Voievozi 7, Bucuresti.

*SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO, Fack 698, Stockholm 1.

Organo : Sveda E.-Gazeto.

SVISA ESPERANTO-SOCIETO, Florastrasse 5, St. Gallen.

Organo : Svisa Espero.

*ESPERANTO-ASOCIO DE NORD-AMERIKO (E.A.N.A.), 1517 "H" St., N.W., Washington, D.C.

Organo : Amerika Esperantisto.

SE VI VOLAS ESTI PLENE INFORMATA

pri la Esperanto-Movado,

legu ĉiusemajne

“HEROLDO DE ESPERANTO”

aŭ ĉiumonate

“ESPERANTO INTERNACIA”

La oficialaj organoj de I.E.L.

Por ĉiuj gazetoj, revuoj, libroj;
por ĉiaj presajoj,



La plej malkara,
La plej akurata,
La plej bona,

LA presejo
estas



Belga
Esperanto-Instituto

Koopera Societo

Willemsstrato 21
ANTVERPENO

Poŝtkonto: 1689.58
Telefono: 732.99

LA ESPERANTA GAZETARO

La abonprezo menciita estas la jara abono, kaj ĝenerale rilatas al eksterlando.

- Amerika Esperantisto** (*Esperanta Asocio de Nord-Ameriko*).—1517 H. Street, Washington, D.C., Usono. Monata. 1 dolaro.
- Arbetar Esperantisten** (*Laborista Esperantisto*).—Barnhusgatan 8, Stockholm. 2.5 Kr.
- Arbeider-Esperantisten** (*Laborista Esperantisto*).—Folkets Hus, Oslo, Norvegujo.
- Argentina Esperantisto** (*Argentina Esperanto-Asocio*).—Misiones 369, Buenos Aires. Monata. 2 sv. fr.
- Aŭroro** (*Societo de Ĉeĥoslovakaj Nevidantaj Esperantistoj*). (*Brjlo*).—Praha-Nusle II., 741, Ĉeĥoslovakujo.
- Aŭstria Esperantisto** (*Austria Esperanto-Asocio*).—Neue Burg, Wien I. Monata. 9 respondkuponoj.
- Belga Esperantisto** (*Reĝa Belga Ligo Esperantista*).—44 Avenue de Bruyn, Wilrijk, Antwerpen. Monata. 30 b. fr.
- Brazila Esperantisto** (*Brazila Ligo Esperantista*).—Rua Marechal Floriano 212, Rio de Janeiro. 4 sv. fr.
- Brita Katoliko** (*Brita Ligo de Katolikaj Esperantistoj*).—7 Markville Gardens, Caterham (Surrey), Anglujo.
- British Esperantist** (*Brita Esperantista Asocio*).—142 High Holborn, London, W.C.1. Monata. 2s. 6p.
- Bulgara Esperantisto** (*Bulgara Esperantista Asocio*).—Str. P.VI. Alabin 50, Sofia. Monata. 1 sv. fr.
- Bulteno de Aŭstria Esperantista Federacio**.—Geistingergasse 1, 6-16, Wien XIX. Monata. 1.50 aŭst. ŝil.
- Bulteno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista**.—Uralské 447, Praha XIX. Dumonata.
- Bulteno de Internacia Scienca Asocio Esperantista**.—56 Rue de la Rochefoucauld, Paris IX. 15 fr. fr.
- Bulteno de Jugoslava Esperanto-Ligo**.—Primorska 11, Zagreb. Monata.
- Bulteno de Marista Ligo Esperantista**.—Villa Skogbacka, Kvicksund, Svedujo.

- Ĉielarka Standardo** (*Eldon-Kooperativo "Spólnota Pracy"*).—Pri la Kooperativa Movado internacia. Marszalkowska 149 m. 9., Warszawa, Polujo.—Monata. 7 sv. fr.
- Ĉinio Hurlas**.—A. Griven, No. 14 Lane, 169 Carter Road, Shanghai, Ĉinujo. Monata. 3 respondkuponoj.
- Dansk Esperanto-Blad** (*Centra Dana Esperantista Ligo*).—Clausensvej 26, Haderslev. Monata. 2.50 Kr.
- Elo Fraternel** (*Vinculo Internacional de Amizade*).—Pacifista, portugale kaj esperante.—Rua Luiz Gama 18, Bahia, Brazilo. Senpaga.
- Esperanta Literaturo** (*Japana Esperantoliteratura Societo*).—Fronto-Ŝa, 1148 Macunoki, Suginamiku, Tokio. 6 numeroj ; 10 respondkuponoj.
- Esperanto** (*Universala Esperanto-Asocio*).—1 Tour de l'Isle, Genève, Svisujo. Dusemajna.
- Esperanto**.—Kokusaigo-Kenju-Ŝo, 784 Setagaya-Nakahara, Tokio, Japanujo.
- Esperanto Internacia** (*Internacia Esperanto-Ligo*).—Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo. Monata. Kun membreco kaj jarlibro : 10 ŝil.
- Esperanto-Uutiset**.—Kluuvikatu 7, Helsinki, Finnlando.
- Esperanto Venkas** (*Esperanto-Grupo de Ujpest*).—Templomutca 4, Ujpest, Hungarujo. 8-10 foje jare. 2.60 pengoj.
- Esperantobladet** (*Norvega Esperantista Ligo*).—Boks 197, Bekkelaget. Monata. 3 Kr.
- Espero Katolika** (*Esperanto-Presejo*).—Helmond, Nederlando. 4 sv. fr.
- Flandra Esperantisto** (*Flandra Ligo Esperantista*).—Magdalenastraat 29, Kortrijk, Belgujo. Monata. 6 Belgoj.
- Flandra Katoliko** (*Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj*).—Turnhoutschebaan 277, Borgerhout-Antwerpen, Belgujo. Monata.
- Fluganta Skribilo** (*Stenografa Instituto Tutmonda*).—9 Blvd. Voltaire, Issy-les-Moulineaux (Seine), Francujo. Dumonata. 7.50 fr. fr.
- Franca Esperantisto** (*Societo Franca por la Propagando de Esperanto*).—34 Rue de Chabrol, Paris X. Monata. 25 fr. fr.

Helena Esperantisto (*Helena Esperanto-Asocio*).—21 Str. Rodou, Athenai 8, Grekujo. Monata. 1 usona dolaro.

Heroldo de Esperanto (*Oficiala semajna organo de Internacia Esperanto-Ligo*).—Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando. 108 belgaj frankoj. Kun membreco de I.E.L. kaj la jarlibro: 19 angl. ŝil.

Hispana Esperanto-Gazeto (*Hispana Esperanto-Asocio*).—Apartado de Correos 1089, Madrid. Monata.

Hungara Heroldo (*Hungara Esperanto-Federacio*).—Prof. J. de Mihalik, Bejczy utca 1, Sashalom, Hungarujo. Kvaronjara. 4 pengoj.

Infanoj sur Tutmondo.—S-ro H. Bourguignon, Besse-sur-Issole (Var), Francujo. Dumonata. 5 respondkuponoj.

Informilo de Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakujo.—Klotildenstr. 6, Reichenberg. Aperas laŭbezone.

Informoj (*Esperanto-Asocio de Estonio*).—Postkast 6, Tallinn. Monata. 2.5 sv. fr.

Interligo de P.T.T. (*I.L.E.P.T.O.*).—324 Rue Lecourbe, Paris XV, Francujo. Monata. 20 fr. fr.

Interna Ideo, La.—189 Vivian Street, Wellington, C.2, Nov-Zelando. Monata. 4 ŝil.

Internacia (*Esperanto Asocio de Rosario & Esp.-Radio-Centro*).—9 de Julio, 3301, Rosario, Argentino. Monata. 1.20 pesoj.

Internacia Medicina Revuo (*Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio*).—19 Avenue Montjoie, Uccle 3, Bruxelles, Belgujo. Monata. 36 belg. fr.

Internacia Pedagogia Revuo (*Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj*).—Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando. 5 sv. fr.

Internacia Radio-Servo.—Helsingborg 3, Svedujo. Monata bulteno.

Internacia S.O.S.-Bulteno (*Radio-Club Espérantiste de France*).—S-ro M. Alglave, Blanc-Misseron (Nord), Francujo. Monata.

Juna Esperantisto.—Lelewela 9.m.2, Kraków, Polujo.

Juna Vivo, La.—West-Graftdijk (N.H.) Nederlando. Monata. 3 anglaj ŝil.

Kataluna Esperantisto (*Kataluna Esperantista Federacio*).—245 València, Barcelona, Hispanujo. Monata. 4 pesetoj.

Katolika Stelo.—Géza utca 4, Budapest V., Hungarujo. 2 pengoj.

Komuniko por la Gazetaro (*Internacia Transport-laborista Federacio*).—Vondelstraat 61, Amsterdam, Nederlando. 2.50 sv. fr.

Kosmo, La (*Japana Esperanto-Asocio*).—2 Kudan 3-ĉome, Koimaĉi-Ku, Tokio. 3 sv. fr.

Kristana Gazeto (*Nederlanda Kristana Esperanta Unio*).—J. C. v. Dillen, Uitgever, Wijke, Nederlando. 2.50 sv. fr.

Laborista Esperantisto (*Federacio de Laboristaj Esperantistoj*).—Postbus 0.50, Amsterdam-O, Nederlando. Monata. 0.75 guld.

L'Esperanto (*Itala Esperanto-Federacio*).—Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano. Monata. 15 liroj.

L'Oazo.—38 Brickfields Road, Kuala Lumpur, Selangor, Malajo.

Ligilo.—Vrchlického 18, Proslejov, Ĉeĥoslovakujo.

Ligilo por Vidantoj (*Blindula Esperanta movado*).—S-ro P. Merrick, Penso, Shepperton, Middlesex, Anglujo. 1 ŝ.

Literatura Mondo.—Soroksári-str. 38-40.v.6, Budapest IX, Hungarujo. Monata.

Litova Stelo (*Litova Esperanto-Asocio*).—B. Giedra, Marijampole, Litovujo. Monata. 3 lidoj.

Lumo Orienta (*Japana Budhana Ligo Esperantista*).—Takakura-kaikan, Rokujo-Takakura, Kioto. 2.5 sv. fr.

Lumuro de Esperanto.—Villa Zamenhof, Sisteron (B.-A.). Francujo.

Militrezistanto (*Internacionalo de Militrezistantoj*).—11 Abbey Road, Enfield (Middlesex), Anglujo. Trimonata. 1ŝ. 2p.

Mondo.—P.O. Box 232, Shanghai, Ĉinujo. Monata. 5 respondkuponoj.

Nederlanda Esperantisto (*Nederlanda Esperanto-Societo: L.E.E.N.*).—Vertolkstraat 7, Leeuwarden, Nederlando. Dusemajna.

- Nederlanda Katoliko.**—134 Pahudstraat, Den Haag, Nederlando. 3 guld.
- Nia Gazeto** (*Monata eldono de "L'Eclairneur de Nice."*).—29 Avenue de la Victoire, Nice, Francujo. 12 fr. fr.
- Nia Organo.**—(Nederlandindia Societo Esperantista).—K. Gorter, Villa Henny, Poerwosari, Soerakarta, Nederlandindio.
- Nordfranca Esperantisto.**—33 Rue Marceau, Rosendaël-z-Dunkerque (Nord), Francujo. 7 fr. fr.
- Nova Sento.**—Gokurakuji-maĉi 32, Fukuoka, Japanujo.
- Ondo de Daŭgava.**—Pasta kaste 844, Riga, Latvujo.
- Orienta Kulturo** (*Societo de Orienta Kulturo*).—Koma-gome-Dozaka 228, Tokio, Japanujo. Kvaronjara. 2 jenoj.
- Paris Esperanto** (*Pariza Grupo*).—130 Rue Amelot-Paris XI. Monata. 15 fr. fr.
- Pola Esperantisto** (*Pollanda Esperanto-Delegitaro*).—ul. Lubicz 34, Kraków, Polujo. Monata. 5 sv. fr.
- Polygot.**—Tutmonda adresaro de korespondantoj kaj kolektantoj. 5 respk. Monata. V. A. Jarolimek, Strašnice 985, Praha XIII, Ĉeĥoslovakujo.
- Praktiko, La** (*Cseh-Instituto*).—Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando. Monata. 2.50 guld.
- Renovigo** (*Esperanta Fako de "Renobasion."*).—Jesus Amaya, Ap. 59, Meksiko. 10 numeroj—9 respondkup.
- Revuo Orienta, La** (*Japana Esperanto-Instituto*).—Hongoo Motomaĉi 1, Tokio, Japanujo. Monata. 5 sv. fr.
- Ruĝa Esperantisto** (*Brita Laborista Esperanto-Asocio*).—35 Lidfield Road, London, N.16. Monata. 1s. 6p.
- Scienca Gazeto.**—1111 Brooke Road, Rockford (Illinois), Usono. Dumonata. \$ 1.
- Scienco** (*Japana Esperantista Sciencista Asocio*).—Zyūso 2-88, Higasiyodogawa, Osaka. Kvaronjara (?).
- Sennacieca Revuo** (*Sennacieca Asocio Tutmonda*).—*Literatura*.—67 Avenue Gambetta, Paris XX, Francujo. Monata. 30 fr. fr.
- Sennaciulo** (*Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda*).—Adreso supre. Monata.
- Skolta Bulteno** (*Skolta Esperantista Ligo*).—54 Constable Road, Ipswich (Suffolk), Anglujo. Kvaronjara. 1 ŝil.

- Socialisto, La** (*Internacio de Socialistaj Esperantistoj*).—F. Chamarre, "Le Gabut," La Rochelle, Francujo. Monata.
- Suda Kruceto.**—J. Elliott, 2 Cambridge Street, Willoughby (N.S.W.), Aŭstralio. Senpaga.
- Suda Stelo.**—Poŝfako 44, Slavonski Brod, Jugoslavujo.
- Sur Posteno** (*Internacio de Proleta Esperantistaro*).—14 Rue Pelloutier, Nimes (Gard), Francujo. Monata.
- Svenska Esperanto Tidningen** (*Sveda Esperanto-Federacio*).—Fack 698, Stockholm I, Svedujo. Monata. 3 kr.
- Svisa Esperanto** (*Svisa Esperanto-Societo*).—St. Gallen, Svisujo. 1 fr.
- Tempo.**—Librejo Kaniya, Teramati Ebisugawa, Kyōto, Japanujo.
- Tutmonda Kolektanto.**—S-ro A. Prazak, Jablonne n. Orl., Ĉeĥoslovakujo. Dumonata. 5 respondkuponoj.
- Uŝe-Eŝo** (*Eŭropanismo*).—Str. Alexandri 7, Timisoara I, Banato, Rumanujo.
- Vegetarano.**—(Internacia Vegetara Ligo Esperantista).—Eld: A. Pražak, Jablonné n. Orl., Ĉeĥoslovakujo. 3 sv. fr. Dumonata.
- Verda Lumo.**—P.O. Box 1332, Shanghai, Ĉinujo.
- Verda Ombro** (*Formosa Esperantista Societo*).—Taihoku, Formoso, Japanujo.
- Verda Revuo** (*Arto, scienco, amuzo*).—Hermannsgasse 31-26, Wien VII, Aŭstrujo. Monata. 6 respondkuponoj.

SUBTENANTE

LA REKLAMANTOJN KAJ ENTREPRENOJN

en ĉi tiu jarlibro

VI SUBTENAS

ANKAŬ I.E.L.

PROGRESADO KAJ LA PASINTECO

EKRIGARDO TRA LA TEMPAGŬJ

Verkita de

GEORGE FREDERICK WATES

Tradukita en Esperanton de

WILLIAM BAILEY

En ĉi tiu volumo la aŭtoro ne multe pritraktas teoriojn de progresado ; li priskribas kelkajn grandajn epokojn en la monda historio kaj lasas ilin fari propran impreson.

RECENZOJ PRI LA ANGLALINGVA ORIGINALO

“Agrabla kaj klera aŭtoro.”—*The Times*.

“La aŭtoro klare esprimas pensojn, kiuj nuntempe okupas la mensojn de multaj homoj, sed kiujn malmultaj povoscias, aŭ eble kuraĝas, esprimi per simplaj vortoj.”—*Truth*.

TOLE BINDITA, 3s. 6d. AFRANKO, 4p.

ELDONITA DE

**The Esperanto Publishing
Company Ltd.**

MENDU ĜE INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ

Esperantistoj en ĉiuj landoj nun laboras pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Tiu laboro estas malhelpata de la manko de preciza informo pri la ĝisnunaj sukcesoj en tiu sfero. Ni deziras kompili informon pri ĉiuj lernejoj en la mondo en kiuj oni instruas la lingvon, kaj ni enmetos demandaron tiucele en la “Respondilo pri la Jarlibro 1938.” Intertempe ni donas ĉi sube liston de lernejoj en Anglujo kie oni instruas Esperanton, por doni ideon pri la informo dezirata.

Tiu listo ankaŭ helpas al tiuj geinstruistoj, kiuj volas aranĝi ekskursojn aŭ korespondadon por siaj gelernantoj.

- (a) Loko kaj tipo de lernejo.
 - (b) Nombro, sekso kaj aĝo.
 - (c) Oficiala (en la temaro), aŭ post lernejaĵ horoj.
 - (d) Adreso por korespondado.
1. (a) Birmingham: Tinker's Farm Senior School.
Duagrada popollernejo.
(b) 140 knabinoj, 11-14.
(c) oficiala.
(d) F-ino N. Sheppard, Tinker's Farm Senior School, Northfield, Birmingham.
 2. (a) Birmingham: Bournville Day Continuation School. Daŭriga taglernejo.
(b) 30 knabinoj, 16-18.
(c) oficiala.
(d) F-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Bournville, Birmingham.
 3. (a) Birmingham: King's Norton Council School.
Popollernejo.
(b) 40 geknaboj, 13.
(c) oficiala.
(d) F-ino Norman, 61 Kingsley Road, King's Norton, Birmingham.
 4. (a) Bishop Auckland: County School for Girls.
Altgrada lernejo.
(b) knabinoj, 11-12.
(c) oficiala.
(d) F-ino A. B. Edwards, 10 Ladysmith Street, Bishop Auckland, Co. Durham.

5. (a) Bishop Auckland: County School for Girls.
Altgrada lernejo.
(b) knabinoj, 17-18.
(c) oficiala.
(d) F-ino Agnes Dixon, Somersby, Cleveland Avenue,
Bishop Auckland, Co. Durham.
6. (a) Bishop Auckland: King James I. Grammar
School. Altgrada lernejo.
(b) 70 knaboj, 11-12.
(c) oficiala.
(d) S-ro R. W. Hamilton, West Lea, Bishop Auckland,
Co. Durham.
7. (a) Blandford, Dorset: Bryanston School. Moderna
Publika Lernejo.
(b) 6 knaboj, 14-18.
(c) post lernejaj horoj.
(d) S-ro F. W. Armitage, "Nia Domo," Deer Park,
Blandford, Dorset.
8. (a) Dagenham, Essex: Lymington Road Senior
Boys' School. Duagrada popollernejo.
(b) 290 knaboj, 11-14.
(c) oficiala.
(d) S-ro H. G. Toms, 31 Campden Crescent,
Dagenham, Essex.
9. (a) Eastbourne: Cavendish Senior School.
Duagrada popollernejo.
(b) 40 geknaboj, 11-14.
(c) post lernejaj horoj.
(d) S-ro W. S. Wigham, Cavendish Senior School,
Eastbourne.
10. (a) Edgware, Middlesex: Orange Hill Central
School. Altgrada popollernejo.
(b) 40 knaboj, 11-12 ; 14 knaboj, 15.
(c) oficiala.
(d) S-ro Parker, 8 Watersfield Way, Canons Park,
Edgware, Middlesex.
11. (a) Leeds: Bentley Lane Girls' School, Meanwood.
Popollernejo.
(b) 150 knabinoj, 11-14.
(c) oficiala.
(d) F-ino D. Wilkinson, "Briardene," Grosvenor
Gardens, Huby, Nr. Leeds.
12. (a) Romford, Essex: Bush Elms Senior School.
Duagrada popollernejo.
(b) geknaboj, 11-14 ; tri klasoj.
(c) oficiala.
(d) S-ro L. T. Impey, 137 Hillcrest Road, Romford,
Essex.
13. (a) Sheffield: Firth Park Secondary School. Alt-
grada lernejo.
(b) 38 knaboj, 14-16.
(c) post lernejaj horoj.
(d) S-ro A. Wetherill, Firth Park Secondary School,
Sheffield, 5.
14. (a) Ware, Herts.: Central School. Altgrada popol-
lernejo.
(b) 70 geknaboj, 11-12.
(c) oficiala, kaj post lernejaj horoj.
(d) F-ino Walters, 18 Star Street, Ware, Herts.
15. (a) Worcester: St. Paul's Boys' School. Popol-
lernejo.
(b) 30 knaboj, 12-14.
(c) oficiala.
(d) S-ro W. Severn, 40 Bromyard Road, Worcester.

ESPERANTO EN LA MODERNA VIVO

Pentekosta Konferenco en Parizo

14—17 Majo, 1937.

Same kiel la Ekspozicio celas montri la rilatojn de la artoj kaj teknikoj kun la moderna vivo, same la organizantoj de la Konferenco de Parizo dum proksima Pentekosto celos montri al la tutmonda ĉeestantaro kaj al la franca publiko, kian grandan lokon jam havas Esperanto en la Moderna Vivo.

Dum la dekkvin lastaj jaroj, pluraj Internaciaj Konferencoj okazis pri enkonduko de Esperanto en la Lernejojn (Genevo 1921, Vieno 1934), en la Komercon (Venecio 1923, Parizo 1925), en la Sciencan (Parizo 1925), en la Reklamon (Frankfurt 1930), en la Praktikon (Vieno 1934).

La Konferenco "Esperanto en la Moderna Vivo" montros per siaj kvar Komisionoj, ke Esperanto ne plu estas utopio, sed ke ĝi jam funkcias kiel praktika ilo por ĉiuj specaj internaciaj rilatoj, ke la problemoj de lingvo internacia ne plu ekzistas, ke ne plu estas eble konsideri konkurantojn de Esperanto, unuvorte, ke Esperanto estas de nun la sola internacia vivanta lingvo, apud la vivantaj lingvoj de la diversaj popoloj.

FAKOJ DE LA KONFERENCO

1. **Esperanto en la Lernejoj.**—Prezidanto: S-ro Pariselle, rektoro en Besançon.

2. **Internacia Trafiko.**—Prezidanto: S-ro Dautry, Ĝenerala Direktoro de la Ŝtataj Francaj Fervojoj. Vicprezidantoj: S-roj Mouton, ŝtatkonsilisto, kaj Henri Farman.

3. **Sciencoj kaj Teknikoj.**—Prezidanto: S-ro Cotton, membro de la Franca Akademio pri Sciencoj.

4. **Intelektaj Interŝanĝoj.**—Prezidanto: S-ro H. Bonnet, Direktoro de la Internacia Instituto pri Intelektala Kooperado de la Ligo de Nacioj.

Ĉiuj niaj komisionoj deziras ricevi vian kunlaboradon. Nepre skribu tuj al ili, informu ilin pri la rezultoj atingitaj en via lando, en tia aŭ alia fako; faru al ili konkretajn proponojn. Ĉiuj estos ekzamenataj de kompetentuloj.

Kaj partoprenu la Konferencan.

ORGANIZA KOMITATO

Prezidanto: S-ro André Baudet, Prezidanto de la Komerca Ĉambro de Parizo, Administranto de la Fervoja Kompanio P.L.M. kaj estro de la plej grandaj magazenoj en Parizo: "Au Bon Marché."

Vicprezidantoj: S-ro Ernest Archdeacon, pioniro en multaj fakoj, kaj Prezidanto de la Franca Societo por la Disvastigo de Esperanto (S.F.P.E.); S-ro Louis Bastien, Prezidanto de Internacia Esperanto-Ligo; kaj S-ro Jean Couteaux, ĝenerala sekretario de S.F.P.E.

Ĝenerala Sekretario: S-ro P. Petit, konstanta sekretario de S.F.P.E.

Ĝenerala Kasisto: S-ro C. Rousseau, Franca Ĉefdelegito de I.E.L., organizinto de la Scienca Konferenco de 1925.

LA PLEZUROJ DE LA KONFERENCO

Kvankam la daŭrtempo de la Konferenco estas mallonga, ni preparas por vi multajn plezurojn. Pri via plezuro, pri via komforto, speciale de nun zorgas speciala Komisiono de la Konferenco.

En plej bela Palaco de la Ekspozicio okazos la Konferenco. Ni ankaŭ disponos plurajn salonojn por la Komisionoj.

Imponaj estos la solenaj malferma kaj ferma kunsidoj. Alloga arta programo akompanos ilin.

Por viziti la Ekspozicion, multaj gegvidistoj, bone scipovantaj Esperanton, estos je via dispono.

La oficiala festeno okazos en plej bela pariza kadro.

Ni ankaŭ prezentos al vi belegan teatran vesperon kun profesiaj artistoj kaj kun Esperantista jubilea revuo, laŭ la maniero de la kabaredoj de Montmartre.

Kiu povis verki tiun revuon? La plej bona humoristo de la Esperantista literaturo, la fama poeto kaj verkisto Raymond Schwartz.

MALALTA KOTIZO

La kotizo por la Konferenco, estas 100 fr. fr.

La samfamilianoj pagos 75 fr. fr.

Kontraŭ tiu malalta kotizo, ni donos al vi: konferencan insignon; abonon dum 6 monatoj de la oficiala gazeto de la Konferenco; ĉiujn dokumentojn de la Konferenco; rabatojn de 40% sur la francaj fervojoj; senpagan enirrajton en la Ekspozicion dum 6 tagoj; senpagan partoprenon al ĉiuj solenaĵoj kaj al la teatra vespero; senpagan karton por la granda oficiala festeno de la Konferenco.

TURISMA SERVO

La Konferenco organizas turisman servon, kiu konsistas el:

Vizito de Parizo per aŭtoĉaroj.

Vizito de la Ekspozicio.

Tranoktoj de la 14a vespere ĝis la 17a matene.

Vizito de Montmartre nokte kun eniro en almenaŭ unu noktamuzejo.

Prezaro: Bonaj hoteloj 150 francaj frankoj.

Tre bonaj hoteloj 180 francaj frankoj.

Bonegaj hoteloj 205 francaj frankoj.

Adreso por korespondaĵoj: 34 Rue de Chabrol, Paris 10e.

P. PETIT,

Ĝenerala Sekretario de la Konferenco.

SE VI HAVAS IUN FAKAN SPERTECON
kiu ebligas, ke vi fariĝu FAKDELEGITO, bonvole
proponu vin por tia ofico al via landa Ĉefdelegito,
aŭ se tiu ne ekzistas, rekte al la Centra Oficejo
de I.E.L.

La Universalaj Kongresoj

1. 1905. Boulogne-sur-Mer, Francujo. 688 anoj.
2. 1906. Genève, Svisujo. 1,200 anoj.
3. 1907. Cambridge, Anglujo. 1,317 anoj.
4. 1908. Dresden, Germanujo. 1,500 anoj.
5. 1909. Barcelona, Hispanujo. 1,300 anoj.
6. 1910. Washington, Usono. 357 anoj.
7. 1911. Antwerpen, Belgujo. 1,800 anoj.
8. 1912. Kraków, Polujo. 1,000 anoj.
9. 1913. Bern, Svisujo. 1,203 anoj.
10. 1914. Paris, Francujo. Ne okazis pro la milit-deklaro. Aliĝis 3,739 anoj.
11. 1915. San Francisco, Usono. 163 anoj.
12. 1920. Den Haag, Nederlando. 408 anoj.
13. 1921. Praha, Ĉeĥoslovakujo. 2,561 anoj.
14. 1922. Helsinki, Finnlando. 850 anoj.
15. 1923. Nürnberg, Germanujo. 4,963 anoj.
16. 1924. Wien, Aŭstrujo. 3,400 anoj.
17. 1925. Genève, Svisujo. 953 anoj.
18. 1926. Edinburgh, Skotlando. 960 anoj.
19. 1927. Danzig. 905 anoj.
20. 1928. Antwerpen, Belgujo. 1,494 anoj.
21. 1929. Budapest, Hungarujo. 1,200 anoj.
22. 1930. Oxford, Anglujo. 1,211 anoj.
23. 1931. Kraków, Polujo. 900 anoj.
24. 1932. Paris, Francujo. 1,650 anoj.
25. 1933. Köln, Germanujo. 950 anoj.
26. 1934. Stockholm, Svedujo. 2,042 anoj.
27. 1935. Roma, Italujo. 1,442 anoj.
28. 1936. Wien, Aŭstrujo. 854 anoj.
29. 1937. Warszawa, Polujo.

LA 28a KONGRESO EN VIENO

Partoprenis la kongreson proksimume 1,100 gesamideanoj. Kvankam estis kelkaj malglataĵoj, ĝenerale la organizo estis kontentiga. La kongreso certe havis la apogon de la registaro, kiel oni povas vidi de la nomoj en la Honora Kongresa Komitato.

Protektoro: Federacia Prezidanto de Aŭstrujo S-ro Wilhelm Miklas.

Prezidanto: Federacia Kanceliero de Aŭstrujo, D-ro Kurt von Schuschnigg.

Membroj:

Vickanceliero: Eduard von Baar-Baarenfels.

Ministro por Financoj: D-ro Ludwig Draxler.

Ministro por Komerco kaj Trafiko: Fritz Stockinger.

Ministro por Instruado: D-ro Hans Pernter.

Ministro por Justeco: Hans von Hammerstein-Equord.

Ministro por Socia Prizorgo: D-ro Josef Resch.

Ministro por Terkulturo kaj Forst-eksploato: Peter Mandorfer.

Ministro D-ro h.c. Glaise-Horstenau.

Ŝtat-sekretario por Land-defendo: Generalo de Infanterio Wilhelm Zehner.

Ŝtat-sekretario por Eksteraj Aferoj: D-ro Guido Schmidt.

Urbestro de Vien: Eks-vickanceliero Richard Schmitz.

Landestro de Karintio: Marŝalleŭtenanto barono Hülgerth.

Landestro de Malsupra Aŭstrio: Eksministro Josef Reither.

Landestro de Supra Aŭstrio: D-ro Heinrich Gleissner.

Landestro de Stirio: D-ro Karl Maria Stepan.

Landestro de Tirolo: D-ro Josef von Schumacher.

Prezidanto de Federacia Kultur-Konsilantaro: Univ.-Prof. Doktoro J. Bick.

Prezidanto de Federacia Ekonomi-Konsilantaro: Eichinger.

Rektoro de Universitato Wien: Univ.-Prof. D-ro Oswald Menghin.

Rektoro de Teknika Altlernejo Wien: Univ.-Prof. inĝ. Franz List.

Rektoro de Altlernejo por Mondkomerco: Prof. Franz Dörfel.

Rektoro de Akademio por Belaj Artoj: Prof. D-ro inĝ. Clemens Holzmeister.

Rektoro de Veterinara Altlernejo: Prof. D-ro Franz Zaribnicky.

Princino Fanny Starhemberg, delegitino ĉe Ligo de Nacioj.

Gubernatoro de Poŝt-ŝparkaso: Ekskanceliero D-ro Karl Buresch.

Prezidanto de Donaŭ-Dampfschiffahrts-Gesellschaft: Eksvickanceliero Emil Fey.

La Loka Kongresa Komitato konsistis el: Kortega Konsilisto Hugo Steiner, Prezidanto; Sekcia Ĉefo D-ro Franz Uebelhör, Vicprezidanto; D-ro Alfred Engländer; Nikolaus Hovorka; D-ro Emil Pfeffer; Ernst Werner; D-ro Franz Zehden, Gazetarreferanto en la Ministerio por Komerco kaj Trafiko.

Somera Universitato: Prezidis Univ.-Prof. D-ro Odo Bujwid el Krakovo.

La alveno en Vieno.

Dum sabato, la 8-an de aŭgusto, la kongresanoj alvenis de ĉiuj flankoj, parte kun la turisma aranĝo *Tra Aŭstrio*, parte en karavanoj, parte private. Sur la kajo de la stacidomo atendis nin verda flago; policistoj kun metalaj tabuloj kun la surskribo ESPERANTO helpis nin trovi la vojon. La kongresanojn ni jam ricevis en la stacidomo kaj vere tiu servo tre bone funkciis. La samideanoj, kiuj jam ricevis sian kuponaron tuj povis ekserĉi siajn hotelojn. Posttagmeze la samideanoj svarmis kiel abeloj en la halo de Neue Burg, nia pompa kongresejo en la mezo de la urbo. Kongreseja poŝtoficejo, kiu disponis pri propra granda stampo kun surskribo 28-a Universala Esperanto Kongreso jam laboregis. La eldonejo de la teatraj biletoj estis ĉirkaŭata de rondo de kongresanoj kaj la pordo de la kongresoficejo estis tute barita de homamaso.

La kongresanojn ni ricevis en papersaketo, kiu tute elŝvelis pro la multa enhavaĵo. Ĝi enhavis multajn belajn prospektojn, precipe pri Aŭstrio, dikan kongreslibron kaj la insignon. La insigno konsistas el bronco kaj portas la saman engravaĵon, kiun ni jam konas el la kongresa klišo.

Ĝi estas tre plaĉa. La kongreslibro estas tre bela, la sola riproĉo farebla estas ke ĝi estas tro grandformata. Oni nepre devas povi porti la kongreslibron en la poŝo ; sed ĉiuj poŝoj estas tro malgrandaj por ĝi kaj por faldado ĝi estas tro dika. Ĝi estas tre bele presita kaj enhavas multajn bildojn de LKK kaj Honora Komitato. Krom la programo kaj la adresaro de la kongresanoj ĝi enhavas praktikan Esperanto-german-lingvan vortareton kaj la resumon de la Blanka Ĉevalo kun kelkaj el ĝiaj kantoj. La kongresgazeto estas la konata aŭstra ĵurnalo Reichspost, kiu ĉiutage enhavas tutan aŭ duonan paĝon en Esperanto. Estas bone kunigi la kongresgazeton kun nacilingva ĵurnalo, sed oni ne forgesu disponigi al la Esperanto-paĝo sufiĉe da rapidaj ĵurnalistoj.

La solena malfermo.

Sabate post la oka okazis la malferma kunsido de la kongreso. Estis disponigita al ĝi la granda festsalonego en Neue Burg, kiu estis ornamita de la aŭstria koloroj ruĝe-blanke-ruĝe kaj kiun superstaris grandega verda stelo. La kunsido komenciĝis per la aŭstria nacia himno. S-ro Steiner petis la reprezentanton de la registaro, vickancelieron Baar-Baarenfels, malfermi la kongreson. En germanlingva parolado, poste tradukita, la vickanceliero esprimis sian simpatian al Esperanto, diris, ke la aŭstria registaro ĉiam subtenas Esperanton kaj malfermis la kongreson. Post kelkaj aliaj formalaj alparoloj kongresa prezidanto Steiner parolis, salutis en la nomo de la federacia prezidanto Miklas kaj federacia kanceliero Schuschnigg kaj aparte esprimis sian dankon al ministro Stockinger, kiu ĉeestis la kunsidon. Estis Stockinger, kiu estigis la eldonon de 50 oficialaj bildpoŝtkartoj kun Esperantlingva teksto kaj kiu la unuan fojon enkondukis Esperanton en la horaron de la aŭstraj fervojoj.

Granda momento estis, kiam profesoro Bujwid kun la nepo de Zamenhof portis en la salonego la unuan Esperantan flagon de la kongreso en Boulogne-sur-Mer. Mistera sento eliris de tiu malnova relikvaĵo de la movado kaj traflugis la salonon. Entuziasmo prenis la homojn, ili ekstaris kaj kantis la himnon. Sekvis alparolo de la prezidanto de U.E.A. generalo Bastien. Jen la teksto de la parolado :

“ Karaj gesamideanoj,

Mi ne scias, ĉu iam, escepte dum la mallumaj horoj de la terura tutmonda milito, esperantista kongreso kunvenis en ŝajne tiel malfavora epoko.

Ni, esperantistoj, ne estas solaj sur la tero ; ni vivas meze de mondo, kiun ni devas konkerti, kaj kies evoluo grave influas al nia movado.

Ĉirkaŭ ni, kion ni vidas ? Oni devus returniĝi multajn jarojn malantaŭen por vidi la civilizitan mondon vivanta tempon tiel konfuzan, tiel senordan, kiel la nia. Popoloj agitiĝas, popoloj direktiĝas al celoj, kiujn ili mem ne konas, kvazaŭ puŝataj de iuj fortoj nevideblaj kaj ne alrezisteblaj. Post la katastrofa milito, dum kiu ĉiuj risortoj de la nacioj estis streĉitaj supermezure—por detruaj celoj, ho ve !—preskaŭ ĉiuj popoloj vivas en malekvilibra stato.

Ekonomia malekvilibro, kiu naskis tiun tutmondan krizon, en kiu pluraj nacioj ankoraŭ nun baraktas.

Politika malekvilibro, pro kiu ĉiu popolo serĉas novan vojon ; sed tiuj vojoj danĝere malproksimiĝas unu de la alia. Precipe la malekvilibro, ĉefa kaŭzo de ĉiuj aliaj, malekvilibro de la spirito kaj de la koroj.

Tiu stato okazigis al nia movado diversajn sekvojn, kreante multajn barilojn.

La ekonomia krizo deprenis el la rangoj de niaj kurbatalantoj fervorajn esperantistojn, kiuj baraktis en ĉiutagaj malfacilaĵoj. Ankaŭ al nia internacia organizo ĝi alportis gravajn malhelpojn, sed ne tie ĉi estas taŭga loko por ilin preparoli.

Politikaj cirkonstancoj deprenis de ni—por nelonga tempo, ni esperu—bonegajn samideanojn, al kiuj ni konservas ilian lokon en nia hejmo, ĉar ni scias, ke ideoj de homoj forpasas, sed nia idealo daŭradas.

Tamen, ĉu ne en tiu ĉi konfuzplena tempo nia movado sin altrudas plej forte ?

Kion anoncas tiu konfuzeco ?

Ĉu teruran lavangon kiu mortfaligus nian civilizacion ? Nia spirito rifuzas antaŭvidi eblecon de tia katastrofego ! Ĉu, kontraŭe, ĝi antaŭsignas aŭroron de nova mondo ? La mondo ŝanceliĝinta sub la terura bato kiu funebre frapis ĝin antaŭ dudek jaroj, la mondo serĉas ĉiufanke novan ekvilibron. Sed la intereso, moralaj kaj materialaj de la diversaj popoloj estas nun tiel interplektitaj ke, malgraŭ klopodoj de ekscesa apartiĝemo, la vivo de ĉiu el ili dependas de la aliaj, kaj ke la tutan problemon regas la internaciaj rilatoj. Nur per harmonia koncepto de la rilatoj inter la popoloj la mondo retrovos ekvilibron.

La popoloj ! Ilin finfine la afero koncernas, ilia vivo laŭ plej favoraj kondiĉoj materialaj kaj moralaj estas la vera, la sola problemo ; ili suferas kiam gvidantoj eraras. En tiu elburĝoniĝo de nova mondo, ili mem devas interrilatiĝi kaj interkompreniĝi, ili mem devas krei *tiun tutmondan publikan opinionon*, kiu sin trudos al ĉiu, same kiel, en ĉiu libera lando, la publika opinio sin trudos al la gvidantoj. Kiam ekzistos tiu tutmonda opinio, tiam perarmilaj konfliktoj inter civilizitaj popoloj fariĝos preskaŭ neblaj.

Por ke tiu revo efektiviĝu, estas necese, ke la popoloj ne plu vivu aparte, ke ili kunmiksi siajn pensojn, siajn esperojn.

Neniam do nia tasko aspektis pli ĝustatempa, ol nun. Ju pli malfacila ĝi ŝajnas, des pli necesa ĝi estas. Sed ĉu ĝi estas vere tiel malfacila, kiel ĝi ŝajnas ? Ĝuste al tiuj homoj, kiuj sentas la nefirmecon, la danĝeron de la nunaj ekcitiĝoj ni montras la sekuran vojon. Ho ! mi scias, ke interkompreniĝo ne signifas tujan nepran fratecon, sed ĝi estas la sola vojo, kio povas konduki al vera paco, ne al paco fondita sur kontraktoj kun kaŝitaj pensoj, sed al paco de la spiritoj kaj de la koroj, fondita sur reciproka kono kaj estimo, la sola paco sincera, efektiva, daŭra, la paco al kiu aspiras ĉiuj bonvolaj homoj, kiuj estas grandega plimulto.

Multaj personoj, kvankam ŝatantaj niajn klopodojn, pensas, ke tiu idealo ne estas efektivebla ; tial ili ne interesiĝas al nia movado. Ni lasu ilin pensi, kion ili volas. Sed nia lingvo, tiu ilo, kiun ni disponigas, povas alporti al ili tujan utilecon. Pli kaj pli multaj fariĝas la internaciaj rilatoj sur specialaj kampoj : scienca, komerca, profesia, turisma, sporta, junulara, kaj multaj aliaj. Ni ne flankenlasu tiujn potencajn rimedojn por prezenti nian lingvon. Multobligante la rilatojn inter tiuj homoj de diversaj nacioj, prezentante ilon por interkompreniĝi, ni ne forlasas nian idealon. Ni kredu al la interna potenco de Esperanto. Faciligu praktikajn, pure praktikajn rilatojn per nia lingvo, estas plej efika laboro por la interna ideo. Kiel diris D-ro Zamenhof en sia parolado ĉe la malfermo de nia tria Kongreso en Cambridge :

‘ Ĉiam pli kaj pli, komencante de aferoj bagatelaj kaj transirante al aferoj plej gravaj, komencante de aferoj pure materialaj kaj transirante al ĉiuj flankoj de la homa spirito, oni proponados al ni diversajn rimedojn, kiuj

servas al la fratigado de la homoj kaj al la rompadado de la muroj inter la gentoj,—kaj ĉion tion ni povas prijuĝi, akcepti aŭ ne akcepti, sed ni neniam devos ĝin blinde forĵeti antaŭe. Ĉar ĉio, kio servas al la fratigado de la gentoj kaj al la rompadado de la malamikaj muroj inter la popoloj—se ĝi nur ne enmiksas sin en la internan vivon de la gentoj—apartenas al la verda standardo.’

Jes, granda, grandega estas nia tasko, en tiu ĉi momento. Idealaj argumentoj atingas nur parton, ne la pli grandan parton de la publiko, kaj la tutan publikon ni devas atingi. Nur per aplikaj rezultatoj ni atingos ĝin. Ne forgesante noblajn pensojn, ni senĉese laboru sur la praktikaj kampoj, kiuj en la nuna tempo prezentas promesriĉajn eblojn. Ni havas por tio ligiton inter la Landaj Asocioj, kaj tiu organizo estas nia Centra Organizo : ni uzu ĝin. Ĝi jam komencis, ĝi daŭrigos tiun rolon, kunordigante klopodojn de la partoprenantaj societoj.

Ni do senĉese laboru : ni ignoru la senkuraĝiĝon ; ni estu optimistoj. Kelkaj filozofoj diras : optimismo estas difekto ; bone ! sed al tiu difekto ni devas resti fidelaj. Pesimismo ne haltigas pensadon, sed ĝi haltigas agadon ; ofte ĝi estas nur la klarvideco de senkuraĝuloj.

La bariloj ne haltigu nin. Ni ne forgesu, ke nia agado estas necesa al la mondo. Kun forta koro ni kuraĝu, kaj ĉiam antaŭen ! Pli vigla ol iam ajn, Esperantismo daŭras, kaj ĝi daŭrados ĝis la fina venko ! ”

Poste sekvis la tradiciaj alparoloj de la reprezentantoj de registaroj kaj de naciaj Esperanto-organizoj. Estas ĉiujare la sama afero. La lastan paroladon faris Leo Belmont. Ĝi estis tre malbone komprenebla kaj tre longa. Bedaŭrinde la akustiko de la salonego estis tre malbona kaj ĉar krome multaj parolantoj parolis tro mallaŭte oni multon ne komprenis. Oni nepre estus devinta havi laŭtarolilan instalon. Tamen la solena malfermo estis imprese aranĝita, nur mankis iu vere entuziasma parolado. Bedaŭrinde ni nuntempe ne havas veran kongresparoladiston inter ni. La malferma kunsido estis engravita en grafomfondiskojn, kiujn sekvantage la aŭstria radio parte disaŭdigiis.

Post la kunsido ni estis invitataj eliri el la kongresejo por admiri la iluminacion de la urboldomo, kiu okazis je la honoro de la kongreso. Estis fabela aspekto vidi la belajn gotikajn formojn de tiu inda konstruaĵo en fea lumigo. Tuj sekvis en la salonoj de Neue Burg

La interkonatiga vespero.

Estis agrabla aranĝo. Oni havis bufedon, tiel ke oni neniel estis malhelpata libere promeni tra la salonoj por malkovri malnovajn konatulojn kaj prezentiĝi al nekonatuloj. Regis vera Esperantuja atmosfero. Oni nur aŭdis nian lingvon kaj por multaj estis eble la unua fojo, ke ili aŭdis Esperanton de la lipoj de malsamnaciano. Vigle la grupoj interŝanĝis, babilis kaj amuziĝis ĝis meznokto.

Diservoj.

Dimanĉe frumatene estis okazigataj Esperantaj diservoj. Protestantan diservon celebris pastro M.A. van Pernis el Nederlando je la oka matene. Samtempe okazis laŭ la programo israelida diservo. Je la naŭa okazis katolika diservo, kiu fariĝis tre solena. La sanktan meson celebris nia samideano, lia eminentco kardinalo D-ro Innitzer, ĉefepiskopo de Vieno, kiu aparte por tio interrompis sian libertempon. La predikon faris en Esperanto pastro P. M. Caroli el Italujo. Ĉeestis la solenajon, kiu okazis en la impona Votivkirche, diversaj altaj eminentuloj. Post la diservo oni foriris al la tombo de la nekonata soldato, tute proksima al la kongresejo. Antaŭiris la karavanon la polica muzikistaro, kiu jam dum la solena malfermo kaj dum la diservo estis ludinta. Sur la tombon de la nekonata soldato prezidantoj Bastien kaj Steiner metis nome de la kongreso florkronon kaj Generalo Bastien eldiris jenajn parolojn: "Al la soldatoj de tiu ĉi lando kiuj mortis por sia patrujo ni alportas ateston pri nia memoro. Vi estas nun en lando, kie vi estas unuigitaj kun la soldatoj de la aliaj landoj, amikoj aŭ ne. Ni, Esperantistoj, faros ĉion eblan por ke sur tiu ĉi tero la vivantoj estu unuigitaj." Estis solena momento kiam franca generalo diris tiujn vortojn ĉe la tombo de soldato el antaŭ malmika lando. Laŭ la programo okazis ankaŭ malnovkatolika diservo.

Schönbrunn.

La posttagmezo de dimanĉo estis dediĉata al ekskurso. Nia kosmopolita societo veturis aŭtobuse al la kastelo Schönbrunn tute proksima al la urbo. Tie oni vizitis la belegajn salonojn de la kastelo en malgrandaj grupoj kun gvidisto kaj tradukanto. Post la vizito oni ĝuis la parkon de Schönbrunn kaj reveturis je la sesa al la urbo, kie oni komune manĝis en hotelo Münchnerhof, sufiĉe proksime al Raimundteatro, kie ni estis vidontaj la teatraĵon.

La Blanka Ĉevalo?.

Sukceso ĝi estis, fakte, grandega sukceso. La plej bela aranĝo de la tuta kongreso. Ni gratulu la kongresan komitaton pro ĝia elekto kaj la aktorojn pro ĝia lertega efektivigo. Entuziasmo regis en la teatro, ne unu homo forkuris post la unua akto, sed ili ĉiuj estus restintaj ĝis meznokto se la prezentado ankoraŭ estus daŭrinta pli longe.

Estis ludata la Blanka Ĉevalo? . Ĉu mi bezonas rakonti pri la enhavo? Ne, certe ne, ĝi jam estis tiel konata en la tuta mondo, ni ĉiuj jam vidis ĝin sur scenejo, aŭ en filmo, ni kantas kaj fajfas la melodiojn ĉarmegajn parkere. Sed nova estis ĝia prezentado en Esperanto kaj plej ĝojige estas, ke ĝi neniel perdis en tiu lingvo sed eĉ fariĝas pli bela kaj enŝorĉiga per ties belsoneco.

Vere la Blanka Ĉevalo ne estas teatraĵo, nek vera opereto, sed stranga lerte farita kombinaĵo el modernigita popolkomedio, tirol-ado, amerika ĵazo kaj revuo. Sed des pli bone. Ĝi enhavas ion por ĉiu. Tiuj, kiuj ne bone scias Esperanton povis ĝui la tre belajn naciajn kostumojn kaj popoldancojn de la raviga aro de dancistinoj; la ŝatantoj de kanto ne malpli havis okazon ĝui kaj la amatoroj de fluanta trafa esperanta dialogo ankaŭ estis kontentigaj. Ho, ĝi enhavas tiom da plaĉaj scenoj, tiom da sorĉaj melodioj, ĝi plaĉis—ĝi plaĉis al ĉiuj. Aplauĉo dum plena scenejo interrompis la ludon multfoje kaj ripetigaj estis dezirataj.

La aktoroj ludis bonege. Kun surprizo mi poste aŭdis ke ili ne estas Esperantistoj; mi estus vetinta ke ili estas. Ili pli bone prononcis ol multaj malnovaj Esperantistoj kaj oni ne povis kredi ke ili ludas en ne scipovata lingvo. Je la fino de la prezentado la aplauĉo ne emis ĉesi, kaj krom la aktoroj kongresa prezidanto Steiner kaj la teatra direktoro Leo Kraus devis aperi sur la scenejo por akcepti la aplauĉon de la entuziasma publiko.

Kahlenberg, Grinzing.

Lunde posttagmeze denove estis ekskurso por la aliĝintoj al la aranĝo B, t.e. la plejmulto, ĉ. 700 kongresanoj. Unue oni veturis aŭtobuse al sur Kahlenberg. La urbo Wien konstruigis tie dum la lastaj jaroj larĝegan aŭtostradon, kiu per grandaj kurboj kondukas al la supro de la 500-metra monto Kahlenberg. La strado mem jam estas vidindaĵo, sed la elrigardo de sur Kahlenberg ankoraŭ estas pli bela. Oni vidas super la tutan urbon de Vieno. Bedaŭrinde la malproksimo pro nebulo ne aperis videbla,

sed cetere la vetero estis belega kaj agrable varma. Sur Kahlenberg la ekskursantoj trinkis kafon, manĝis kukon, fotografis fervore kaj promenis aŭ kuŝis en la herbo. Vendanto de tirolaj ĉapeloj kun altaj plumoj suferis la atakon de skandinavo kaj nederlandanoj kaj post kelkaj minutoj ili foracetiĝis lian tutan provizon. Poste ili havis grandan sukceson per siaj alte plumumitaj tirolaj ĉapeloj. Certe, se la kongreso daŭrus plurajn semajnojn, niaj samideanoj tute aŭstrigus siajn kostumojn! Vespere la aŭtobusoj forportis en etapoj la ekskursantojn al Grinzing kie ni en ĉarma restoracia ĝardeno aŭskultis vian muzikon, popolkantojn kaj atendis la vespermanĝon. Dum la malfrua vespero la aŭtobusoj reportis iom post iom la kongresanojn al Vieno, la lastajn je meznokto.

Laborkunsido. Akcepto en urbodomo.

Marde matene estis aranĝata la unua publika laborkunsido de U.E.A., pri kiu troviĝas raporte aliloke. Je la dekdua la kongresanoj estis oficiale akceptataj en la urbodomo. La esperantistoj ĉeestis en tre granda nombro, sed tamen ne tute plenigis la grandiozan festsalonegon en la urbodomo. Akceptis nin en la nomo de la urbestro Supera Senata Konsilisto D-ro Maly. F-ino Lidja Zamenhof alparolis lin kaj fiksis kongresinsignon al lia brusto. D-ro Maly salutis la kongreson kaj diris i.a. : ni ĝojas kaj dankas ke vi elektis Vienon kiel kongresurbon, sed vi certe ne bedaŭros tion. Malgraŭ la tempomanĝantaj kunsidoj vi espereble povis vidi la urbon kaj mi esperas ke vi estas ravitaj pri ĝi. Vieno estas kultura centro, tion jam montras la ekstera aspekto de la urbo. Por kongreso de spirita movado—Esperanto—Vieno estas taŭga loko kaj havas konvenan atmosferon. Vieno pro sia situo estas interligilo inter la popoloj kaj Esperanto estas helpilo por tio. Tial ni ankaŭ bone komprenas Esperanton. Ni esperas, ke Esperanto faros bonan paŝon antaŭen pere de la viana kongreso.

Respondis al la urba reprezentanto generalo Bastien, kiu finis sian mallongan alparolon per la komplimento . . . “ mi kaj aliaj francoj trovas, ke Vieno tre similas al Parizo. Ĉar mi estas parizano, mi ne povus fari pli belan laŭdon.”

Ŝipveturo sur Danubo.

La posttagmezo de la sama tago estis dediĉata al fakaj kunsidoj de Komitato de U.E.A., Esperantista Akademio, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, Stenografistoj, Veterinaroj, Komercestoj, Skoltoj.

Vespere estis ekskurso aŭ al Prater sub konduko de vianaj Esperantistoj aŭ ekskurso sur Danubo. La vetero estis belega kaj partoprenemis la ŝipekskurson pli da homoj ol oni antaŭvidis. La ŝipo estis tre granda, sed ĝi ankaŭ kunportis multajn neesperantistojn, tiel ke ĝi fariĝis plenplena. Tamen fine ĉiuj trovis lokon kaj la belega veturo tra la varma somera nokto ĉarmis ĉiujn. Viena orkestro ludis seninterrompe kaj kun la iro de la tempo oni eĉ havigis al si iom da spaco, tiel ke ni fakte povis danci sur la ŝipo kiel promesite. Se la grupo en Prater same bone amuziĝis kiel ni sur la ŝipo, L.K.K. povas esti kontenta.

Laborplena merkredo.

Merkrede nur unu malgranda ekskurso : rondveturo tra la urbo por parto de la kongresanoj estis aranĝita ; la aliaj laboris. Matene okazis prelegoj en la somera universitato kaj krome okazis granda nombro da fakkunsidoj.

La somera universitato.

La somera universitato estis sub la prezido de s-ro profesoro d-ro Odo Bujwid el Krakovo, Ĝi okazis dum lundo kaj merkredo dum la tuta mateno. Ĝi devis pritrakti la temon de Kulturaj kaj Ekonomiaj Problemoj de Eŭropo, sed okazis ankaŭ pluraj prelegoj pri aliaj temoj. Lunde iom post la naŭa la prezidanto prof. Bujwid malfermis per kelkaj vortoj la someran universitaton kaj transdonis la parolon al

S-ro ing. Isbrücker el Nederlando. Li parolis pri la rilatoj inter Nederlando kaj Mezeŭropo sur la kultura kampo, pri la influo de nederlandaj geniuloj al la aŭstria kulturo kaj renverse. Li ankaŭ menciis la aŭstriajn infanojn, kiuj dum la milito estis akceptataj en Nederlando kaj nun pli fortigas la ligilojn inter la du landoj.

Por la Aŭstra Ligo de Nacioj parolis registara konsilisto A. Müller, germanlingve. Lia parolado estis tuj tradukata Esperanten. Lia temo estis Necesaj Kulturaj kaj Ekonomiaj Rilatoj en Eŭropo. Li diris inter alie, ke la zorgoj kaj amuzoj de la diversaj popoloj estas ĉiam la samaj. Ili sur ĉiuj kampoj estas kunligataj. La ligo de nacioj estas necesa, jam per la fakto ke pli ol 4,000 diversaj internaciaj kontraktoj estas deponitaj ĉe ĝi. Esperanto estas la komplemento por la rilatoj inter la popoloj.

Kiel reprezentanto de la greka registaro parolis S-ro ing. Pawlos Gianelia. Li parolis pri la influo de la impostoj

sur la ekonomion de la popoloj. Reirante ĝis Solon li riĉe dokumentis siajn eldirojn. Li montris kiom la dogan-impostoj malhelpas la komercon kaj kiel solajn justajn impostojn li indikas la impostojn de la terposedantoj.

Nia konata samideano Scherer parolis pri la temo: Per unu Lingvo tra la Mondo. Li helpe de siaj abundaj spertoj povis pritrakti tion en tre interesa maniero. Cetere li laŭ oratora vidpunkto estis sendube la plej eminenta el ĉiuj paroladintoj de la tuta kongreso. Estas plezuro aŭskulti lian parolmanieron. Li diris, ke estas malĝusta pretendo, ke oni povus vojaĝi tra la mondo per la angla lingvo sole. Tiu lingvo nur estas la internacia lingvo de la kelneroj, sed en aliaj rondoj, ekz. en la eleganta societo la franca lingvo estas internacia. Cetere ne la angla lingvo estas internacia sed la dolaro. Se oni volas vojaĝi inteligente oni devas scii Esperanton. Per Esperanto oni ne sole interkompreniĝas, sed oni per ĝi malfermas la korojn. La parolanto diris, ke li skribante al Esperanta grupo ĉiam ricevis multajn invitojn kaj estas kore akceptata. En Japanujo li foje devis trinki dum unu tago dudek kvin tasojn da teo. Esperanto ankaŭ estas pli praktika, ĉar estas ĉiam pli facile aranĝi tradukon de nacilingva parolado Esperanten ol en alian nacian lingvon.

Kiel lasta en la lunda kunsido paroladis S-ro Höfert el Ĉeĥoslovakujo pri Ex Oriente Lux—El mezeŭropo savo. Zamenhof per la interpopola lingvo povos doni la savon kaj pacon al niaj popoloj.

Dum tri horoj la paroladoj rapide sinsekvis kaj la publiko estis sufiĉe laca. Se studentoj en universitato devus aŭskolti siajn prelegojn seninterrompe, ili lasus siajn profesorojn solaj. La aranĝantoj de somera universitato pripensu, ke kongresanoj ne estas pli rezistemaj homoj ol studentoj kaj donu al ili estonte iom da tempo inter la prelegoj por spiri freŝan aeron.

Cetere estis granda manko, ke la nomoj de la prelegoj kaj prelegantoj ne estis indikitaj en la kongresa libro. Mi aŭdis multajn kiuj plendis ke ili maltrafis prelegon, kiun ili estus ŝatintaj aŭskulti aŭ, ke ili devis aŭskulti prelegon kiu ne interesis ilin.

Merkrede la somera universitato estis daŭrigata. Parolis unue samideano Ikegata el Japanujo. Li parolis pri la familia sistemo en Japanujo, precipe pri la situacio de la japanaj virinoj. En Japanujo la familio ludas pli grandan rolon ol ĉe ni kaj filo ĝis sia trideka jaro bezonas la permeson de siaj gepatroj por edziĝi. La edzinoj havas kiel unuan

devon obei siajn edzojn, sed estas malĝusta opinio kredi ke ili estas malsaĝaj aŭ malfeliĉaj. Okcidentuloj studu per Esperanto orientajn vivkondiĉojn por formigi al si klaran bildon.

Tiam parolis nia granda verkisto samideano D-ro Kalocsay. Lia temo nomiĝis La Esperanta Literaturo, sed li grandparte parolis pri la aktuala disputado pri neologismoj. Li senkulpegis sin mem pri tiu kulpigo dirante ke la materialo de la literaturo estas la “vorto” kaj la neologisma demando estas fundamenta por ĝi. La parolanto diris, ke la Esperanta literaturo estis oficiale pritraktata kiel cindrulino de nia movado, sed aliaj samideanoj ne akceptis tiun staton kaj volas antaŭenpuŝi nian literaturon. La literaturistoj devas riĉigi la lingvon por adapti ĝin al la bezonoj de literaturo. Tio altiras malsimpligon kaj tial estiĝas batalo inter emuloj de simpleco kaj emuloj de riĉeco. Lastatempe ĝi akriĝis. Dum Zamenhof vivis li estis la supera instanco, sed nuntempe estas facile ataki tiujn, kiuj per sia literaturo havas la evolucian de la lingvo en siaj manoj. Vera literaturo ne estas ebla sen la necesa vorttrezoro. La kunmetitaj derivitaj vortoj estas logike abstraktaj skeletoj, sed havas nenium koloron kaj sentonenhavon. Vera literaturo ne povas ekzisti sen tiuj vortoj kaj sen alpreni neologismojn malfacilaj literaturaj taskoj estas neplenumblaj. Hodiaŭ kiam Esperanto jam estas pli vaste uzata estas permeseble riĉigi ĝin; fariĝante malpli facila ĝi samtempe fariĝas pli valora. Oni do iasu al la literaturistoj liberan manon. Literaturo estas hodiaŭ pli bezonata ol iam. Ĝi sole povas manteni la internacian ideon. Ni scias, ke nia movado malbone fartas, dum ke la literaturo ĝuste nun progresas kiel neniam antaŭe. Tio signifas, ke Esperanto jam estas vivanta organismo, kaj se la organizacio malbone fartas Esperanto rifuĝas en la azilon de la literaturo kaj transformas ĝin en palacon. Tio estas la tasko kaj merito de la “kulturesperantistoj.” Hodiaŭ jam valoras la penon lerni Esperanton pro la sola literaturo. La literaturo vere prosperas kaj Esperanto fariĝis pli kaj pli taŭga instrumento por literaturo. Antaŭ la milito nia poezio restis sur la kampo de la logikeco, pinta epigramateco, dum ke ĝi hodiaŭ kantas, fluas, sentas. Tion la parolanto montris per kelkaj poemoj recititaj. Jen recitis vere kapabla recitisto! Neniam min tuŝis Esperanta poemo tiamaniere kiel el la buŝo de Kalocsay. La parolado estis tre lerta kaj Esperanto fluas kun tia facileco kaj rapideco, ke malproksime sidantoj eĉ malbone komprenis. Sed por la proksime sidantaj estis ĝuo aŭskulti.

Sekvis parolado de samideano profesoro D-ro Kamaryt, kiu parolis pri ĉeĥa filozofio kaj diris ke ankaŭ Masaryk, kiu en 1880 fariĝis profesoro en la universitato ĉeĥlingva en Praha multe verkis sur tiu kampo, kaj havis grandan influon. Mi bedaŭras, ke mi ne povas raporti pri la tuta parolado, kiu cetere suferis pro manko de nigra tabulo, ĉar estas ĉiam malfacile kompreni fremdajn nomojn. La superrigardo pri la ĉeĥa filozofio venis el la buŝo de vere kompetenta homo.

S-ro d-ro Spielmann, direktoro de la svisa Esperanto Instituto, parolis pri Esperanto en P.T.T. Li diris, ke la monda poŝt-unio havas kiel oficialan lingvon la francan, sed la angloj kaj germanoj protestis, tiel ke fakte la poŝto havas tri lingvojn. Pro la malfacileco de la lingvoj, ili ofte estas malbone scipovataj kaj la interkompreniĝo suferas. La unuaj poŝtkongresoj ne estis malfavoraj al internacia lingvo, sed tiam Esperanto ankoraŭ ne ekzistis. Nun la poŝto estas malfavora kaj klopodoj de I.L.E.P.T.O. ne havis sukceson. Ni esperantistoj devas montri, ke Esperanto jam multe estas uzata, kaj nur per tio oni povos atingi ion ĉe la altaj instancoj.

Mallonge antaŭ tagmezo estis la horo kaj la prezidanto fermis la someran universitaton de la dudekoka. Ĝi donis vere multajn interesajn prelegojn kaj bone sukcesis.

Tuttagaj ekskursoj.

Jaŭde la kongresanoj ekskursis al diversaj direktoj. Bedaŭrinde la vetero estis malfavora, sed mi tamen aŭdis de samideanoj partoprenintaj, ke ili bone amuziĝis kaj ĝuis la ekskursojn, ĉe se ili ne profitis ilin tiom kiel ili estus povintaj en brila vetero. La plej longa ekskurso estis aŭtobusa kaj kondukis al Rax-Semmering-Vöslau-Vieno; t.e. al sur Rax oni veturis per aera kablofervojo. Sur Rax, en alteco de 2,000 metroj, estis terura malvarmo kaj pro nuboj oni ankaŭ ne vidis multe. Tamen la vojaĝo per kablofervojo kaj poste la pitoreska regiono de Semmering tre interesis. La dua ekskurso ankaŭ kondukis supren en altecon de 2,060 metroj sur Schneeberg, unupartite per fervojo kaj tute supren per dentrada fervojo. Supre ankaŭ estis tre malvarme: malmultajn gradojn super nulo kaj terure blovis, tiel ke oni ne povis promeni ekstere sed amuziĝis en la hotelo apud fajrujo. Laŭ miaj informoj la manĝoj dum la ekskursita tago ĉiuloke estis bonegaj. Aliaj aŭtobusaj ekskursoj tuttagaj iris unu al Mödling-Heiligkreuz-Baden-Gumpoldskirchen, dua al St. Pölten-Melk-

Dürnstein-Krems. Krome multaj samideanoj ne partoprenantaj en la oficialaj ekskursoj aranĝis proprajn pli malpli longajn, ekz. vizitis Karl-Marx-hof, kaj vespere estis troveblaj en ĉiuj restoracioj de la urbo.

Vendrede denove laboro.

Matene estis la dua laborokunsido denove bone vizitata. Laŭ la programo devus okazi konkurso de opinioj pri jenaj libroj: Enciklopedio de Esperanto, Esperanta Bibliografio de Stojan, vortaro de Wüster. Sed tiu konkurso tute falis sub la tablon, ĉar la tempo eĉ ne sufiĉis al la komitatanoj de U.E.A. por detale raporti pri la laboroj de U.E.A. Post la tagmanĝo denove estis aŭtobusa rondveturado por la kongresanoj kiuj ankoraŭ ne jam partoprenis, kaj por la aliaj estis vizito al la ĉambregoj de Höfburg. Posttagmeze ree okazis vico de fakkunsidoj: Internacia Scienca Asocio Esperantista, Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio, Unuiĝo de Esperantistaj virinoj, Senalkohola kaj Sentabaka Kulturo, Tutmonda Asocio de Geinstruistoj kaj la Ĝenerala Kunsido de Aŭstria Esperanto-Asocio.

La Kongreso dancas.

Sub tiu moto la internacia balo festiĝis en Vieno. La granda festsalonego kun ĉirkaŭantaj galerioj malfermiĝis kaj oni ankoraŭ foje havis okazon vidi la tutan kongreson kune. Ili alvenis en balkostumoj aŭ en naciaj kostumoj, aŭtomobile aŭ piede, el ĉiuj anguloj de la urbo, kun la firma intenco same bone amuziĝi kiel la kongreso Viena antaŭ 122 jaroj. La muziko ankaŭ tute restis en viena tradicio kaj ludis senfinajn elektrigajn valsojn kaj ankaŭ modernan dancmuzikon. Sub la lerta gvidado de aŭstraj gesamideanoj la kongreso ekdancis kaj sur la plankego turniĝis sennombraj paroj en la ritmo de la vienaj valsoj. Tamen oni havis tute sufiĉe da loko, ĉar multaj nedancemuloj, pro nescipovo, laceco aŭ maljuneco preferis nur rigardi la belan bildon. La kadro de la balo en la imperiestra salonego de Höfburg vere estis inda al ĝi kaj du interŝanĝantaj orkestroj faris sian eblon. Interrompis la dancadon prezentoj de kanto kaj popoldanco kaj la granda konkurso pri belulinreĝino de la kongreso. Prezentiĝis granda aro da belulinoj al la konkurso, plejparte vestitaj en naciaj kostumoj,—ĉar mi ankoraŭ ne diris, proksimume la duono de la ĉeestantaj belulinoj estis vestitaj en naciaj kostumoj kaj ankoraŭ pligrandigis sian propran ĉarmon per tiu de la ravaj kostumoj. La kongresanoj kiel juĝantoj elektis japaninon en japana kostumo reĝino de beleco en la kongreso.

La ferma kunsido.

La lasta kunsido de la Kongreso ankaŭ estis vera labor-kunsido. En la vico de la publikaj laborkunsidoj la tria. Okazis la granda raporto de Malmgren pri propagando de Esperanto. Scherer diris kelkajn vortojn pri Heroldo de Esperanto kaj ĝia daŭriganto: Esperanto Triumfonta. Li diris, ke nun kiam la semajna gazeto troviĝas en neŭtrala lando neniu havas pretekston ne aboni ĝin. Oni jam antaŭe estis dirinta, ke kontrakto kun S-ro Teo Jung estas farita kaj ke la ĝeneva ESPERANTO kaj HEROLDO (t.e. Esp. Tr.) estas kunigataj. Aplaudu salutis tiun solvon de la gazeta demando, kiun ni dum tiel longa tempo spiris.

Nun la prezidanto de U.E.A. generalo Bastien dankis S-ron Steiner pro la aranĝo de la kongreso. Li parolis pri la laborego, kiun Steiner devis fari, li dankis al L.K.K. kaj al ĉiuj helpantoj kaj speciale al ing. Hugo Steiner kaj D-ro Lothar Steiner kaj al la aŭstraj eminentuloj kiuj subtenis la kongreson. Steiner respondis kaj diris, ke tio fakte estis la unua fojo, ke li povis kunesti en kunsido de la kongreso, ĉar ĉiam la laboro malhelpis lin. Li siaflanke dankas al diversaj personoj kaj adiaŭas la kongreson. La franca karavano transdonis florojn al S-ino Weber, F-ino Hojtasch kaj F-ino Falk pro ilia laboro en L.K.K. Leo Belmont en poemo priskribis la kongreson kaj rikoltis ĉi tiun fojon koran aplaudon. Mallonge antaŭ la dekdua post duon-sukcesa kantado de la himno la kongreso estis fermata. Ek al la jubilea kongreso en Varsovio la proksiman jaron!

Ĝeneralaj konsideroj.

Estas surprize ke la kongreso ne fariĝis pli granda, ĉar oni ĝenerale kredis, ke certe pli ol dumil aliĝos en Vieno. La kauzo ne estas tute simple videbla, sed verŝajne la politika necerteco en Aŭstrio detenis multajn partopreni. Alia afero, kiu laŭ la spertoj en Vieno tre grave influas la nombron de partoprenantoj, estas la karavanoj. Malmultaj homoj kuraĝas tute sole vojaĝi al malproksima lando fremdlingva, dum ke ili volonte aliĝas, se lerta karavanestro aranĝas ĉion por ili kaj havigas al ili malaltajn prezojn.

Entute la kongreso en Vieno denove estis vera kongreso en la malnova tradicia stilo. Post la ruliĝanta eksperimento de la lasta jaro oni ĝenerale aprobis havi kongreson kun unu kongresurbo kaj unu sola kongresejo. Pri la rezulto de la kongreso vi legos aliloke; mi nur malkaŝu ĉi tie, ke oni ege laboris en la komitato de U.E.A., kiu sen-

lacigeble kunvenis kaj laboregis. Tio certe estas el Esperantista vidpunkto plej grava. La kongresoj devas liveri la rimedojn por antaŭenpuŝi la movadon, kaj en tiu rilato Vieno certe estos pli fruktodona ol la plej multaj antaŭaj kongresoj, kie oni fordiskutis tro da tempo vane.

El la raporto de ARTHUR BAUR.

POŝT MARKOJ

por kolektantoj—ankaŭ pogrande

BRITKOLONIAJ POŝT MARKOJ, UZITAJ

1. "Belvido" sortimento: bonkvalitaj bildpoŝtmarkoj, po \$ 1 aŭ 4 ŝil. britaj por 100.
2. "H.V.C." sortimento: nur pli altaj valoroj de 2 $\frac{1}{2}$ p. ĝis rupio, ŝilingo kaj dolaro, po \$ 1 aŭ 4 ŝil. britaj por 100.

PREZLISTOJ SENPAGE.

Ni aĉetas poŝtmarkojn, sed skribu unue—ne sendu.

W. M. APPLEBY, P.T.S.,
Del. I.E.L.,
Clarence Street, Cheltenham,
Anglujo.

LA LABORKUNSIDOJ de la 28a Universala Kongreso

Generale la laborkunsidoj en Vieno estis bone vizitataj, kaj la diskutoj interesaj, kvankam du-tri personoj tro ofte kaj tro longe paroladis, kaj tiamaniere iom tedis la ĉeestantojn. La granda plimulto de la diskutoj estis pri la translokigo de la oficejo de U.E.A. al Londono. Ŝajnis, ke, kvankam kelkaj personoj akre kritikis la agadon de la Estraro, la granda plimulto subtenas ĝian agadon, kaj esperas, ke estas "pli bone vivi en Londono ol morti en Genevo."

La Unua Laborkunsido, 11an de Aŭgusto.

Proksimume 200 ĉeestis, kiam la Prezidanto, Generalo Bastien, malfermis la kunsidon, kaj bonvenigis la ĉeestantaron. D-ro Adam Zamenhof salutis la kongreson en la nomo de la familio Zamenhof, S-ro W. de Cock Buning (Hago) salutis en la nomo de International Auxiliary Language Association (I.A.L.A.), kaj S-ro Ŝapiro en la nomo de la urbo Białystok.

La Prezidanto klarigis la tiutempan situacion, kaj diris, ke laŭ letero ricevita de S-ro Bouvier, datumita Julio 30, li esperas vidi baldaŭan interkonsenton kun la svisaj protestintoj.

S-ro R. M. Frey parolis pri la subteno de la urbo Vieno kaj de Aŭstria Esperanto-Asocio al U.E.A.

D-ro Jan Medrkiewicz, Lublin, diris ke la voĉdonado de la delegitoj ne estas valida pro neekzisto de formala decido de la komitato por tiu voĉdonado. Li plendis pri la divido de U.E.A. kaj pri la sendo de la Biblioteko al Vieno.

D-ro Spielmann, Svislando, plendis pri la investo de la kapitalo ekster Svislando (farita antaŭ multaj jaroj), pri la kalumnioj kontraŭ la svisoj en diversaj gazetoj, kaj pri la malalta kotizo de 50 sv. centimoj por la simplaj membroj.

S-ro P. Golobič, Jugoslavujo, salutis la kongreson en la nomo de la Jugoslava Esperanto-Ligo, kaj forte substrekis la neceson subteni la Estraron, se oni deziras ke U.E.A. vivu.

S-ino H. Dresen, Estonujo, petis klarigojn pri la nomitaj malbonaĵoj de la antaŭaj gvidantoj, kaj ciferojn pri la financaj avantaĝoj de translokigo.

S-ro Ŝapiro, Polujo, diris ke plendoj kontraŭ antaŭaj gvidantoj ne devus okazi en ia oficiala gazeto, kaj plendis pri artikolo kiu aperis en *Franca Esperantisto*. Li petis ke oni formale forstreu la politikajn aludojn en la protokolo de la Kolonja Kongreso.

S-ro Lejzerowicz, Polujo, parolis pri la idea bazo de la movado. Li diris, ke ne estas Esperantismo, se oni propagandas gentan malamon. Li plendis pri la okazigo de la Kongreso en Kolonjo.

S-roj Borel kaj Movo plendis pri malrespekto al la Statuto de la Komitato.

La Prezidanto diris ke tempo mankas por plenaj respondoj, sed esperas doni ilin en la venonta laborkunsido. Ĉar unu parolinto diris, ke la oficejo devus esti en neŭtrala lando, li citis la faktojn pri Belgujo, kiu antaŭ 1914 estis lando, kies neŭtraleco estis garantiata de la gravaj ŝtatoj, sed eĉ tio ne helpis al ĝi konservi sian neŭtralecon. Li klarigis la tiel-nomitan "dividon de U.E.A.," kaj montris ke por la ordinara Esperantisto ankoraŭ estas nur unu oficiala adreso. Li diris ke, ĉar la Komitato jam estis aprobinta decidon, kiu necesigis aliigon de la statuto, kaj voĉdonadon de la delegitoj, li opiniis, ke alia formala aprobo de la Komitato pri voĉdonado de la delegitoj tute ne estis bezonata.

La Direktoro respondis al la demando pri financo, kaj klarigis, ke li sendis la jenajn komparajn ciferojn al *Heroldo de Esperanto* antaŭ kelkaj semajnoj, sed bedaŭrinde pro la tiutempa malapero de la gazeto ili ne presigis.

Elspezoj	En svisaj frankoj	Budgeto normala en Londono.
Salajroj	17.290,—	14.550,—
Lupago k. impostoj	3.433,25	2.025,—
Gazeto	7.773,40	6.000,—
Jarlibro k. afranko	2.998,90	3.375,—
Afranko	2.235,57	1.800,—
Presajoj k. materialo	1.513,50	1.500,—
Premioj	567,05	450,—
Lingva Komitato	400,—	450,—
Vojaĝoj	144,05	750,—
Materialo k. amortizo	843,30	450,—
Diversaj (ink. oficejaj elspezoj)	1.783,36	2,250,—
	38.982,38	33.600,—

Notu bone, ke

1. Estas ŝparo de 5.300 fk.
 2. En 1934-35 U.E.A. donis nur malgrandan suplementon, dum en 1937 estos plena jarlibro.
 3. En 1934-35 estis 11 numeroj de la gazeto ; en 1937 estos 12.
 4. En 1934-35 estis neniŭ amortizoj ; en 1937 ni kalkulas 450 fk. tiucele.
 5. En 1937 ni antaŭvidas sub "vojaĝoj" sufiĉan sumon por plena kunveno de la Estraranoj, kiu estis necbla en 1935.
- S-ro Malmgren parolis pri la kaŭzoj de la translokigo, kaj pri la agado de la Estraro, kiu laŭ la nova statuto devus gvidi la movadon.

Dua Laborkunsido, 14an de Aŭgusto.

La Prezidanto malfermis la kunsidon, kaj tuj faris paroladeton pri la mortintoj de la pasinta jaro. Li speciale memorigis pri S-roj Merchant, Kreuz, Arabeno, Arnhold, Cuadra, Petiau kaj Prof. Richet. Ĉiu silente staris dum kelkaj momentoj.

Li legis telegramon bondeziran de Kanceliero Kurt von Schuschnigg, kaj salutojn de S-ro Clarenna, Ĝenova, S-ro Štampfer, Palestino, kaj S-ro Riednicki, Polujo. La Vic-urbestro de Carlsbad salutis la kongreson.

Poste la Prezidanto respondis al kelkaj diraĵoj de tiuj, kiuj plendis pri la translokigo de la centra oficejo, kaj montris ke ĝi estis nepre necesa pro la financa stato de la Asocio. Al la membro, kiu plendis pri la malalteco de la kotizo por la simplaj membroj, li montris ke eĉ tiu sumo estas tro alta por multaj societoj.

Ĉar estis plendoj pri la aludoj al la antaŭaj gvidantoj de U.E.A., li iom detale klarigis la situacion kaj la agadon post la kongreso en Stockholmo. Okazis kunveno de la Estraro en Ĝenevo, Septembro 1934. Oni trovis, ke la ŝuldoj tiam estis pli ol 40.000 sv. fk. La Asocia Kapitalo kaj parto de la Garantia Kapitalo estis foruzita por ŝtopi la truon de tro grasa budĝeto. Li klarigis, per kelkaj trafaj ekzemploj, kiamaniere oni malbone agis en Ĝenevo pere de la financa servo. Li poste petis demandojn kaj proponis limigi la paroltempon al 5 minutoj por ĉiu parolanto.

D-ro Medrkiewicz, Lublin, parolis pri la ideo bazo de la lingvo, kaj la rezolucio de la Ĝenerala Estraro en Krakovo en 1932. Li proponis ke U.E.A. postulu monon de la ŝtatoj.

S-ro Lejzerowicz, Polujo, parolis pri eblaj financaj rimedoj, kaj la starigo de Fondo de la Zamenhofa Obolo. Ĉiu membro kaj ĉiu kursano donacu 0.50 sv. fk.

D-ro Spielmann, Svisujo, diris ke kotizoj devas esti egalaj en ĉiuj landoj, kaj proponis ke U.E.A. verku propagandilojn por praktikaj aferoj kaj por la enkonduko de Esperanto en la lernejo.

Fino Lidja Zamenhof parolis pri la du oficejoj—en Ĝenevo kaj en Londono, kaj pri la Biblioteko. Al la demando pri la oficejo, la Direktoro respondis. Pri la Biblioteko la Prezidanto respondis ke ĝia komenco estis donaco de la Svisa Societo, kaj ke la Komitato estis konsentinta ke tiu parto restu en Svisujo. Responde al demando, oni klarigis, ke la decido fordoni la bibliotekon estis nur rezulto de la fakto ke oni ne plu havas la monon por konservi ĝin.

Tiam okazis voĉdono pri la ĉesigo de la diskuto, en kiu 60 subtenis la proponon kaj 30 kontraŭis ĝin.

S-ro Petit parolis pri la laboro farita de la komitato, kaj klarigis kelkajn planojn por estonta laboro. La Prezidanto dankis al li kaj legis rezolucion de S-ro Š. Štampfer en Palestino, kiu petis ke oni forte subvenu U.E.A.'n.

S-ro Kamaryt, Estrarano, parolis pri la bonega laboro kaj servo de la Prezidanto, Ĝeneralo Bastien, kaj S-ro Malmgren, Estrarano, pri la neceso por kunlaborado.

Ferma Kunsido, 15an de Aŭgusto.

La Prezidanto malfermis la kunsidon, kaj informis la ĉeestantaron pri la morto de D-ro Corret. Ĉiu starigis.

Li anoncis, ke la Komitato decidis nomi S-rojn Julio Baghy kaj K. Kalocsay, Honoraj Membroj, okaze de ilia jubileo, kaj S-rojn Fritz Stockinger, Honora Membro pro lia granda helpo al la movado kaj la kongreso. Granda aplaŭdo.

La Prezidanto tiam legis leteron de S-ro Bouvier, datumita Aŭg. 13a, kiu malaperigis la esperon esprimitan en la unua laborkunsido. Li diris, ke la Komitato decidis fari la lastan provon al akordiĝo, kaj se tiu ne sukcesus, la Komitato faros la necesan decidon.

S-ro Petit raportis pri la laboro de la Komitato dum la semajno. Okazis naŭ kunvenoj, kiuj daŭris entute pli ol 20 horojn. Inter aliaj aferoj diskutitaj estis la translokigo de la oficejo ; akcepto de propono aranĝi Konferencon en Parizo dum Pentekosto, 1937, en la Ekspozicio kun temo "Esperanto en la Praktiko" ; bona laboro rilate al la ebleco starigi Landajn Asociojn en ekstereŭropaj landoj ; decido ne plu eldoni respondkuponon post la fino de 1936 ;

kontentiga aranĝo pri aliĝo de la Estona Asocio ; interkonsento kun S-ro T. Jung pri la gazeto ; intertraktado pri kunlaborado kun I.K.U.E., I.P.E., S.A.T., I.S.E. ; Internacia Gazetaro Servo ; aranĝoj pri la Jubilea Kongreso en Varsovio ; kaj multaj aferoj rilate al la administrado.

S-ro Frey parolis pri kvar rezolucioj, kiujn akceptis la kunveno de T.A.G.E. Tri rilatas al okazigo de konferenco pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn en Vieno en 1938, kaj ili estis akceptataj kun rezervo ke oni devas atendi la rezulton de la Konferenco en Parizo. La alia estis dankesprimado al Ministro Stockinger.

S-ro Malmgren faris longan kaj tre interesan paroladon pri propagando, kiu estas represita en la nuna Jarlibro.

S-ro Scherer petis la subtenon de la kongresanoj por la eldonisto de *Heroldo de Esperanto* en malfacila tempo. Granda aplaŭdo.

La Prezidanto faris dankan kaj laŭdan paroladon pri la organizintoj de la kongreso, la altrangaj protektoroj, la L. K. K. Prezidanto S-ro Registara Konsilanto Hugo Steiner, la kunlaborantaj membroj de la L.K.K. : S-ro Frey, D-ro Pfeffer, Ing. H. Steiner, D-ro L. Steiner, kaj protokolanto S-ro E. Werner. Granda aplaŭdo montris la aprobon de la kongresanoj.

S-ro Steiner respondis, kaj dankis al la Prezidanto kaj ĉeestantaro pro la afablaj vortoj. Li ankaŭ dankis al S-ro Ulbrich, kiu redaktis la Esperantan parton de la *Reichspost*, kaj al la helpantinoj en la kongresa oficejo. Li dankis ankaŭ al la Estraro kaj Komitato de U.E.A. pro la bona laboro kiun ili faris.

La Direktoro legis la jenan rezolucion proponatan de la Komitato :

“ La 28a Kongreso konfirmas la deklaron de Boulogne s. Mer. Ĝi estas konvinkita, ke nur la ideala bazo montrita de D-ro Zamenhof garantias al la diversaj membroj harmonian kunlaboradon, kaj al la organizo mem regulan disvolvigon laŭ la unua Artikolo de la Statuto de U.E.A.”

Akceptita aklame.

Prof. Bujwid parolis pri la pretigo de la Jubilea Kongreso en Varsovio, kaj invitis ĉiun partopreni. S-ro Leo Belmont deklamis poemon pri la belecoj de la Viena Kongreso. S-ro Sapiro invitis al postkongreso en Bialystok en 1937.

Fine, S-ro Isbrücker proponis dankon al la Prezidanto pro lia kapabla kaj energia gvidado de la diversaj kunsidoj. Granda aplaŭdo pruvis ke ĉiu konsentis.

PROPAGANDO DE ESPERANTO.

Parolado de E. Malmgren en la Viena Kongreso.

La historio de la Esperanto-movado rakontas al ni, ke en iu periodo la movado rapide kreskis en iu lando, kaj en alia periodo en alia lando. La kontakto inter la landoj koncerne la propagandmetodojn kaj la reciprokan helpon preskaŭ tute mankis. Ke nia movado suferis multe pro tio, estas memkompreneble.

Antaŭ kelkaj monatoj oni komisiis al mi krei internacian centron por la Esperanto-propagando. Sed tiu centro havu la celon fari konsilojn, peri ideojn kaj prezenti proponojn nur al la landaj asocioj kaj tute ne al izolaj esperantistoj aŭ lokaj Esperanto-grupoj. Estas ja la tasko de la tutlandaj asocioj direkti kaj gvidi la esperantistaron de la concernaj landoj. Tiel la nova propaganda centro celas helpi nur la landajn asociojn, sed la tutmonda esperantistaro en siaj rilatoj kun la internacia Esperanto-movado ĉiam devas turni sin al la Centra Oficejo.

Kiam ni komencas starigi planojn por la propagando de Esperanto, ni devas antaŭ ĉio klarigi al ni la celon de nia propagando. Ĉu ni konsideru Esperanton kiel idealistan ideon aŭ kiel nuran lingvon ? Ni povas ankaŭ fari la demandon tiel : Ĉu ni samtempe kiam ni instruas Esperanton al la homoj devas krei kaj devas postuli idealisman pensmanieron ĉe ili, aŭ ĉu nia celo estas instrui Esperanton al ĉiuj homoj en la mondo, al sanktuloj kaj pekuloj, al idealistoj kaj praktikistoj !

Se nin interesas nur la idealistoj, kiuj eble estas 1% de la tuta homaro, tiam ni ankaŭ devas limigi niajn celojn. Tiam ni ja ne devas klopodi instrui ĉiujn homojn de la mondo pri Esperanto, sed ni devas serĉi la idealistojn kaj prediki la idealismon.

Sed ĉu oni do ne povus kunigi la du propagand-direktojn ? Jes, pli malpli ! Estas nome tiel, ke Esperanto en si mem prezentas al la homoj ion idealistan. Per Esperanto la homoj de la diversaj popoloj povas interparoli kaj diskuti por solvi siajn internaciajn demandojn. La vojo al la paco estas pli ebena, post kiam la teknike mirinda rimedo Esperanto forigis la barojn. Ĉu tiu rolo de Esperanto ne estas sufiĉe grava ? Jes, certe !

Kiam mi do nun kaj estonte skizos planojn por la propagando de Esperanto, mi ĉiam celas: *Esperanto por ĉiu!* Sed vi, miaj kunlaborantoj, povas havi tute alian opinion. Vi tamen povos havi bonan utilon de mia laboro, ĉar vi ja povos elekti tiujn proponojn, kiuj plaĉas al vi. Cetero vi neniel estas ligita al miaj proponoj; vi povos ŝanĝi ilin, apliki ilin laŭ la cirkonstancoj de via lando kaj krom tio krei novajn proponojn kaj naski novajn ideojn. Kaj ĝuste tio estas tiel grava: ke vi ne kontentiĝos je la ideoj kaj proponoj prezentitaj de la propaganda centro, sed ke vi memstare laboru, kaj ke vi prezentu *viajn* proponojn al ni! Mi ripetas tion, ke nur pere de amika, bonvola kunlaboro kaj reciproka helpo ni povas atingi kontentigajn rezultojn.

Mi do petas pri kunlaboro, kunsento kaj kunagado!

Kiel allogi la homojn lerni Esperanton?

Kiam ni rekomendas al la homoj lerni Esperanton, ni prefere samtempe tuj rekomendu iun Esperanto-kurson. Kaj se iu kurso laŭ sia aranĝo estas ne nur instrua sed ankaŭ amuza, tiam des pli bone. Pro tio ni ne povas tro alte taksii la valoron de la Cseh-kursoj kaj aliaj kursoj kun eksterlanda instruisto. Kelkaj personoj opinias, ke tiuj amuzaj kursoj allogas tro multe da homoj, kiuj nur volas amuziĝi, kaj kiujn oni poste ne povas konservi kiel organizitaj esperantistoj. Jes, parte tiu opinio estas prava, sed aliflanke ni devas sincere diri, ke la bonega kurso ne kulpas je tio, ke la daŭrigaj kursoj ne estas same interesaj kaj bonaj! La kulpo ne koncernas la Cseh-kurson sed koncernas nin, kiuj ankoraŭ ne kapablis luizi la grandan entuziasmon en la Cseh-kursoj! Ĉerte troviĝas miloj da bonegaj rimedoj, sed ni devas eltrovi ilin, inventi ilin!

La manieroj estas diversaj. Kaj ĉiuj manieroj estas bonaj, tamen ne la enuigaj! Tial mi ankaŭ respektas la manieron de pastro Cseh prepari interesan gazeton "La Praktiko" por tiuj personoj, kiuj jam partoprenis elementan kurson. Persone mi plurfoje proponis al s-ro Cseh verki daŭrigan kurson same interesan kiel la komenca kurso. Ĉar eĉ se oni en la daŭriga kurso ne povas ĉion instrui, ĉiun detalon klarigi, la instruisto tamen dum pli longa tempo povas influu la pensmanieron de la kursanoj, kaj ili povos ĝui la personan kontakton kun la instruisto. En la komenco de la komenca kurso la interparolo, la reciproka komunikado inter la instruisto kaj la kursanoj estas ja sufiĉe limigita. Sed dum la daŭriga kurso la kursanoj

povus dum la tuta tempo havi kontakton, personan ĝuon de la instruisto.—Jes, mi faris tiun proponon, sed s-ro Cseh ja havis tiom da aliaj laboroj aŭ ne konsentis kun mia propono. Mi ankaŭ devas diri, ke mi tre bone komprenas la terure grandajn malfacilaĵojn, kiujn oni devas venki en tia kurso. Povas esti, ke oni eĉ devas fari du malsimilajn kursojn: unu por tiuj, kiuj jam scias aliajn lingvojn, kaj unu por tiuj, kiuj ne bone scias la gramatikon.

En ĉiu okazo ni nun troviĝas en tiu stato, ke ni devas prezenti al la homoj daŭrigajn kursojn, kiuj ne estas tiel amuzaj kiel la elementa kurso. En la daŭrigaj kursoj ni devas postuli pli da laboro de la kursanoj, jes, ili devas vere *labori*. Kiel ni do povas instigi ilin labori?

Turistvojaĝoj.

En la mezo de Svedlando troviĝas la malgranda urbo Karlskoga. Tie oni aranĝis elementajn kursojn dum la pasinta aŭtuno. Sed ne estis ordinaraj kursoj! La kursarangantoj nome antaŭ la kurso kontaktiĝis kun la sveda Esperanta Turista Komisiono por havi informojn pri turistvojaĝo al Estonio. Kaj oni do anoncis la Esperanto-kursojn en tiu maniero, ke oni promesis, ke tiuj personoj, kiuj partoprenis la Esperanto-kursojn povos partopreni la turistekskurson Karlskoga-Stokholmo-Tallinn kaj reen. La kosto por vojaĝoj, loĝo kaj manĝo estos entute 70 kr. En la lokaj gazetoj oni kompreneble samtempe skribis kelkajn belajn artikolojn pri Estonio kaj pri Tallinn.—Montriĝis, ke la sukceso estas plena. Kaj ne nur por la elementa kurso, ĉar la plej multaj partoprenis ĝis la fino ankaŭ la daŭrigan kurson! Kial? Jes, ĉar ili nature volis perfektigi por povi paroli en la fremda lando! Kaj somermeze 1936 okazis tiu turistekskurso. Partoprenis pli ol 50 personoj, kiuj je la reveno al sia hejmloko estis tiel kontentaj, tiel entuziasmaj, ke ili unuvoĉe deklaris, ke ili ĉiuj intencas daŭre aparteni al la Esperanto-klubo kaj ankaŭ verbi novajn esperantistojn. Kaj ke ili ankaŭ en la venonta jaro volas fari Esperanto-ekskurson al la eksterlando. La sukceso de la aranĝo estis do plenplena!

Mi havas la imagon, ke oni en pluraj landoj povas fari similajn aranĝojn. Grave estas nur komenci la antaŭpreparon en frua tempo. Do, unue kontaktiĝu kun esperantistoj en najbaraj landoj kaj havigu informojn pri kosto de loĝo kaj manĝo en tiu aŭ alia interesa urbo. Ankaŭ informiĝu pri la rabatitaj biletprezoj por grupo de 20 aŭ 50 personoj. Kaj laŭ la ricevitaj informoj vi pretigu la

propagandon. Sed nun mi volas fari averton! Kalkulu je tio, ke via Esperanto-klubo aŭ Turista komisiono gajnos kelkajn kronojn okaze de la aranĝo, ĉar oni ja tamen devas havi diversajn elspezojn ĝeneralajn. Aliflanke mi avertas je tio, ke la turistarano de la esperantistoj devas esti pli favora ol tiu de iu ajn alia turistentreveno! Ni esperantistoj nepre devas montri al la publiko, ke ili gajnas, se ili aliĝas al ni! Tio estas plej esence grava, ĉar nia celo ja estas servi la homojn kaj ne monpumpi ilin. Sed kiam la turismaj aranĝoj pligrandiĝas, tiam oni ankaŭ povas mone rekompenci la laborantojn. En la komenco tio tamen ordinare ne estas ebla.

Preleg-vojaĝoj.

En kelkaj landoj oni organizis sisteme prelegvojaĝojn por eksterlandaj prelegistoj. Tiamaniere la granda publiko ja ricevas senperan kontakton kun la eksterlando kaj kun la utilo de Esperanto. En Svedlando, kie oni plej serioze utiligis tiun ideon, oni havas la plej kontentigajn spertojn pri la aranĝo. Tie oni dum kelkaj jaroj faris kontrakton kun eksterlandano por tuta jaro. Ekz. S-ro Sinha siatempe faris ĉ. 200 prelegojn en la tuta lando, kaj same s-ro Mustapha Raden. Por la sezono aŭtuno 1936 la svedoj dungis eĉ du prelegistojn, s-ron Scherer kaj la islandan verkiston Thorbergur Thordarson.

Kelkfoje oni ankaŭ povas dungi teatrogrupon por la sama celo. Antaŭ proks. unu jaro sveda teatro-grupo vizitis la baltajn landojn kaj ludis en Esperanto. La rezulto estis morale kaj publike bona, sed ekonomie ne kontentiga. Tamen mi havas la senton, ke oni povas ankaŭ solvi tiun problemon.

Cetere mi opinias, ke ni ne devas esti ligitaj al la jam pruvitaj manieroj rilate al prezentado antaŭ la granda publiko. Ni serĉu novajn kampojn, por ke la publiko havu la senton pri Esperanto, ke ĝi estas ne nur praktika sed laŭmoda!

Gazetara servo.

Pluraj landoj atentigis min pri la graveco de la pergazeta propagando. Kompreneble ili pravas. Kaj nun mi prezentas al vi plej simplan kaj samtempe plej rician solvon: Nia oficiala organo Heroldo de Esperanto devas en ĉiu semajno havi angulon aŭ kolonon kun la rubriko ekz. "Esperantokolono de la gazetaro." Tiu kolono enhavu resumajn artikolojn pri ĉiuj Esperanto-novajoj. Ĉiu

artikolo enhavu ne pli ol maksimume 10 liniojn. Prefere eĉ pli mallongaj sciigoj. Kaj la teksto devas esti simpla kaj verkita tiel, ke oni povas facile senpere traduki en la nacian lingvon. Kaj la gazeto devas konstante peti la abonantojn traduki la novaĵojn por siaj lokaj naciaj gazetoj. Plej saĝe estas, ke la tutlandaj asocioj organizas tiun gazetaran servon tiel, ke en ĉiu loko iu persono respondecas pri la informado al la gazetaro.

Ni ankaŭ devas memori, ke nia oficiala organo ne povas enpresii novaĵojn, se oni ne sendas informojn al ĝi. Pro tio mi rekomendas al vi konstante stari en kontakto kun la gazeto.

En kunligo kun tiu pergazeta informado mi ne povas silenti pri treege interesa aranĝo en Svedlando. Temas pri Sved-Internacia Gazetservo, la oficiala sveda oficejo, kiu distribuas novaĵojn pri Svedlando. Antaŭ kelka tempo skribis la ĉefo de tiu oficejo, d-ro B. Brilioth: "La tasko de mia oficejo estas disvastigi konon pri kaj simpatio por mia lando pere de la gazetaro en la tuta mondo. Por plifortigi la laboron mi turnis min al la esperantistoj de Svedlando kaj de aliaj landoj por ricevi helpon distribui la novaĵojn. La rezulto nun estas, ke dank' al sindona, senpaga laboro de multaj esperantistoj la Esperanta eldono de niaj novaĵoj estas dissendata al 30 landoj kaj estas enpresata en la koncernaj gazetoj. Ĉirkaŭ 70 esperantistoj en la tuta mondo nome ricevas la materialon kaj tradukas la artikolojn al la propra lingvo por posta enpresado en la naciaj gazetoj. Ĉu oni tiam povas dubi pri la sindone helpema kaj ideala entuziasmo, kiu vivigas la esperantistojn? Kun dankemo kaj admiro mi esprimas mian konvinkon, ke Esperanto estas unu el la plej promesigaj kaj efektivaj rimedoj por disvastigi la lumon de la internacia kunsento en malluma, disrompita mondo."

Laŭ tiu ĉi eldiro vi komprenas, ke la ĉefo de la sveda Internacia Gazetservo estas tre kontenta pri la Esperantoteldono. Pro tio mi rekomendas ankaŭ al vi en aliaj landoj imiti la aranĝon. Tie kie ekzistas oficiala reklam-oficejo aŭ novaj-centro por la distribuo de enlandaj artikoloj, eluzu la eblecojn! Grave nature estas, ke iu lerta esperantisto en via lando promesas konstantan helpon por traduki la artikolojn Esperanten. En Svedlando oferis sin s-ro verkisto Stellan Engholm, kiu ĉiusemajne faras la tradukojn. Jam dum pli ol du jaroj li senĉese, malegoisme, senrekompence laboris en tiu kampo. Honoron al li!

Koresponda kurso.

Alia rimedo, per kiu oni povas konstante ataki la grandan publikon, estas pere de koresponda kurso. Tia koresponda kurso devas esti amuza kaj facila. Kaj antaŭ ĉio ĝi devas esti malmultekosta! Pro tio estis ĝis nun nur la sveda koresponda kurso, kiu fariĝis populara. La sveda kurso kostis nome nur 1 kr. Ĉiujare pli ol 4,000 personoj mendis tiun kurson! Oni do ne povas tro taksii la propagandan valoron de tia kurso. Por tiu ĉi nova laborsezono la eldonistoj de la kurso, Eldona Societo Esperanto en Stockholm, cetere novredaktis la kurson por fari ĝin ankoraŭ pli alloga al la granda publiko. La nomita societo intencas sendi proponon al aliaj landoj eldoni la kurson ankaŭ por aliaj lingvoj.

Mi volas atentigi pri tio, ke la malalta prezo de la kurso ne forigas ĉiujn eblecojn mongajni pere de la kurso. La svedaj eldonistoj ekz. gajnis ĉiujare inter 100 ĝis 500 kronoj!

Fakaj asocioj.

Kiam oni propagandas Esperanton, oni speciale devas atenti la fakajn asociojn, kaj kompreneble antaŭ ĉio la idealajn asociojn. Pro tio ni devas senĉese trovi eblecojn enpenetri inter la skoltoj, bontemplanoj, pacifistoj, ktp.

Multaj esperantistoj penadas por ricevi tujan venkon de Esperanto en tiuj rondoj per kongresdecidoj ktp. Persone mi tamen ne fidus je tiaj rezolucioj. Ĉar mi multfoje spertis, ke rezolucioj kaj dekretoj valoras tre malmulte. Estas io tute alia, se ekz. en la mondjamboreo de la skoltoj, kiu okazos venontjare en Nederlando, ĉeestas 1,000 skoltoj kiuj kapablas paroli Esperanton kaj kiuj preferas paroli Esperanton. Tiam neniu povas neglekti nian lingvon. Pro tio mi nun faras la proponon, ke en ĉiu lando la enlanda Esperanto-asocio starigu almenaŭ unu premion por skolto, kiu kapablas paroli Esperanton, kaj ke tiu premio konsistos el senpaga vojaĝo kaj senpaga restado en la venontjara mondjamboreo. Prefere la asocioj tamen starigu ekz. 5 tiajn premiojn, laŭ certaj kondiĉoj. Se ni faras tian oferman geston, tiam ni akiras al ni la atenton kaj la dankemon de la skoltasocioj kaj de iliaj gvidantoj. Ni opinias, ke se ni povus tiamaniere kolekti Esperanto-skoltojn el ekz. 10 landoj okaze de la mondjamboreo, ni havus vere grandan estontan utilon! Esperantistoj, ni koncentru niajn fortojn por en tiu ĉi jaro speciale subteni la Esperanto-instruadon inter la skoltoj! Informu nian oficialan organon pri viaj paŝoj tiu ĉi rilate!

Sistema laboro de la Esperanto-organizaĵoj.

Amikoj, imagu, ke vi intencas konstrui novan domon por vi kaj via familio. Kion vi faras plej unue? Jes, vi preparas aŭ preparigas konstruoplanon. Sen antaŭa planado vi nenion komencas. Vi provas ĉiujn detalojn pripensi, por ke la domo estu plej praktika, plej fortika kaj plej konforma je viaj deziroj.

La samon ni devas fari, kiam ni konstruas la Esperantodomon, la Esperanto-organizaĵon! Se ni agas sen antaŭa planado, la rezulto estos fuŝaĵo! Tutcerte. Kaj mi kaj vi tion scias, ĉar ni ĉiuj tion spertis. Ĉu ne? Kaj ĉu ni do ne plibonigu nin!

Ĉiu estraro de loka klubo, nacia asocio kaj internacia ligo devas prepari laborplanon por la venonta sezono! Kaj tiun laborplanon la koncernaj jarkunvenoj devas pritrakti. La plej ĉefa programpunkto de la diversaj jarkunvenoj devas esti ĝuste la traktado de tiu laborplano. Se ni volas iam serioze labori por Esperanto, tiam ni en la jarkunvenoj ĉesu la senfinan diskutadon pri statutoj, paragrafoj kaj personaj atakoj! Nia celo ja estas labori por Esperanto. Ĉu ni do ne plej ĉefe okupu nin ĝuste pri tiu temo, kiam ni kunvenas? Jes!

La junuloj laboru.

Sinjoroj ĉefoj, nun vi do decidis konstrui domon. Kiujn laboristojn vi preferas? Ĉu ne junajn energiplenajn? Aŭ ĉu vi preferas mem ĉion fari, ĉion masoni, ĉion ĉarpentii? Certe ne. Vi dividus la laboron kaj elektas spertajn laboristojn por ĉiu fako. Same pri Esperantodomo. La maljunuloj de nia movado devas doni konsilojn kaj fari sugestojn pri tiu kaj tiu ago, sed kiam estas eble oni elektu pli junajn por efektiviigi la decidojn. Mi scias, ke al la junuloj mankas la multjara sperto kaj ke ili pro tio faras multajn erarojn. Sed antaŭ ĉio ili estas energiaj (bedaŭrinde ankaŭ ekzistas neenergiaj junuloj!), kaj kiam ili faras eraron, la maljunuloj povas korekti ilin. Kaj tiam la junuloj ne devas koleriĝi, sed plibonigi siajn agojn!

Per miaj vortoj mi ne celas tion, ke la maljunaj esperantistoj devas forlasi la gvidon de nia movado. Tute ne. Speciale pro tio, ke ofte mankas taŭgaj junuloj. Sed en tiuj okazoj, kiam montriĝis, ke la movado stagnis, oni devas pripensi, ĉu ne estus saĝe aldoni novan sangon. Ĉar laŭ mi la plej granda peko, kiun oni povas fari al nia movado,

estas lasi la movadon stagni. Stagnado signifas malantaŭen-irado. Sed tion ne toleras nia movado. Ĉiam antaŭen estas ja nia devizo.

Ne estu kontenta pri UNU venko, ne estu fieri pri jam atingitaj rezultoj! Memoru, ke post unu ŝtupo venos alia, denove alia, ankoraŭ alia. Kaj se VI ne kapablas konstante porti la ŝarĝon sur viaj ŝultroj, tuj transdonu ĝin al alia. Sed ne toleru, ke oni metas la ŝarĝon sur iu ŝtupo por ripozi. Ĉiam antaŭen, ĉiam pli supren!

Ĝeneralaj propagand-konsiloj.

Mi rimarkis, kaj certe ankaŭ vi rimarkis la samon, ke la granda publiko pli ŝatas ekzaktajn informojn pri nombro de esperantistoj ktp. ol ĝeneralajn vortojn pri la bono de Esperanto. Pro tio mi konsilas, ke oni ĉiam kiam tio estas ebla, ne nur ĝenerale fanfaronu pri nia lingvo. Kaj kiam oni demandas vin pri la nombro de esperantistoj, klarigu, ke nur malmultaj estas organizitaj. Estas same ankaŭ rilate al aliaj lingvoj. Se homo en via lando lernas fremdan lingvon, tiam li plej ofte ne aliĝas al speciala asocio de la koncerna lingvo. Ne, li lernas la lingvon por praktike uzi la lingvon. Same pri Esperanto. Sed ankaŭ diru, ke inter la esperantistoj estas tiom da fervoraj personoj kiuj promesis propagandi la lingvon, ke ili fondis specialajn klubojn, federaciojn kaj internacian organizaĵon! Tio ja montras tute neordinaran intereson por fremda lingvo.

Mi ankaŭ atentigas vin pri tio, ke vi ne ĉiam inter viaj amikoj propagandu Esperanton, ĉar tiam vi tedas ilin. Nur je certaj okazoj vi informu ilin pri gravaj Esperanto-novaĵoj. Sed en la ĉiutaga vivo vi silentu pri nia lingvo. Portu ĉiam vian verdan stelon, sufiĉas! Iom post iom ili estos scivolaj, kaj ili venos al vi por demandi. Tiamaniere vi plej bone utilis al nia lingvo!

Kion devas fari tutlanda asocio?

La tutlanda asocio devas starigi laborplanon por unu jaro, du jaroj, tri jaroj aŭ kvin jaroj. Tiu plano devas enhavi dezirindan kreskon por la asocio rilate al nombro de kluboj kaj anoj. Prefere oni starigu premion por tiu klubo, kiu akiris la relative plej grandan kreskon. Se la asocio havas propagandan kason, oni aranĝu konkurson inter la kluboj pri monkokolektado al tiu kaso. Ankaŭ tiam ne forgesu fiksi gajnon, premion!

Jam pli frue mi parolis pri koresponda kurso. Aranĝu! Kaj same pri gazetara servo!

Ĉar mi rimarkis, ke multaj lokaj Esperanto-kluboj sufiĉe necerte scias aranĝi la programojn de la Esperanto-kunvenoj, mi rekomendas al la landaj asocioj pretigi modelajn kunvenprogramojn. Tiujn modelprogramojn la asocio dissendu en la komenco de la laborjaro. Bonan helpon tiurilate donas la libreto "La Esperantoklubo" de E. Malmgren. Mi ankaŭ rekomendas franclingvan libron pri la sama temo de s-ro Petit.

Ĉar montriĝis saĝe koncentri la varbadon al Esperanto-kursoj en la tuta lando dum certa semajno, mi rekomendas al la asocioj nomi iun semajnon "Esperanto-semajno." Por helpi la klubojn fari specialan Esperanto-propagandon dum tiu semajno, kiu okazu en la fino de septembro aŭ komenco de oktobro, mi konsilas al la asocio pretigi 3 aŭ 4 taŭgajn gazetartikolojn, kiujn la loka grupo povos enpresigi en la loka gazetaro. Se estas eble la asocio ankaŭ preparu specialan propagandnumeron de la nacia Esperantogazeto. Tiu numero kompreneble devas esti presita nacilingve kaj devas enhavi valorajn artikolojn pri Esperanto, tiel ke la ĝenerala publiko havu imagon pri la taŭgeco de Esperanto por plej diversaj fakoj. La asocio ankaŭ preparu prelegmanuskripton pri Esperanto, kaj la lokaj kluboj uzu tiun manuskripton dum publika propaganda vespero. La publika propaganda vespero enhavu prelegon pri Esperanto kaj cetera muzikon, kanton, eventuale nacilingvan teatraĵon de amatoroj ktp.

La asocio pretigu ankaŭ migrantan ekspozicion de belaj Esperanto-libroj, afiŝoj, broŝuroj ktp. En kelkaj landoj oni jam havas tian migrantan aŭ "flugantan" ekspozicion, kiun oni senpage disponigas por unu semajno al la lokaj kluboj. Oni persvadas iun librovendiston senpage meti la ekspozicion en la montran fenestron. Mi havas la sperton, ke estas sufiĉe facile aranĝebla. Kaj mi asertas, ke la propaganda valoro estas granda. La ekspozicion oni kompreneble ne forgesu dum la Esperanto-semajno!

Se la cirkonstancoj tion permesas, la asocio nepre dungu eksterlandan prelegiston, kiu travojaĝos la landon por fari publikajn paroladojn pri iu temo, prefere turisma temo. Tiu prelego kompreneble ne tuŝu Esperanton, sed la prelegisto ja parolas en Esperanto, kaj tio estas sufiĉa propagando.

Kiam mi parolas pri prelegoj, mi nepre devas tuŝi la proponon, kiun mi antaŭ duonjaro faris al la oficiala sveda turistasocio. Mi nome proponis al ili, ke ili preparu por ni serion de lumbildoj pri Svedlando, kondiĉe ke ni pre-

paru la paroladon pri la sama temo. La turistasocio devigis sin senpage disponigi al ni la nomitajn lumbildojn, kaj la parolado jam estas preta, verkita de nia lerta samideano magistro Karl Söderberg. Nun la tuta materialo estas preta, kaj kiu ajn landa asocio rajtas senpage lui la prelegon, kiu estas vere instrua, interesa kaj bela. La intenco estas, ke la landa asocio faru planon por rondirigi tiun prelegon inter la lokaj kluboj. Kaj ĉar la lumbildoj estas el celuloido kaj ne el vitro, oni ne devas timi, ke la bildoj difektiĝos. Krom tio la tuta bildserio estas sufiĉe malpeza, tiel ke la transportkostoj estos malaltaj.—Mi nun proponas, ke ĉiu alia landa asocio pretigu (se eble per helpo de la registaro aŭ alia oficiala organizaĵo) similan prelegon pri la propra lando. Se ĉiu lando pretigis tian turistprelegon, nia Esperanto-movado povos montri al la ekstera publiko, ke nia lingvo kaj nia organizaĵo estas vere internacia kaj donas veran utilon ne nur al la reklamo por la propra lando sed ankaŭ al ebleco ekkoni aliajn landojn laŭ la okuloj de la enlandanoj. Tuj komencu prepari tian turistprelegon! Mi volonte disponigos specimenon de la celuloida lumbildo, por ke vi sciu kiel aranĝi.

Laŭeble la tutlanda asocio ankaŭ dungu aŭ peradu eksterlandajn instruistojn por la lokaj kluboj. La asocio entute devas zorgi pri tio, ke troviĝos taŭgaj instruistoj por la Esperanto-instruado. Mi do speciale atentigas vin pri aranĝo de instrukcikursoj por Esperanto-instruistoj. Tiaj kursoj prefere okazu dum la somero, kiam multaj homoj libertempas. Kaj oni devas havigi moralan aŭ ekonomian subtenon de kiom eble plej multaj oficialaj kaj neesperantistaj organizaĵoj. En kelkaj landoj oni jam dum pluraj jaroj atingis en tiu medio mirindajn rezultojn. Kaj kun via permeso mi post kelkaj monatoj donos detalajn informojn pri saĝa preparo de tiaj instrukcikursoj. Evidente la diversaj landoj devas agi samtempe kaj sammaniere, ĉar tiam ni poste havos eblecon nin turni oficiale al pluraj ŝtatoj por ricevi apogon de la parlamentoj kaj registaroj. Sed memoru, ke ni mem devas unue prepari la grundon, kaj fari la grundon.

Aranĝu konkursojn!

Se mi demandas vin, kiu idealista movado akiris la plej grandan publikan popularecon, ĉiu el vi respondos: La sportista movado. Kaj vi pravas. La sportistaj eventoj havigis al si ekstreme grandan popularecon. Kial? Nu, kompreneble ekzistas multaj kialoj, sed unu el la plej gravaj estas, ke oni povas tikli la homojn per konkursoj.

Kaj streĉaj konkursoj. Se ni esperantistoj estas saĝaj, ni devas apliki la konkursan emon ankaŭ en nia movado. Kaj nun mi do atentigas vin ĉiujn, landajn asociojn kaj lokajn klubojn: aranĝu konkursojn! Kaj starigu premiojn! Vi povas elekti kiel premiojn ekz. senpagajn vojaĝon al universala kongreso, aŭ pokalon, aŭ medalon ktp. La kluboj povas konkursi inter si pri kresko de membronombro, pri Esperanto-ekzamenoj, pri vendo de propaganda gazeto ktp. Jes, amikoj, kiom da eblecoj! Eluzu ilin!

Ĉar mi ĵus tuŝis la sportan movadon, mi ne povas silenti pri propono, kiun mi faris okaze de la Stokholma kongreso, kaj kiun ĉi jare ripetis la ĝenerala sekretario de la kongreso 1937, nome ke ni devas kunligi kun la Esperanto-kongresoj internaciajn sportkonkursojn. Mi havas la senton, ke ni per tiaj internaciaj Esperanto-sportkonkursoj povus havigi neordinaran atenton al niaj kongresoj kaj samtempe al nia lingvo. Grandiozaj perspektivoj!

La kluboj kaj la asocioj.

La lokaj kluboj devas senti, ke ili havas kontakton kun la nacia centro. Aliflanke la estraro de la tutlanda asocio devas ricevi informojn de la kluboj pri la stato en la lando. Por krei kaj konservi tiun kontakton mi konsilas, ke la landa asocio pretigu presitan formulon por kvaronjara raporto, kaj tiun raporton la lokaj kluboj devas ensendi al la centro ekz. en januaro, aprilo, julio kaj oktobro. La raporto devas enhavi informojn pri la nomoj de la estraranoj de la klubo, pri la membronombro, pri kotizoj senditaj al la centro, pri preleĝoj en la klubo, pri kursoj, pri propagandmanieroj kaj fine ankaŭ eventualajn proponojn al la centro. Mi scias laŭ la spertoj en kelkaj landoj, ke la esperantista vivo komencis vere flori dank' al tiuj devigaj raportoj, ĉar la plej multaj kluboj ja hontas raportoj, ke ili nenion faris! Volonte mi donos detalan proponon pri modela teksto de tia raport-blankedo.

La tutlando asocio sendas al la lokaj kluboj siajn proponojn kaj informojn aŭ pere de la nacia gazeto aŭ pere de multobligitaj cirkuleroj.

Kunlaboro estas necesa.

Kiel vi rimarkis, mi konstante revenas al tiu vorto: Kunlaboru! Kaj per tio mi nun ankaŭ finas: Mia laboro por la internacia propagando, kaj via laboro por la enlanda Esperanto-propagando estas tute dependa de nia kunlaboro. Ni fidu unu la alian! Mi bone konscias pri tio,

ke mi faras erarojn, kaj ke ankaŭ vi faras erarojn. Sed tio ne multe gravas. Tio kio gravas estas, ke niaj faroj montras la bonan intencan.

Mi ankaŭ ripetas, ke vi ĉiam informu la Esperanto-centron pri ĉiuj novaj ideoj, kiujn vi opinias taŭgaj. Ĉiam estu malavara rilate al novaj bonaj ideoj: lasu ankaŭ aliajn personojn, klubojn kaj asociojn eluzi ilin. Ĉio ja estas por nia komuna celo.

Mi ankaŭ petas, ke vi tuj informu la oficialan Esperantogazeton pri ĉiuj venkoj en via loko kaj en via lando. Ĉar via informo pri nova Esperanto-strato, pri subteno de fama persono ktp. certe donos vivigan impulson al la Esperantomovado en aliaj landoj.

Jes, amikoj, batali ni devas—batali kontraŭ niaj malamikoj kaj kontraŭ la indiferentuloj. Sed inter ni devas regi paco, por ke ni povu rezultriĉe kunbatali kaj kunlabori.

Vivu la harmonia internacia Esperanto-kunlaboro!

LIBROSERVO DE I.E.L.

La libroservo de I.E.L. celas havigi al Esperantistoj rapide kaj facile Esperantajn verkojn. La ebla profito estas uzata por plibonigi la servojn de I.E.L.

Kondiĉoj.

1. Kun la mendo oni sendu la koncernan monsumon. Estas akceptataj ĉiuj pagiloj ŝanĝeblaj en bankoj, internaciaj poŝtmandatoj, respondkuponoj, aŭ monbiletoj.
2. Aldonu 10 pro cento por sendelspezoj kaj, se dezirata, 3p. por rekomendo.
3. Ni rezervas la rajton ŝanĝi prezojn sen antaŭa avizo—ĝenerale pro la ŝanĝigantaj kurzoj.

La Angla Monsistemo.

12 pencoj = 1 ŝilingo. 20 ŝilingoj = £1.

La prezoj en ĉi tiu listo estas laŭ la angla monsistemo. Kalkulu la prezojn laŭ la taga kurzo legebla en vialanda ĵurnalo.

LIBROLISTO N-ro 2. MARTO, 1937.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

HERONSGATE, RICKMANSWORTH (HERTS.) ANGLUJO

LERNOLIBROJ EN ESPERANTO.

	ŝ.	p.
Ĉiutaga Vivo, La. A. Kengott	1	0
Esperanta Interparola Kurso Linguaphone (kun vortaroj Angla, Franca, Germana, Itala, kaj Hispana). broŝ. 2ŝ. 6p.; bind.	3	6
Esperanto por Infanoj. G. G. Solomon ..	1	6
Fundamento de Esperanto. D-ro Zamenhof..	1	6
Gaja Lernolibro. C. Walter	1	9
Ilustrita Lernolibro de Esperanto. D. Dalmau	1	0
Internacia Frazaro. A. Kengott	1	3
Kursa Lernolibro. Privat	1	0
Lingvo, Stilo, Formo. K. Kalocsay broŝ. 2ŝ. 3p.; bind.	3	0
Nova Gramatika Libro. A. Stamatidis ..	4	0
Parnasa Gvidlibro. Kiel fariĝi poeto. Kalocsay kaj Waringhien broŝ. 3ŝ.; bind.	5	0
Petro. Laborista lernolibro	1	6
Plena Gramatiko de Esperanto. Kalocsay kaj Waringhien. broŝ.	8	0
Supera Kurso de Esperanto. D-ro L. Dreher ..	1	6
Tra la Jaro. Lucy E. Waddy	2	0

LERNOLIBROJ EN ALIAJ LINGVOJ.

Angla. The Esperanto Home-Student. J. Robbie.	6
Esperanto in Outline. R. A. M. Kearney ..	6
Step by Step in Esperanto. M. C. Butler broŝ. 1ŝ. 6p.; bind.	2 6
Franca. Esperanto en Dix Leçons. Th. Cart ..	1 0
Germana. Das Leichte Esperanto. Jung kaj Wingen	1 6
Hispana. Doce Lecciones. F. Azorin	1 0
Itala. Grammatica Completa di Esperanto. L. Cattorini	2 0
Sveda. Praktisk Larobok i Esperanto	2 0

VORTAROJ.

Angla. Edinburgh Pocket Dictionary. Esp.-Angla;	
Angla-Esp. bind.	2 6
Fulcher & Long. Angla-Esp. .. bind.	7 6
Millidge. Esp.-Angla bind.	8 6

	ŝ.	p.
Franca. Vocabulaire de Poche. Fr.-Esp.; Esp.-Fr. Bastien	1	0
Manuel de Conversation. Angla, Franca, Germana, Hispana, Itala, Dana, Nederlanda, kaj Esperanta	8	
Plena Vortaro de Esperanto. E. Grosjean-Maupin bind.	12	0
Ŝlosiloj:		
Angla, Finna, Germana, Kimra po	1	
Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Flandra, Franca, Hispana, Hungara, Itala, Japana, Kroata, Rusa, Slovaka, Sud-Afrika, Sveda po	2	
Albana, Islanda, Juda, Latva, Nederlanda, Norvega, Romanĉa po	3	
Bulgara, Greka, Portugala, Rumana .. po	4	
Malaja, Ukraina po	5	
Araba, Slovena po	6	
Persa	8	

LINGVO KAJ HISTORIO.

Enciklopedio de Esperanto. Red. Kokeny kaj Bleier bind. 2 volumoj	30	0
En unu vol., sen ilustraĵoj bind.	18	0
Fremdvortoj en Esperanto. P. Neergaard ..	1	6
Gvidilo tra la Esperanto-Movado. G. P. de Bruin	1	3
Hector Hodler. Lia vivo kaj lia verko	3	0
Historio de la Lingvo Esperanto. Privat. Parto 1. bind.	3	3
„ 2. bind.	6	9
Historio de la Mondolingvo. E. Drezen ..	6	0
Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof	1	0
Vivo de Zamenhof. Privat. Ilustrita .. broŝ.	3	0
Vojoj de Formiĝo kaj Disvastiĝo de la Lingvo Internacia. Drezen	6	

LITERATURO (PROZAJŬOJ)

(Vidu ankaŭ paĝojn 93—95).

	ŝ. p.
Alegorioj el la Naturo. Gatty (Gordon) ..	3
Al Torento. Stellan Engholm	1 6
Amo en la Jaro Dekmil. El. C. Ignotus (F. Berenguer)	broŝ. 4 6
Anni kaj Montmartre. R. Schwartz	3 9
Anstataŭa Edzino. E. Maxwell (M. Sampson). broŝ. 3ŝ. 6p. ; bind.	5 0
Arthistorio. A. Hekler (K. Kalocsay) .. bind.	13 6
Auli (Rakonto pri knabeto) H. Adamson broŝ. 1ŝ. 6p. ; bind.	3 0
Aŭstralio—Lando kaj Popolo. Delsudo kaj Laiho bind.	6 6
Barbro kaj Eriko. A. Schneider kaj M. Carlsson ..	9
Bela Joe. Marshall Saunders (Blaikie & Hohlov) broŝ. 2ŝ. 6p. ; bind	3 6
Belga Antologio. (2 volumoj)	broŝ. 8 0
Blua Sango. Willy Wood. (W. van Zoest) ..	1 9
Cezaro. M. Jeluŝiĉ (I. Rothviĉ)	bind. 10 0
Ĉapejev. D. Furmanov	4 9
Ĉeĥoslovaka Antologio. O. Ginz & S. Kamaryt. broŝ. 10ŝ. 6p. ; bind.	12 0
Ĉinaj Noveloj. O. Erdberg (P. Gavrilov) ..	1 0
Ĉirkaŭ la Mondon kun la Verda Stelo. J. R. Scherer.	bind. 6 0
Ĉu ĝi estas nur Fabelo? Jan (R. Dabrowski) ..	4 6
Ĉu vi aŭdis tion? S. Grenkamp-Kornfeld ..	1 6
Dancu Marionetoj. Julio Baghy. broŝ. 3ŝ. ; bind.	5 0
De Paĝo al Paĝo. L. Totsche. broŝ. 2ŝ. 3p. ; bind.	3 6
Du Majstro-Noveloj. T. Storm (H. Heitmuller) bind.	5 0
Du Noveloj. (El la Czech). Sumin : Svobodova ..	2 6
El la Notlibro de Praktika Esperantisto. K. R. C. Sturmer	broŝ. 2ŝ. 3p. ; bind. 3 6

El la "Verda Biblio." I. Lejzerowicz	ŝ. p. 1 6
"El Verdavalo," 1-3	1 3
En Okcidento Nenio Nova. E. M. Remarque. broŝ.	5 6
Esperantaj Historietoj I. Peter Frey	1 0
Esperanta Legolibro. B. kaj E. Migliorini ..	1 6
Estona Antologio	3 6
Fabeloj de Andersen. Trad. D-ro L. L. Zamenhof. Partoj 1, 2 & 3, po	1 9
Fabloj de Ezopo. K. Ossaka	8
Facilaj Esperantaj Legajoj. G. Waringhien ..	1 6
Facila Legolibro. Red. K. R. C. Sturmer ..	1 0
Faraono, La. Prus (Kabe). Volumoj 1, 2 & 3, po	2 6
Fera Kalkanumo, La. Jack London (G. Saville) ..	4 6
Firetojoj. (Porinfanaj Rakontoj)	2 6
Fokso-Nukso. Ignat Hermann (M.E.P.) ..	2 0
Fundamenta Krestomatio. Zamenhof. broŝ. 3ŝ. 3p. ; bind.	4 0
Gaja Knabo. Björnson (Sandberg & Johansen) ..	1 9
Gösta Berling. Selma Lagerlöf (Stellan Engholm) broŝ. 7ŝ. 6p. ; bind.	9 0
Hindo Rigardas Svedlandon. L. Sinha broŝ. 4ŝ. 3p. ; bind.	5 9
Homo de Dio. Jan Vrba	2 0
Homoj sur la Tero. Stellan Engholm broŝ. 3ŝ. 6p. ; bind.	5 0
Hungara Antologio. Red. K. Kalocsay .. bind.	12 6
Ilustritaj Rakontetoj. Kengott	1 0
Infanoj de Betlehem, La. Selma Lagerlöf (O. Frode)	1 0
Infanoj en Torento. Stellan Engholm broŝ. 2ŝ. ; bind.	3 0
Internacia Dialogaro	1 6
Internacia Legolibro. A. Kengott	2 0
Interrompita Kanto, La. Orzesko (Kabe) ..	1 0
Irisis. H. 'T. Sas (P. Ch. M. van de Vijver) ..	1 9
Islando. O. Kristjansson	2 6

	ŝ.	p.
Jaĉjo Holm kaj Liaj Amikoj. Van de Hulst (Van Leeuwen) bind.	7	0
Jane Eyre. C. Brönte (H. Bulthuis) broŝ. 5ŝ. ; bind.	7	6
Jarmiloj Pasas. H. Haefker. Vol. 1 & 2 po	8	0
Jimmie Higgins. Upton Sinclair (K. Fröding) broŝ. 4ŝ. ; bind.	5	6
Juneco kaj Amo. E. S. Payson broŝ. 6p. ; bind.	1	0
Kandid. Voltaire (E. Lanti)	3	0
Kapitan-Filino. Puŝkin (Ŝidlovskaja)	1	6
Kaptitaj en Nubio. H. Sienkiewicz (van Zon) broŝ. 3ŝ. ; bind.	4	6
Karavano, La. Hauff (Eggleton) broŝ. 6p. ; bind.	1	0
Karlo. E. Privat	9	
Karto Mistera, La. Moffett (Payson)	4	
Kataluna Antologio. J. G. Casas	6	9
Kiel fariĝi kreanto facile kaj rapide. Petro Den (M.E.P.) bind.	5	0
Kompatinda Klem. J. Merchant broŝ. 1ŝ. ; bind.	1	6
Kudlago : La malgranda Eskimo. N. van Hichtum (S. D. Mannoury)	1	0
5,000,000. Novelaro. S. Grenkamp	1	6
Landoj de l'Fantazioj. T. Jung bind.	6	6
Legolibro de Esperantaj Fabeloj. J. Ŝimomura	8	
Legolibro por Novaj Esperantistoj. G. Gaŝevski	1	0
Leono de Flandrujo, La. H. Conscience (H. J. Bulthuis) bind.	6	6
Leteroj al Juna Poeto. R. M. Rilke (A. Münz) bind.	1	6
Lilio. Sinnotte bind.	1	6
Longa Vojo, La. R. Meye broŝ.	3	0
Marta. Orzeszko (Zamenhof)	3	9
Maŝinfabrika N. & K. V. Bredel (A.S.)	2	6
Merkado la Azenpelisto. N. Jeruŝalmi, bind.	4	0
Metropoliteno. V. Varankin	4	9
Mia Vojaĝo en Sovetio. A. Slonimski (S. Grenkamp-Kornfeld) broŝ. 3ŝ. ; bind.	4	0
Mi en Li. Ladislav Vladyka (M.E.P.) duone bind.	4	6

	ŝ.	p.
Mr. Tot aĉetas mil okulojn. Jean Forge broŝ. 3ŝ. 9p. ; bind.	5	3
Mizantropo, La. Prof. H. Boucon	2	3
Mono de Sinjoro Arne, La. S. Lagerlöf (S. Engholm)	1	9
Morea Perlo, La. D. Simson (R. Delpasko)	1	9
Multekolora Libro, La. Diversaj	2	3
Nekonata Konato, La. D. P. Boatman broŝ. 2ŝ. 6p. ; bind.	5	6
Norda Literaturo. Red. T. Indra. Vol. 1 kaj 2, po	1	0
Noveloj. K. M. Ĉapek-Chod (M.E.P.)	2	6
Oduseias de Homeros. El la antikva greka lingvo trad. W. J. A. Manders bind.	8	6
Ok Noveloj. A. Bennett. (Wackrill)	6	
Originala Verkaro. L. L. Zamenhof bind.	13	6
Palaco de Dangero, La. Wagnalls (Payson) bind.	6	6
Pallietter. F. Timmermans (J. van Schoor) bind.	6	0
Pentroarto en la Malnova Hungarujo, La. G. Istvan (Ŝzilagyí) bind.	10	9
Per Balono al la Poluso. Andrée, Strindberg, Fraenkel (Engholm) broŝ. 10ŝ. ; bind.	13	6
Pola Folkloro kaj Popolkanto. S. Grenkamp	1	9
Por Recenzo! K. R. C. Sturmer broŝ. 1ŝ. ; bind.	1	6
Praktika Gvido de la Korespondo en Esperanto. Y. H. Ishiguro bind.	6	0
Pri l'Moderna Arto. S. Grenkamp-Kornfeld & J. Brzckowski broŝ. 4ŝ. 6p. ; bind.	6	3
Printempo en la Aŭtuno. J. Baghy	2	0
Progreso kaj la Pasinteco. G. F. Wates (W. Bailey) bind.	3	6
Pro Iŝtar. Luyken bind.	5	3
Proverbaro Esperanta. Zamenhof	1	6
Rabeno de Baĥaraĥ. Heine, kaj La Gimnazio. Ŝalom Aleĥjem (Zamenhof)	1	6
Rembrandt, La Magiisto. M. Muller bind.	5	6

	ŝ.	p.
Romano de San Michele. Axel Munthe (J. Weleminsky) broŝ. 7ŝ. 6p.; bind.	9	0
Romano pri Afrika Bieno. Olive Schreiner (S. A. Andrew) broŝ. 4ŝ. 6p.; bind.	6	0
Romo kaj Ĉirkaŭaĵoj bind.	6	6
Rumana Bonhumoro. Firu & Pragano broŝ. 1ŝ. 6p.; bind.	2	6
Saltego trans Jarmiloj. Forge bind.	5	0
Se Grenereto. Kenelm Robinson broŝ. 3ŝ. 6p.; bind.	6	0
Sorĉistino de Kastilio, La. Salom Asch (I. Lejzerowicz) bind.	4	6
Stranga Heredaĵo. Luyken broŝ. 3ŝ.; bind.	4	0
Stranga Idilio. Bates (Harris)	3	
Sub la Vitra Kupolo. V. L. Van Weddingen (M. Groels)	1	9
Submarinistoj, La. Novikov-Priboj (E. Blinov) ..	1	9
Surprizoj. Ina Boudier-Bakker bind.	5	6
Sveda Antologio. Red. Jansson, Beckman & Lenner Vol. 1; bind.	7	6
.. .. Vol. 2; bind.	6	0
.. .. ambaŭ volumoj kune, bind.	12	0
Teatra Korbo, La. Julio Baghy	2	3
Trans la Fabeloceano. Szilagyi. broŝ. 2ŝ. 9p.; bind.	4	3
Tra Sovaĝa Kamĉatko. Bergman (Gerdman) broŝ. 5ŝ.; bind.	6	9
Tri Angloj Alilande. J. Merchant	1	0
Tridek Jarojn en la Ora Nordo. Jan Welzl bind.	5	6
Tri Homoj en Boato. J. K. Jerome (G. Badash) broŝ. 4ŝ. 3p.; bind.	5	6
Turstrato 4. Hans Weinhengst broŝ. 3ŝ. 6p.; bind.	4	6
Unua Legolibro. Kabe	2	0
Vagabondo kaj Sinjorino. Kloepffer (Goppel) broŝ. 4ŝ. 6p.; bind.	6	0
Verdaj Donkiĥotoj. Julio Baghy duone bind.	4	6
Verkoj de Fez. Felix Zamenhof. broŝ. 5ŝ. 9p.; bind.	6	9

	ŝ.	p.
Viktimoj. J. Baghy broŝ. 4ŝ. 6p.; bind.	8	0
Vivo de Arnaldo. Benito Mussolini (K. Kalocsay) broŝ. 2ŝ.; bind.	3	6
Vojo Returne, La. E. M. Remarque (J. F. Berger) broŝ.	9	0
Vortoj de Prof. Cart	2	3
Zamenhofa Legolibro. Kidosaki	1	3

LITERATURO (DRAMO KAJ POEZIO).

	ŝ.	p.
Amo estas pli forta ol Morto. J. Rainis (Ints Ĉaĉe)	2	3
Dekdu Poetoj. Red. K. Kalocsay broŝ. 2ŝ. 3p.; bind.	3	9
Dialogoj kaj Komedietoj. Einar Dahl	8	
Eterna Bukedo. Kalocsay broŝ. 8ŝ. 3p.; bind.	10	6
Georgo Dandin. Molière (Zamenhof)	1	3
Hamleto. Shakespeare. (Zamenhof)	1	3
Ifigenio en Taŭrido. Goethe (Zamenhof)	2	3
Infero. Dante (Kalocsay) broŝ. 8ŝ.; bind.	10	0
Internacia Teatraĵaro. Kengott	1	0
Jes, Panjo! (Unuakta komedio). D. P. Boatman ..	5	
Kurioza Okazaĵo. Carlo Goldoni (Mevo)	2	0
Miniaturtoj. G. D. Nash bind.	1	6
Natan la Saĝulo. Lessing (Minor)	1	6
Pasko. A. Strindberg (S. Engholm)	1	9
Pilgrimo. Julio Baghy broŝ. 2ŝ.; bind.	3	0
Preter la Vivo. J. Baghy broŝ. 2ŝ.; bind.	3	0
Rabistoj, La. Schiller (Zamenhof)	2	6
Reĝo Judea, La. K.R. (V. Devjatnin)	2	6
Reĝo Lear, La. Shakespeare (Ashley & Curry) ..	2	6
Revizoro, La. Gogol (Zamenhof)	2	0
Rimportretoj. K. Kalocsay	2	0

	ŝ. p.
Romaj Elegioj : La Taglibro. Goethe (Kalocsay) broŝ. 2ŝ. ; bind.	3 0
Sonĝo de Someromeza Nokto. Shakespeare (Briggs)	6
Spite la Vivon. Misu Beraru	9
Stranga Butiko, La. Schwartz	3 9
Streĉita Kordo. K. Kalocsay broŝ. 3ŝ. 9p. ; bind.	5 0
Verdkata Testamento. R. Schwartz	1 6

LA BIBLIO.

La Biblio. Bele bindita, ordinara papero ..	6 0
Bele bindita, maldika papero ..	8 6
Lede bindita, „ „ ..	12 6
Bindita en persa ledo, maldika papero ..	20 0
Johano, Evangelio laŭ Sankta	1
Marko, Evangelio laŭ Sankta	1
Nova Testamento, La. Fortike broŝ.	6
Bindita	1 0
Bindita, maldika papero	2 0
Lede bindita, „ „	3 0
Bindita en persa ledo, maldika papero ..	6 0
Psalmaro, La	4

RELIGIO KAJ FILOZOFIO.

Budao. P. L. Narasu (T. Tookiĉi)	1 0
En Harmonio kun la Eterneco. Trine	1 6
Esperdona Islando. J. de Vreese (Fr. Floriano) ..	6
Etiko. P. Kropotkin	2 0
Himnaro Esperanta. (Butler). 212 himnoj. fortike broŝ. 1ŝ. 6p. ; bind.	2 0
Juda Ŝtato, La. D-ro T. Herzl (B. Selzer) .. bind.	3 9
Kvakerismo, Fundamentoj de la. Stephen (Butler)	1 0

Kvin Paroladoj. Henry Drummond (A. T. Maling)	2 0
Preĝareto (Katolika). Carolfi	8
Vivo de Nia Sinjoro Jesuo, La. Charles Dickens (Butler) bind.	5 0

SOCIOLOGIO KAJ POLITIKO.

Ĉu Socialismo konstruiĝas en Sovietio. E. Lanti & M. Ivon	1 0
Fundamentoj de Leninismo. J. Stalin (G. Stellih)	1 6
Interpopola Konduto. Edmond Privat broŝ. 3ŝ. ; bind.	4 3
Je la Nomo de l'Vivo. E. Izgur	3 0
Pol-Pomeranio. Smogerzewski (Grenkamp) ..	1 9
Progresado kaj la Pasinteco. G. F. Wates (W. Bailey) bind.	3 6
Ŝtato kaj Revolucio. N. Lenin (G. Demidjuk) ..	1 8

KOMERCO, SCIENCO, KAJ TEKNIKO.

El la Mondbildo de l'Nova Fiziko. Reiche (Muravkin)	8
Enkonduko en la Pedagogion. Sakaria	6
Evoluo de la Telefonio. Isbrucker	9
Filozofia Vortaro. D-ro Stan. Kamaryt, duone bind.	3 6
Fine mi komprenas la Radion. E. Aisberg broŝ. 4ŝ. ; bind.	5 6
Grekaĵaj Papirusoj. Penndorf	9
Homaj Rasoj de la Mondo, La. R. Nordenstreng broŝ. 3ŝ. 9p. ; bind.	5 6
Homa Lingvo, La. Collinson	1 6
Kemio de l'Universo. Fersman (Rublev) ..	1 0
Komerca Vortaro en Esperanto. Kreuz & Mazzolini	3 0
Medicina Vortaro, Esperanta teknika. D-ro Briquet bind.	12 0
Pri la Origino de l'Homo. Sir A. Keith (Brown & McCormick) broŝ. 1ŝ. ; bind.	1 9

	ŝ. p.
Raporta Stenografio. Pitman (Butler)	4 0
broŝ. 2ŝ. 6p. ; bind.	
Scienca Fundamenta Esperanto-Terminaro.	8 0
Rollet de l'Isle	
Sekspsikologio.	10
Seslingva Vortaro de Medikamentoj	4 9
Universala Terminologio de la Arkitekturo.	8 0
F. Azorin	
Vojo al Scienco de Estonto, La. A. Fersman	9

DIVERSAĴOJ.

B.E.S. Adresaro. (Adresoj de Korespondantoj)	1 6
Esperanto-Klubo, La. E. Malmgren	8
Kan-U-go. Tre bona kart-ludo	2 6
Kiel aranĝi kursojn kaj grupvesperojn. W. Wingen	8
Lexicon. Tre bona kart-ludo	2 6
I.E.L. insignoj. Broĉo aŭ butono	10

KANTOJ.

Esperanta Kantokolekto. J. H. Vink (kun muziko)	10
Esperanto. H. Hill	2
(kun muziko)	
Espero, La. Menil	3
(kun muziko)	
Kantaro Esperanta. M. C. Butler (357 kantoj)	
fortike broŝ.	1 6
Kantu Ni!	6
(kun muziko)	
Leono estas best! W. M. Appleby (kun muziko)	1
Skoltaro Tutmonda. A. Poyser (kun muziko)	6
Vera Frataro, La. H. Hill	2
(kun muziko)	
Vivu Esperanto. Blaikie & Saxton (kun muziko)	2

GRAMOFON-DISKOJ.

La "Home-Student" Diskoj. Serio da 6 diskoj por instrui la elparolon, en albumo. Prezo 10 ŝil., afranko alilanden 9p., enlanden 6p. Lernolibro "The Home-Student," 6p., afranko 1p.

POPULARA ESPERANTO-BIBLIOTEKO

Bonaj libroj, bele eldonitaj kaj binditaj,
prezo nur 3ŝ. 6p. plus afranko 6p.

La jenaj libroj jam aperis :

1. **La Viro el Francujo.** Ivans (W. Versteeg Grafdijk).
2. **Quo Vadis** (Vol. I.) H. Sienkiewicz (Lidja Zamenhof).
3. **Quo Vadis** (Vol. II.) H. Sienkiewicz (Lidja Zamenhof).
4. **Ŝi.** Rider Haggard (G. J. Degenkamp).
5. **Fanny.** Edna Ferber (Berno Fabo).
6. **Riĉa kaj Sen Mono.** E. P. Oppenheim (F. E. Wadham).
7. **La Ora Ŝtuparo.** E. P. Oppenheim (Romford Esp. Societo).
8. **Luno de Izrael.** Rider Haggard (Payson kaj Butler).
9. **Pinokjo.** C. Collodi (M. Marchesi).
10. **La Dormanto Vekiĝas.** H. G. Wells (A. F. Milward).
11. **Petrolo** (Vol. I.) Upton Sinclair (W. Bailey).
12. **Petrolo** (Vol. II.) Upton Sinclair (W. Bailey).
13. **La Aventuroj de Marteno Drake.** G. Norway (W. Severn).

Aliaj sekvos po du dum ĉiu jaro.

Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LIMITED

Aĉeteblaj ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO
HERONSGATE, RICKMANSWORTH (HERTS.) ANGLUJO

INTERNACIA MONDLITERATURO.

Po 1ŝ. por ĉiu numero ; afranko po 2p.

1. **Hermano kaj Doroteo.** J. W. v. Goethe. El la Germana tradukis Benno Küster.
2. **Legendoj.** A. Niemojewski. El la Pola tradukis Bronislaw Kuhl.
3. **Elektitaj Noveloj.** I. S. Turgenev. El la Rusa tradukis Alexandra Mexin.
4. **La Nigra Galero.** Wilhelm Rabe. El la Germana tradukis Prof. D-ro Fritz Wicke.
5. **El la "Camera Obscura."** Hildebrand. El la Holanda tradukis H. C. Mees.
6. **El la Skizlibro.** Washington Irving. El la Angla tradukis H. L. Elvin.
7. **La Mirinda Historio de Petro Schlemihl.** Adelberto de Chamisso. El la Germana tradukis Eugen Wüster.
8. **Nuntempaj Rakontoj.** G. P. Stamatov. El la Bulgara tradukis Ivan H. Krestanoff.
9. **Hebreaj Rakontoj.** Salom-Aleĥem Perc. El la Hebrea tradukis Is. Muĉnik.
10. **Tri Noveloj.** A. S. Puŝkin. El la Rusa tradukis D-ro Andreo Fiŝer.
- 11, 12. **Deklaracio.** T. Ariŝima. El la Japana tradukis T. Tooguu.
13. **Ses Noveloj** el "Rakontoj de Mistero kaj Imago." E. A. Poe. El la Angla tradukis A. Frank Milward.
14. **La firmao de la kato kiu pilkludas.** H. de Balzac. El la Franca tradukis Paul Benoit.
15. **Orientaj Fabeloj.** Vlas Doroŝeviĉ. El la Rusa tradukis Nikolao Hohlev.
16. **Noveloj.** H. Sienkiewicz. El la Pola tradukis Lidja Zamenhof.

17. **Insulo de Feliĉuloj.** A. Strindberg. El la Sveda tradukis Oskar Frode.
18. **Barbaraj Prozaĵoj.** Prudenci Bertrana. El la Kataluna tradukis Jaume Grau Casas.
19. **Ano de l'Ringludo.** Dinko Ŝimunoviĉ. El la Kroata tradukis Fran Janjiĉ.
20. **Servokapbla : Marcus Tybout.** G. Eekhoud. El la Franca tradukis Léon Bergiers.
21. **Nobela Peko.** Mihail Sadoveanu. El la Rumana tradukis Tiberio Morariu.

SUBTENU NIAN
LITERATURON!
HAVIGU PROPAN
BIBLIOTEKON!

I. E. L. liveras al vi ĉiun
ESPERANTO-LIBRON
je originala prezo.

KIEL LA BLINDULO

trovanta la vojon nur en la stratoj konataj, tiel ankaŭ vi trovas la bonan solvon por la problemoj de nia lingvo post studado de multaj verkistoj dum multaj jaroj. Sed por ŝpari al vi penojn kaj energion, por dediĉi tiujn al aliaj celoj, vi bezonas

CERTAMANAN KONDUKANTON

Sen tia ankaŭ vi perdas tre multan energion. Kiel la blindulon, kiu ne sentas la emocijon de la travagataj trankvilaj stratoj aŭ la multfacetan, tumultan vivon de la grandurbaj bulvaroj, ankaŭ vin lasas senemocije la nevidataj belajoj en konstruo de nia lingvo.

VIDANTAJ OKULOJ

estas por li kaj por vi la plej granda trezoro. Li ricevas ilin malofte kaj tro kare. Sed por vi ja troviĝas

LA PLEJ MALKARA SOLVO

POR GUI LA BELOJN,

kiujn malkovras al ĉiu vidanto nia lingvo. Kiel la kondukanto nian amikon blindulon, tiel vin gvidas tra la labirintoj de

LA PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO

la senkompare utila kaj kompleta verko de K. Kalocsay kaj G. Waringhien.

DUM UNU JARO DU ELDONOJ

pruvas plej elokvente, ke multaj samideanoj sekvis nian konsilon kaj fariĝis vidantoj rilate la kaŝitajn trezorojn de nia lingvo, ĝis nun ja sekvitajn, sed tamen ne konsciitajn.

LA DUA ELDONO

pli ampleksa ol la unua, ĉirkaŭ cent paĝojn, entute sur 470 grandformataj paĝoj prezentas al vi facile, kolekte, senpere la

RESPONDOJN

AL VIAJ DEMANDOJ PRI GRAMATIKO

en scienca, tamen facila formo. Por malalta prezo vi povas aĉeti tiun valoregan verkon ĉe ĉiu esperantista librovendisto.

Eldonis "Literatura Mondo," Bleier Vilmos,
Budapest, IX., Soroksári ut 38.

Prezo: broŝurita U.S.A. dol. 2.60
bindita U.S.A. dol. 2.90
lukse bind. U.S.A. dol. 3.50

Aldonu 10% por sendkosto

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN VIENO

La ideon pri kreo de Internacia Esperanto-Muzeo mi ricevis legante artikolon de Leono Zamenhof en Heroldo de Esperanto en 1927.

Hejmenveninte de Danzig-a Universala Kongreso de Esperanto mi tuj komencis prepari la kampon, por starigi la Muzeon en Vieno. Kun kelkaj samideanoj mi fondis la leĝe necesan asocion I.E.M.W. Unue mi sukcesis interesigi la tiaman policprezidanton, postan kancelieron d-ron Schober kaj tuj poste la tiaman kancelieron prelaton d-ron Ignaz Seipel, kiuj eniris la Honoran Komitaton kaj per tio helpis miajn unuajn paŝojn.


Dornoplena estis la vojo, kiun mi devis iri ĝis hodiaŭ. Laŭ registara ordono mi ricevis unue ne bone taŭgan ejon en palaco en Liebiggasse 5 kaj post multaj klopodoj du ejojn en palaco Annagasse 4.

1928 mi eklaboris kun s-ano Weber, kiu restis ĝis hodiaŭ mia fidela kunlaboranto. Diversaj oficialaj instancoj pruntis al mi diversajn meblojn kaj per mondonacoj de la jam mortinta meceno Falnbigl estis eble, aĉeti la necesajn laborilojn. Ni mem devis dumvintre ekhejti la fornon kaj ankaŭ iomete frostsuferi, por ŝpari la monon por la karboj.

Ankoraŭ en la sama jaro mi sukcesis aranĝi, ke la mondfama National-Bibliothek (Nacia Biblioteko), iama imperiestra, akceptis nin kiel specialkolekton, tiamaniere certigante por eternaj tempoj la ekzistadon de la Muzeo.

En Oktobro, 1929, ni translokiĝis en du ejojn de Nacia Biblioteko en Augustinerstrasse. Alvenis la unuaj hirundoj: Biblioteko de Unua Esp.-Unuiĝo en Vieno kun 700 libroj kaj biblioteko de Franz Josef Schade kun 600 libroj. Sed la du ejoj ne sufiĉis kaj fine de Julio, 1930, ni ricevis novan belegan hejmon en Neue Burg (Nova imperiestra kastelo).

La 1 de Aŭgusto, 1929, la Aŭstria Federacia Prezidanto s-ro Wilhelm Miklas, protektoro de la Muzeo, en ĉesto de multaj altrangaj personoj kaj de 700 gegastoj esperantistaj el 30 landoj inaŭguris simbole Internacia Esperanto-Muzeon en la mondfama pompa salonego de Nacia Biblioteko.



La hejmo de I.E.M.W. estis instalita de la ŝtato kun kostoj de 9,000 sv. fr. kaj mi kolektis el la tuta mondo jam proksimume 10,000 librojn, broŝurojn, pli ol 1,000 gazetarkolektojn, fotojn, prospektojn, gvidfoliojn, afiŝojn, flugfoliojn ktp., ĉar ĉio havas intereson por ni.

En 1936 je Pasko la estraro de U.E.A. okaze de la decidita translokiĝo al Londono decidis ankaŭ la translokiĝon de la Biblioteko de U.E.A. al Wien, kie ĝi trovu por eternaj tempoj indan lokon kaj estu ĉiam je la dispono de la Esperantistoj.

La decido estis transdonita al la protektoro, la Federacia Prezidanto de Aŭstrio kaj je peto de mi la Muzeo ricevis belegan apudan eĵegon de 300 kvadratmetroj per helpo de nia Federacia Kanceliero d-ro von Schuschnigg kaj la Ministro por Komercio kaj Trafiko Fritz Stockinger.

Sed kelkaj samideanoj en Svislando protestis kontraŭ la translokiĝo ankaŭ de la biblioteko al Wien. Mi nun petas niajn samideanojn en la tuta mondo, ke ili donacu tion el siaj Esperanto-havaĵoj, kion ili opinias bona por la Muzeo. Vi ankaŭ povas sendi unue liston de la sendotaĵo kaj ni respondos, ĉu ni jam posedas la donacotaĵon.

Sed vi povas ankaŭ helpi mone, por ebligti la daŭran funkciadon de la Muzeo, fariĝante "Dumviva Membro" kontraŭ unufoja pago de sv. fr. 16.—aŭ egalvaloro, ankaŭ pageblaj en 4 partpagoj. Vi ricevos membrokarton,

60-paĝan gvidlibron tra Wien kaj 80-paĝan gvidlibron "Tra Aŭstrio per aŭto," ambaŭ kun multaj bildoj, krome diversajn fotojn pri la Muzeo, numeron de gazeto "Aŭstria Esperantisto," en kiu la nova membro estos citata, gvidfoliojn.

Ĉe demandoj bonvolu ĉiam aldoni respondafrankon.

Sendajojn al Int. Esperanto-Muzeo, Wien, I. Neue Burg, Aŭstrio, ne al mia adreso.

Neniu preterlasu viziti la Muzeon, kiu estas je via dispono ĉiu labortage de 8 h—18 h.

Kortega konsilisto Hugo Steiner,
fondito kaj direktoro.

La Bordoĵoj de la Seino en Parizo

estas famaj pri siaj libro-brokantistoj, kiuj vendas librojn uzitajn por tre malkara prezo.

Tiun taskon en Esperanto nun surprenis sur sin

LIBRO—AĈETA ORGANIZAĴO

kiu fondiĝis ĉe Literatura Mondo por aĉeti kaj vendi uzitajn esperantajn librojn.

Por havi malkarege bonan esperanto-bibliotekon postulu tuj prospekton de la

LIBRO—AĈETA ORGANIZAĴO

(L.A.O.)

ĉe Literatura Mondo,
BUDAPEST IX. SOROKSÁRI-UT. 38,
HUNGARUJO

Aĉetas opajn librojn kaj tutan bibliotekon

ELDONEJO-LIBROVENDEJO

N. SZAPIRO

Warsawa, Nowolipki 8, Polujo.

Poŝtĉekkonto: Warszawa 16,562

	rekomendas:	zloty
Leono Vienano. Esperanto per Esperanto	polaj	
<i>mond-fama kaj rektmetoda lernolibro)</i> ..		1.75
N. Jeruŝalmi. Merkato la azenpelisto.		
<i>Grandioza romano</i> ..	Broŝurita ..	3.50
	Tole bindita	5.00
E. Miĥalski. Kantoj de l'amo kaj sopiro ..		1.20
D-ro S. Chazan. Socialismo, ĝia ideologio		
kaj realigo. <i>Popularsciencia traktato</i> ..		1.20
Edz.-Peranto. Flirto Esperanta. <i>Societa ludo</i>		
<i>en 20 kartoj</i> ..		.90

ESPERANTLINGVA NOVELBIBLIOTEKO REDAKTATA DE LEONO VIENANO

N. Jeruŝalmi (Vienano). Eksiĝo. <i>El la hebrea literaturo</i> ..		.80
B. Prus (Lidja Zamenhof). La vizio. La veŝto. <i>El la pola literaturo</i> ..		.80
R. Romanov (Dratwer). La mistero. Unu horo. <i>El la rusa literaturo</i> ..		.80
L. Biro. Fraŭlino Ida. K. Porzsolt. La vojo malsupren. <i>El la hungara</i> (Rereips) ..		.80
H. Bang (Vienano). La hontemulo. La unua kiso. <i>El la dana literaturo</i> ..		.80
A. Strindberg (Vienano). Amo kaj pano. Aŭtuno. <i>El la sveda literaturo</i> ..		.80
Tuta kompleto de Esperantlingva Biblioteko —6 volumoj kune tolebinditaj ..		6.00
Adam Mickiewicz. Sinjoro Tadeo ..		6.00
Poŝtkartoj ilustritaj kun bildo de Zamenhofa tombo en Varsovio (fotografita) 10 ekz. ..		1.50

POR LA SENDKOSTOJ BV. ALDONI 10%.

NI LIVERAS ANKAŬ LIBROJN DE ALIAJ
ELDONEJOJ.

LA LIVERO OKAZAS NUR POST ANTAŬPAGO.

LANDOJ RAPORTOJ

AŬSTRUJO

En la kongresjaro 1936 la publiko estis pli interesigita pri nia movado. La diversaj fremdulfrekvent-instancoj eldonis denove—kiel jam de jaroj regule—belegajn gvidilojn: Varbadservo de Ministerio por Komerco kaj Trafikotian kun 48 paĝoj, belege ilustritan; krome Fremdenverkehrsstelle en Vieno; Viena Foiro dufoje por la printempa kaj aŭtuna Foiroj; Federacia Lando Supra Aŭstrujo (Brucknerlando), Karintio kaj Tirolo; urbo Klagenfurt kaj Eisenstadt, la verkadloko de Josef Haydn. Ĉiuj tiuj sukcesoj estas la sekvoj de la klopodoj de la unuopaj membroj kaj grupoj de nia landa asocio "Aŭstria Esperanto-Asocio."

Prezidanto Steiner sukcesis atingi, ke la ĝeneralpoŝtdirekcio eldonis oficialajn ilustritajn poŝtkartojn en serio de 50 diversaj kartoj kun enpresita poŝtmarko kaj—la unuan fojon—kun klariga teksto (antaŭe nur estis simple menciita la nomo de la koncerna loko) en germana, franca, angla kaj Esperanto-lingvoj. Ni danku pro tio al ĝeneralpoŝtdirektoro Ritter von Steyskal kaj ministeria konsil. d-ro Petsch. La prezidanto ankaŭ sukcesis atingi, ke en la granda internacia horaro, kiun eldonas regule la federacia ĝeneralpoŝtdirekcio, la klarigo de la signoj estis enpresita krom en la germana, franca kaj angla lingvoj—ankaŭ en Esperanto.

Sur la kampo de Radio la E.-kurso daŭris ĝis komence de Aŭgusto, dume la aliaj lingvo-kursoj jam finiĝis en junio. Ĉiun duan semajnon malfruvespere proksimume je la 22 h per Radio ni disaŭdigis raportojn pri la okazonta kongreso en Vieno kaj interesajoj el Aŭstrujo.

Post malfacilaj klopodoj de prez. Steiner ankaŭ post la kongreso la Esperanto-kurso denove estis allasita kaj ankaŭ ĉiun duan vendredon disaŭdigoj pri Aŭstrujo, kiuj ĉiam raportas pri interesaj aferoj. La intereso en eksterlando estas sufiĉe granda.

Dum la kongreso okazis radio-disaŭdigoj pri la malfermo de la kongreso kaj de reprezentantoj de 25 nacioj, kiuj parolis en sia gepatra lingvo, poste en Esperanto, kun

sekvinta traduko en la germanan lingvon flanke de la aranĝinto prez. Steiner. Tiuj disaŭdigoj tre interesis la publikon. La gazetoj raportis pri tio.

Viena Foiro disponigis senpage po unu standon en ambaŭ partoj de la Foiroteritorio. Niaj tiaj reprezentantoj vendis 2,000 ŝlosilojn kaj disdonis milojn da propagandiloj.

Ĉe la Ĝeneraldirekcio de la Fervojoj nia prez. atingis, ke denove fervojistoj, kiuj deziris lerni E-on, povis fari koncernen ekzamenon oficialan, kiu helpas al ili atingi pli altajn postenojn.

Skriba kurso de nia prezidanto estis diskonigita en la oficialaj informiloj de la Fervojoj kaj de la Poŝtoj kaj oni invitis la subulojn al lernado de E. en la koncernaj lokoj kun E.-grupoj aŭ almenaŭ partopreno en la skriba kurso. Tiaj apartaj kursoj ĉe la poŝto okazis en kelkaj lokoj: Wien, Linz, Salzburg, Klagenfurt, Innsbruck.

Pri la 28-a Kongreso raportis sufiĉe la gazetoj. Ĝi estis vera sukceso kaj pri ĝi estas legeble sub aparta rubriko.

Libroj eldonitaj dum 1936: Ŝlosilo germana en 3 eldonoj, vortareto germana-Esperanto (verk. de d-ro Pfeffer), "Per aŭtobuso tra Aŭstrio kaj Wien" (80-paĝa, bele ilustrita), "Albumo de Wien" kun 100 bildoj kaj klariga teksto en Esp., Kongreslibro. La libroj estas kompilitaj aŭ verkitaj de prez. Steiner.

En preparo, aperontaj en Januaro, 1937, "Prelegoj el Somera Universitato, Instruista Konferenco kaj Virina Konferenco" (64 paĝa), "Antaŭaj Cirkonstancoj" burleskajo de J. Nestroj (42 paĝa) kaj "Antologio Aŭstrio el la 20-a jarcento" en 6 volumetoj po 64 paĝoj en grandformato; ĉiuj kompilitaj aŭ verkitaj de s-ano Steiner.

Internacia Esperanto-Muzeo post multaj, nefacilaj klopodoj ricevis plian ejon, 300 m² grandan, en kiu nun estus sufiĉa loko por la U.E.A.-biblioteko, kiu nun ne plu venos laŭ la informoj el Svislando, kaj aliaj. Ĉiu sendu materialon por la Muzeo kaj li ricevos kvitancon kun danko.

Aŭstria E.-Asocio aliĝis post la Brita kiel unua al I.E.L. kaj tuj ankaŭ starigis ĉefdelegiton por I.E.L.

Komence de 1937 aperis la oficiala organo de A.E.A. en pli granda amplekso kaj en pli granda eldonkvanto kaj eliras al pli ol 120 landoj. Interkonsente kun koncernaj instancoj s-ro Steiner, kiu ĝis nun sola faris la varbadservon

por Aŭstrujo pere de Esperanto, nun aranĝis apartan "Esperanto-Varbadservon por Aŭstrujo" kaj trovis por tio la akceladon de ĉiuj necesaj instancoj, do la rekonon de la valoro de Esperanto por tiaj gravaj celoj.

Por la E.-lektorato en Teknika Altlernejo en Wien estis proponitaj 4 samideanoj post fordono de la lektorato flanke de kortega kons. d-ro Wollmann. La profesoraro elektis prof. d-ron Hugo Sirk.

En 3 multedisvastigataj gazetoj aperas regule ĉiun dimanĉon E.-kurso, nome en *Reichspost* (legata de la intelektularo), *Das Kleine Volksblatt* (legata de la malriĉa parto de la loĝantaro; ambaŭ kursoj de kort. kons. Steiner) kaj en *Gerechtigkeit* (Justeco), organo por la batalo kontraŭ malamo kaj maljusteco (Kurso de d-ro Pfeffer).

Entute ni povas esti kontentaj pri nia movado dum la nuna kriza tempo.

Estraro de A.E.A.

BELGUJO

Dum la jaro 1936 la oficiala belga movado daŭrigis sian kutiman laboron. La diversaj grupoj kiuj formas la Reĝan Belgan Ligon Esperantistan, kiel kutime organizis en la diversaj gravaj urboj elementajn kursojn, kiuj ĉiuj sukcesis laŭ diversa grado.

Dum la Kongreso nacia, kiu okazis je Pentekosto en la valona industria urbo La Louvière, la membroj decidis doni al la nacia societo oficialan ekziston.

De nun Belga Ligo Esperantista, al kiu ĝia Honora Prezidanto, la Reĝo Leopoldo IIIa, la antaŭan jaron donis la rajton alpreni la titolon "Reĝa" estas "Societo sen Profita Celo," protektita per speciala belga leĝo.

En la daŭro de la jaro, intensa propagando estis farita apud la senatanoj kaj deputitoj, inter kiuj dudekkvino fine promesis helpi al la disvastigo de nia lingvo, per la subskribo kaj la voĉdono de leĝpropono, kiu antaŭvidos la enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

En la jaro 1936 la belga Esperantistaro estis trafita per la morto de diversaj malnovaj kunlaborantoj. Belga Ligo mem estis plej forte kaj kruele trafita per la morto de la Ĝenerala Sekretario, S-ro Henri Pétau, kiu ludis rolon ne

nur en la belga movado, sed kiu estis ankaŭ dum multaj jaroj la Prezidanto de la iama "Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj."

Aro de paroladoj estis organizataj de la Ligo, je la intenco de la grupoj. Tiel vizitis Belgion kaj faris rondvojaĝon por paroli en la diversaj grupoj: S-ro Baghy (Hungarulo), S-ro Ravestein (Nederlanda) kaj Scherer (Usono).

La estraro de Reĝa Belga Ligo Esperantista konsistas el D-ro P. Kempeneers, prezidanto (Bruselo); F-ino Yvonne Thooris (Bruĝo) kaj S-ro Leon Cogen, pacjuĝisto (Ninove), gevicprezidantoj, S-ro Mau. Jaumotte, ĵurnalistino (Antverpeno), ĝenerala sekretario-kasisto.

M.J.

BRAZILIO

Jen listo de notindaj okazintaĵoj dum la lasta jaro.

Januaro 1936.—Publikigo de "Dicionário Português-Esperanto" (Portugala-Esperanta Vortaro), kun 506 paĝoj kaj 26,000 vortoj, presita ĉe la Ŝtata Presejo.

Publikigo de l' verko "O Rádio em 16 Palestras," tradukaĵo el la Esperanto-origino "Fine mi komprenas la radion," de s-ro ing. E. Aisberg.

Februaro 1936.—La Regiona Estraro de l'Poŝto kaj Telegrafo de la Federacia Distrikto eldonis kartleterojn kun vidaĵoj el Rio-de-Janeiro kaj vortoj ankaŭ en Esperanto.

Majo 1936.—La Kongreso de Beletistikaj Akademioj kaj Societoj de Literatura Kulturo en Brazilo aprobis dezir-esprimon rekomendantan, ke la Ŝtataj aŭtoritatuloj prestiĝigu kaj helpu la tradukadon de l'plej bonaj brazilaj verkoj en la plej disvastigitajn lingvojn naciajn kaj ankaŭ en Esperanton.

29 Julio 1936.—S-ro d-ro Getulio Vargas, Prezidanto de la Respubliko, konsentis esti la alta patrono de la 9-a Brazilia Kongreso de Esperanto.

8 Oktobro 1936.—S-ro d-ro Macedo Soares, Ministro por Eksterlandaj Aferoj, cedis la salonojn de paroladoj kaj de la Biblioteko de la Palaco de Itamarati (Ministrejo) por la kongresaj kunsidoj, kaj eldonigis ĉe la Ŝtata Presejo ilustritan gvidlibron pri Rio-de-Janeiro.

30 Oktobro 1936.—La Provizora Ministro de Publikaj Laboroj, Prof. Licinio de Almeida, ordonis la eldonon de poŝtmarko memoriga de la 9a Brazilia Kongreso de Esperanto, kies ideon jam estis aprobita de la ministro mem d-ro Marques dos Reis.

13 Novembro 1936.—Apero de poŝtmarko memoriga de la 9a Internacia Specimena Foiro de Rio-de-Janeiro kun vortoj en portugala lingvo kaj Esperanto.

BRITUJO

La pasinta jaro estis la dua de la Tri-Jara Plano de la Brita Esperantista Asocio. Tiun planon la Asocio inaŭguris komence de 1935 kun la celo akceli la plifortigon de B.E.A. mem kaj la pliintensigon de la propagando okaze de la Jubileo de Esperanto. Por stimuli la regionan laboron oni organizis konkurson inter la Federacioj: argenta pokalo estas aljuĝata ĉiujare al tiu Federacio, kiu gajnis la plej multajn poentojn pro varbado de B.E.A.-membroj kaj "Amikoj de Esperanto," fondado de novaj grupoj, sukcesoj ĉe ekzamenoj kaj kolektado por la Jubilea Kaso. Ĉi tiu kaso celas provizi al la Asocio propran hejmon ekokupotan en la Jubilea Jaro. Je la fino de 1936 jam kolektiĝis £1,200 (sv. fr. 26,000) kaj oni esperas, ke en la somero de 1937 B.E.A. jam okupos sian Esperanto-Domon en la ĉefurbo.

Nia Propaganda Sekretario, veturante tra la lando en la propra aŭtomobilo de B.E.A., vizitis dum la jaro 159 lernejojn, kie li parolis pri Esperanto al suma aŭdantaro de 21,290 infanoj kaj 725 ĝeinstruistoj, vendante 8,000 ekzemplerojn de lernolibreto. Ĉie li estis bone akceptata, kaj multloke li ĝuis la benon de la loka aŭtoritato edukada. Krom tio li faris sesdekon da propagandaj paroladoj en ĉiuj partoj de la lando.

Malrapide sed firme nia lingvo penetras en la lernejojn, plejparte kiel eksperimenta lernmaterialo ekster la oficiala programo, sed en pliiganta nombro da lernejoj kiel oficiala instruado. (Vidu p. 41.) B.E.A. havas specialan komitataton por flegi tiun fakon, kaj ĝi faras efikan laboron. La komitato nun dediĉas sin al la demando pri Esperanto ĉe la ekzamenoj: plej grava konsideraĵo rilate al la instruado de la lingvo en la duagrada lernejoj, kie la ekzameno ĉion regas.

Dum 1936 la Asocio kaj ĝiaj filiaĵoj starigis valorajn kontaktojn kun diversaj aliaj societoj, kies celoj estas internaciaj, kaj partoprenis konferencojn de tiaj societoj. Oni projektas pli vastan ekspluatadon de tiu ĉi paca penetrado.

Ĝis nun Britujo estis nigra teritorio rilate al Radio. Tamen, oni povas registri por 1936 unu ekbrilon: okaze de S.A.T.-kongreso en Manchester, la Nord-Regiona stacio aranĝis mallongan disaŭdigon Esperantan.

La Centra Oficejo de B.E.A., kiu funkcias interalie kiel librovendejo, vendis dum la jaro Esperantaĵojn por la sumo £1,466 (sv. fr. 30,786). The Esperanto Publishing Company (eldona akcia kompanio), kiu laboras en intima kontakto kun B.E.A., aldonis du volumojn al la Populara Esperanto-Biblioteko kaj eldonis plurajn aliajn librojn, inter kiuj estas angla adaptaĵo de rektmetoda lernolibro.

La vojaĝa fako de B.E.A. organizis, krom libertempeto sur la franca marbordo, du grandajn karavanojn al la XXVIIa U.K. en Vieno, kun partopreno de 80 personoj.

The British Esperantist, oficiala organo de B.E.A., per sia numero de Decembro 1936, kompletigis sian 30an volumon, kaj la 32an jaron de seninterrompa aperado. Fondita en 1905, ĝi estas nun la plej malnova Esperantogazeto nun aperanta. Meze de 1936 oni reorganizis la redakcion por malŝarĝi la konstantajn oficistojn kaj tiel permesi pli liberan evoluadon de la gazeto, kiu, sen pretendo pri literatura valoro, kombinas la funkciojn de informilo pri-Esperanta kaj ligilo inter-Esperantista.

Kun plena ŝato de la honoro tiel farita al ili, la britaj Esperantistoj vidis en 1936 la elekton de sia lando kiel nova centro de la Internacia Movado. Tiu elekto, konfirmita per demokrata baloto, fariĝis neŝancebla pro la malavareco de du britaj gesamideanoj, kiuj donacis domon por la Centra Oficejo. Kun la plena aprobo de grandega plimulto de siaj membroj kaj delegitoj, B.E.A. montris la vojon al la ceteraj landaj asocioj, aliĝante al Internacia Esperanto-Ligo tuj post ties fondo, kaj kun ĝojo vidis, ke, je la fino de la jaro, jam sekvis ĝin preskaŭ ĉiuj aliaj. Krom tio B.E.A. oferis lertan kaj laboreman oficiston por esti Ĝenerala Sekretario de I.E.L.

La nuna membronombro de B.E.A. estas proksimume 1870 (rekte kotizantaj) kaj la nombro de filiaj grupoj estas proksimume 80, kun po 10 ĝis 250 membroj, ne kalkulataj kiel membroj de B.E.A.

BRITO.

BULGARUJO

Bulgara Esperantista Asocio.—Fondo 1911 (heredinta la B.E.L., fondita en 1907). Organizo: centra komitato, izolaj membroj, kunigitaj en kolekta grupo ĉe la centra komitato kaj lokaj societoj. Kotizo: po 20 levoj jare por persono. Gazeto: *Bulgara Esperantisto* monata en Esperanto kaj bulgara lingvo. Servo: propagando. Stato: 14 societoj kun 244 membroj. Estraro: Prez. Atanas D. Atanasov. Viceprez. Petr Jurdanov. Sekretario-kasisto: Belčo T. Oktomvriksi. Konsilantoj: D-ro Zafari Zafariev, Ljuben Marikin, Stefan Kiraĝiev kaj Ivan Vâlcanov. Adreso: strato Alabin 50, Sofia.

1. Esperanta societo. Sofia, str. Alabin 50.
2. "Albatro." Varna, per Georgi N. Sapunĝiev, Gradskata biblioteka.
3. "Solidareco." Ruse, per Ivan Kovaĉev, str. Neofit Rilski 20.
4. "Radio." Pazarĝik, per Atanas Furnaĝiev en Bulgara Nacia Banko.
5. "Lumo." Tirnovo, per Georgi Donĉev, str. Gurko 1.
6. "Vekiĝo." Ŝumen, per St. Daniskov Zemedelska Stopanska Direkcia.
7. "Kulturo." Plovdiv, per Ivan Ŝivarov Leĉebnica pri fonda O.O.
8. "Fratiga stelo." Sevlievo, per Simeon St. Hesapĉiev, instruisto.
9. "Toleremeco." Jambol, per D-ro Zafari Paskalev, str. Knjajeska 12.
10. "Rila verda stelo." Dupnica, per Kosta Antonov, str. Ĥr. Granĉarov 9.
11. "L.L. Zamenhof." Orehovo, per D-ro Georgi pop Ivanov.
12. "Espero." Ruse, per Marin Dimitrov, str. Lozengrad 29.
13. "Stelo." Kirĝali, per inĝ. Ĥristo Triĵakin.
14. "Espero," vilaĝo Stijerov, Svištova regiono, per Ilija Iv. Lazarov.

Gazeto: *Bulgara Esperantisto*.—Organon de la Bulgara Esperantista Asocio. Monata. Fondita 1919, 16 p., 24,5 x 17,5 cm. Redakcio kaj administracio: str. Alabin 50, Sofia. Abono: 20 levoj enlande, 1 sv. fr. aŭ 4 respondokuponoj eksterlande.

B.E.A.

ĈEĤOSLOVAKUJO

E.A.Ĉ.S.R. en 1936

En propagando ĝenerala: Ni invitis Cseh-metodajn instruistojn s-on Henrikon Seppik kaj s-inon Erikan Seppik el Estonujo. Ili dum 1936 faris kursojn en Košice, Prostějov, Olomouc, Bratislava, Brno, Uherské Hradiště, Josefov-Jaroměř, Moravská Ostrava. Krome ili faris multajn provlecionojn kaj geografiajn prelegojn esperantlingvaj kun nacia tradukanto. La rezulto ĉie estis kontentiga, ie eĉ tre bona. Ĉiam ĝi signifis enpenetron en mediojn, kiujn ni ne estus atingintaj alimaniere.—Dum Januaro-Februaro, 1937, ni organizis prelegvoĝojn de J. R. Scherer, kiu prelegis en 20 urboj. Ankaŭ tio sukcesis tre efike laŭ propaganda vidmaniero.—Bulteno de la Asocio povis enskribi informojn pri aktiveco en 96 lokoj.—Publikaj kursoj por komenculoj (nekalkulante la Seppikajn) estis 51 kun 1,120 partoprenintoj. La asocio publikigis novan eldonon de ĉeĥa ŝlosilo (10,000 ekz.); ĝi estas unua laŭnorma eldono ĉeĥa. Ni fabrikigis por ni ankaŭ apartan kvanton de germana ŝlosilo, kiu havas sur kovrilo organizajn informojn por nia lando. Ni eldonis duan eldonon de laŭnorma flugfolio “Unu lingvo . . .” (10,000 ekz.). Ni eldonis propagandajn afiŝojn grandformatajn kaj mezformatajn kun tre efika bildo kolora en granda kvanto. La afiŝoj estas destinitaj por daŭra pendo en publikaj ejoj. Aperis nova ĉeflingva lernolibro detala kun vortareto (de J. V. Šamla) kaj malgranda vortareto ĉeĥa-esperanta (de A. Berka). La internacia katolika kongreso en Brno, havis vastan resonon ankaŭ propagande. Ni disponigis al la aranĝantoj grandan kvanton de nia materialo por ekspozicio, kiu estis tre efika kaj daŭris 14 tagojn.—Propagando per gazetoj estas daŭrigata laŭ elproviita maniero. Aperis proksimume 2,000 artikoloj en gazetoj ĉeĥoslovakaj, 600 en gazetoj germanaj kaj 170 en gazetoj hungaraj. En mezo de jaro decidis grava eldono ĵurnala en Brno disponigi siajn paĝojn al esperanto-artikoloj, sub redakto de J. V. Šamla. Aperis en tiuj gazetoj ĉ. 140 artikoloj.—Radio-disaŭdigoj en esperanto estis 45, krome dumonata kurso por ĉeĥoj (el Brno) kaj 8 disaŭdigoj nacilingvaj pri esperantistaj movado aŭ aranĝoj.—Stacidomaj tabuloj pendas en 82 stacidomoj.

Du turistajn gvidlibrojn aperigis Unuiĝo de okcident-bohemaj banlokoj, unu Turista klubo. En propagando inter fakaj rondoj la plej gravaj rezultoj estas: “Kuracista revuo” (Lékařská revue), kiu komencis tiun ĉi jaron

aperadi, enhavas esperant-lingvajn resumojn. La favora sintenado de Centro de slovakaj katolikaj skoltaj Esperanto; ĝia organo Skaut havas en ĉiu numero esperant-lingvajn resumojn de ĉiuj artikoloj.—E. kontakto kun oficialaj aŭtoritatoj rezultis: dekreto de ministerio de internaj aferoj el 17, VIII, 1936 n-ro 58.427-1936-13, laŭ kiu estas al ĝendarnoj permesite esti membroj de la Asocio kaj per ĝi ankaŭ de I.E.L. Dekreto de ministerio poŝta el 20, VI, 1936 n-ro 39.489-III-1936, per kiu estis publikigitaj detalaj informoj pri kursoj por poŝtistoj en la Cseh-instituto en Arnheim. Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko (E.A.Ĉ.S.R.) kunigis dum la jaro preskaŭ ĉiujn esperantistajn organizojn en la lando. B.E.S.-Adresaro aliĝis kiel entrepreno, kun Moraviaj E.-Pioniroj la Asocio kunlaboras, Regiona Esperantista Ligo en Ĉ. Těšín aliĝis korporacie. Ekster la organizo restis sole Ĉ.E.-Instituto en Praha. En la komitato akceptis lokojn ankaŭ germanaj esperantistoj. Ekster la kadro de E.A.Ĉ.S.R. estas du laboristaj asocioj kun sidejoj en Plzeň kaj Aussig, kaj Ligo de Katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo, kiuj ambaŭ limigas sian agadsferon al siaj klasaj kaj ideaj medioj. Krome daŭras sian ekzistadon kaj agadon Germana Esperanto Ligo en Ĉeĥoslovakio, kiu laboras sisteme kaj vigle propagandante kaj organizante inter germanoj en la lando. G.E.L. laboras ankaŭ sur la tuta teritorio de la lando. E.A.Ĉ.S.R. eldonas dumonate Bultenon, G.E.L. Informilon, Katolika Ligo Informilon, presitajn. La Laborista Asocio aperigas Bultenon ciklostilitan. Organo de la movado estas “Ligilo” monata revuo en Prostějov redaktata de Fr. Heikenwalder.

E.A.Ĉ.S.R.

I.E.L. liveras al vi ĉiun

ESPERANTO-LIBRON
je original-prezo

Vidu ankaŭ la libro-liston sur paĝoj 81-95

KONCIZAJ INFORMOJ PRI LA LABOROJ DE
GERMANA ESPERANTO-LIGO EN ĈEĤOSLO-
VAKUJO EN 1936

1. *Rilato al internacia movado.*—G.E.L. plenumis ĉiujn devojn kiel “Landa Asocio,” interrilatis konstante kun diversaj Esperanto-organizoj enlandaj kaj eksterlandaj pri la praktika por-esperanta laboro. Ekz. G.E.L. estis inter la landaj asocioj, kiuj respondis la enketon de la Filia Oficejo (Propagando) Stockholm. (6.VI.36). G.E.L. subtenis la laborojn de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto rilate la “Internacian kongreson de la gastejoj por la junularo.” Ni instigis la “Germanan Asocijon de la junularaj gastejoj en Ĉeĥoslovakujo” ke ĝi favoru Esperanton kaj subtenu la francan proponon en Kopenhago.

2. *Enlanda movado.*—(a) *Lernejoj:* Esperanto estis instruata kiel nedeviga fako en la Germana ŝtata industria lernejo en Reichenberg. Du samideanoj faris la ŝtatan E.-ekzamenon pri instrukapableco ĉe la oficiala ŝtata ekzamena komisiono en Reichenberg.

(b) *Ekspozicioj:* Pere de la loka grupo en Reichenberg G.E.L. aranĝis, kiel ĉiujare, grandskalan varbadon inter la vizitantoj de la “Reichenberga Foiro” elektinte la temon “Esperanto kaj la Olimpiado.” G.E.L.-grupo en Aŝch aranĝis per la ligo ekspozicia materialo E.-standon dum la “Metia ekspozicio.”

3. *Fremdultrafiko.*—G.E.L. prizorgis la tradukon de varbilo pri la mondfama kuraĉloko Karlsbad, kiun la kuracdirekcio eldonis. G.E.L. interrilatis kaj korespondis pri la temo “E. kaj fremdultrafiko” kun jenaj oficejoj kaj korporacioj: Ĝenerala Direkcio de la Svisaj Poŝto kaj Telegrafo, Ministerio per la stampa e la propaganda Roma, Kuracdirekcioj en Franzensbad kaj Teplitz-Schönau, Federacio de Nederlandaj Unuiĝoj por interrilato per fremduloj, Den Haag, Direkcio de Nederlanda fervojaro Utrecht, Vojaĝoficejo Putnik Ljubljana, Vojaĝoficejo Orbis Paris k.a.

4. *Radio.*—G.E.L. korespondis kaj subtenis la klopodojn uzi Esperanton por radio-disaŭdigoj kun jenaj sendstacioj: Kraków, Ljubljana, Roma, Warszawa. “Europa-Stunde” publikigis ĉiusemajne la programon de la E.-disaŭdigoj.

5. *Foiroj.*—Korespondado pri poresperantaj aferoj kun la foiroj Budapest, Lyon, Milano, Paris, Reichenberg, Wien.

6. *Gazetara servo.*—Funkciis kiel pasintjare por regule informi germanajn gazetojn en Ĉeĥoslovakujo pri Esperanto.

7. *Statistikaj informoj.*—398 membroj. *Informilo*, la oficiala organo de G.E.L. informis la membrojn.

8. *Fakoj.*—La sekvantaj G.E.L.-grupoj laboras en jenaj fakoj. Gablonz: Enlanda fremdultrafiko. Reichenberg: Komerco, foiroj, kaj jura fako. Leitmeritz: Radio. Bodenbach: Fervojoj. Pilsen: Fremdultrafiko en Sudeŭropo.

9.—*Internacia somerrestadejo.*—Ĝin organizis kaj prizorgis la G.E.L.-grupo Zwittau.

10.—*Varbado per ligaj afiŝoj* (terglobo kun stelo) en vojaĝoficejoj, bankoficejoj, atendejoj ktp.

G.E.L.

La plej famajn esperantistajn verkistojn vi
ekkonas facile, legante kaj abonante al

LITERATURA MONDO

nia sola pure literatura gazeto, kies amplekso egalas
1,000 libro-paĝojn.

Specimeno unu respondkupono.

Mendebla ĉe ĉiu librovendisto aŭ ĉe Budapest IX.
Soroksári-ut. 38, Hungarujo.

DANLANDO

Dum la pasinta jaro la Esperanta-movado evoluis samgrade kiel dum la antaŭaj jaroj.

Por la landa asocio la jaro pasis harmonie. Tio signifas, ke la aktivuloj povis dediĉi sian povon al laboro por progresigi la movadon en Danujo.

La plej grava okazo estas eble, ke la landa asocio transprenis Dana Esperanto-Instituton. La instituto estis ĝis tiam memstara, sed de la lan de Augusto ĝi laboras sub respondeco de la landa asocio.

Tiu aranĝo montris jam grandan avantaĝon por la instituto. Neniam antaŭe la instituto sukcesis starigi tiom da kursoj kiom dum tiu-ĉi vintro. La instituto nun okupigas 11 eksterlandajn instruistojn, kvankam ĝi nur malfacile havigis laborpermeson al tiom da eksterlandanoj. Estonte ĝi nur rajtas inviti eksterlandan instruiston kondiĉe, ke dana instruisto estos invitata eksterlanden.

Feliĉe la dana registaro dum la nuna sezono estis bonvola, kaj la rezulto de la multaj kursoj estas multaj novaj kluboj. Antaŭ unu jaro estis en Danujo 44 kluboj, sed hodiaŭ 62, kaj en la du venontaj monatoj certe fondiĝos ankoraŭ kelkaj kluboj.

Alia grava okazo estas, ke Centra Dana Esperantista Ligo sendis petskribon al la registaro kaj parlamento pri enkonduko de Esperanto en la vesperajn lernejojn. Tiaj lernejoj estas subvenciataj de la ŝtato, kaj konsento de la registaro signifas gravan avantaĝon por nia laboro.

La lasta jarlibro enhavas detalajn informojn pri nia organizaĵo, kaj tiurilate nenio ŝanĝiĝis. Pro tio ne necesas ripeti la informojn.

C.D.E.L.

EGIPTUJO

La lando enhavas 15 milionojn da loĝantoj. Ĝi estas komerca centro inter la oriento kaj la okcidento, fama pro ĝiaj piramidoj kaj aliaj monumentoj kaj agrabla klimato.

La ĉefurbo estas Kairo kun 1,200,000 da loĝantoj. Tie troviĝas Klubo de Esperanto ĉe la Y.M.C.A. No. 60 Sharia Ibrahim Paŝa, gvidata de S-ro Musa Helmi. Vespera kurso laŭ metodo Ĉe.

Port-Said 100,000 loĝantoj. Laborema Esperanto-Grupo, kiu funkciigas Esp. koresp. kurson tra Egiptujo kaj la aliaj arablingvaj landoj. Ĝus fondita societa klubo "La Verda Stelo" malfermita ĉiuvespere ĉe No. 3 Sharia Ruŝdi. En Ismailia 25,000 loĝantoj, belega urbo apud la Lago Timsah estas aktiva Esperanto-Klubo.

Fajum 50,000 loĝantoj. La Delegito estas N. Mahrus, sekr. de la Komerca Ĉambro kaj prez. de la konstanta ekspozicio pri egiptaj industrioj. Esperanto Centro: Domo N. Mahrus. Plezure ni akceptas Esp. gastojn. Vespera kurso gvidata de S-ro T. Migalli.

Krome ekzistas multaj izolaj Esperantistoj en diversaj urboj kaj vilaĝoj de Egiptujo.

N.M.

FRANCUJO

S.F.P.E. (Société Française pour la Propagation de l'Esperanto) konsistas el 16 federacioj regionaj kun 128 grupoj, kaj 6 fakaj asocioj. La nombro de la membroj fine de 1936 estas 3,689 (19 M.S., 226 M.A., 340 M.J., 3,104 M.), kontraŭ 3,697 en 1935.

La financa situacio de la S.F.P.E. estas jena: Bonhavo je la 1.1.1936=71,848.30 fr.; Enspezo 1936=58,313.67 fr.; Elspezoj 1936=57,934.69 fr. Profito=379.98 fr. Bonhavo je la 1.1.1937=72,227.28 fr.

La financa situacio de la "Franca Esperanto Instituto" estas jena. Bonhavo je la 1.1.1936=745.95 fr. Elspezoj=2,777.50 fr.; Elspezoj=2,053.35 fr. Bonhavo je la 31.12.36=1,470.10 fr.

Krome, F.E.I. havas eksterordinaran konton, kiu konsistas el pruntoj de S.F.P.E. al F.E.I. por presado de libroj kaj estas amortizata per la rento de la korespondaj kursoj kaj la vendado de la F.E.I.-libroj fare de la S.F.P.E. La ŝuldo estis 14,401.80 fr.; la amortizo dum la jaro estas 3,518 fr. La ŝuldo de F.E.I. al S.F.P.E. la 1.1.1937 estas do 10,883.80 fr., sumo kiun oni devas aldoni al la bonhavo de S.F.P.E.

La financa situacio de la oficiala gazeto de S.F.P.E. *Franca Esperantisto*, kies eldonnombro estas 1,500 ekzempleroj, plus 2,000 ekzempleroj de *L'Espérantiste Français*, estas la jena. Elspezoj=18,691.52 fr.; Elspezoj=17,698.50 fr. Bonhavo je la 31.12.36=893.02 fr.

Jen kelkaj el la plej valoraj laboroj kaj sukcesoj de S.F.P.E. dum la jaro.

S.F.P.E. malfermis komence de la jaro "Esperanto Franca Centro," 34, rue de Chabrol, Paris X.

11 regionaj, 5 distriktaĵoj, kaj pli ol 100 urbaj konsilantaroj voĉdonis deziresprimojn pri enkonduko de Esperanto en lernejojn.

S-ro Zay, Ministro pri Publika Instruado, sendis al la instruaj instancoj, oficialan cirkuleron por disponigi al la esperantistaj grupoj senpagajn ĉambrojn en la lernejoj por la esperanto-kursoj.

S-ro Luc, Direktoro de la Teknika Instruado, informis oficiale la S.F.P.E., ke li permesas la enkondukon de Esperanto, nedevege, en la komercajn lernejojn.

2 novaj urboj: Hautmont kaj Hyères, donis la nomon de D-ro Zamenhof al strato.

Kursoj okazis sur la tuta teritorio, laŭ diversaj metodoj, kaj kun partopreno de 7 eksterlandaj Cseh-profesoroj. Dum la jaro, la Franca Esperanto Instituto disdonis 9 pedagogiajn atestojn (1935=7), 25 atestojn pri kapableco (1935=34); 17 superajn atestojn pri lernado (1935=13) kaj 589 atestojn pri lernado (1935=476).

Radio-kursoj aŭ radio-paroladoj pri kaj en Esperanto okazis en la sekvantaj radio-stacioj: Paris, Lille, Lyon (2 stacioj), Bordeaux, Limoges, Grenoble, Nice, Fécamp. 2 perkorrespondaj kursoj de S.F.P.E. funkcias (unua kaj duagradaĵoj).

S.F.P.E. organizis oficialan karavanon al la Universala Kongreso de Esperanto, kun pli ol 100 partoprenintoj.

Pli ol 2,500 artikoloj pri aŭ en Esperanto aperis dum la jaro en la franca gazetaro.

Kiel la antaŭaj jaroj, la Foiroj de Paris, Lyon kaj Marseille larĝe uzis Esperanton. La vagonara ekspozicio, kiu enhavas esperanto-budon vizitis pli ol 200 urboj.

La oficiala gazeto de S.F.P.E. aperigis specialajn numerojn pri: "Esp. kaj la franca literaturo; Esp. kaj la monda literaturo; Esp. kaj la blinduloj."

S.F.P.E. eldonis varbfoliojn pri Varsovio (100,000 ekz.) kaj specialajn por la instruistoj kaj la inĝenieroj.

Ni devas ankaŭ memori la propagandon en teknikaj medioj, la armeo, la turismo, ktp. kaj la grandan prelegvojaĝon de S-ro Baghy tra tuta Francujo, je la komenco de la jaro.

Fine, S.F.P.E. plej larĝe preparis, en la lastaj monatoj de 1936, la Internacian Konferencon "Esperanto en la Moderna Vivo," pri kiu oni legos paĝojn 44-46. Ĝi akiris tiamaniere al la movado multajn eminentulojn de Francujo. Ĝi ankaŭ, pro la konferenco sukcesis malfermi oficialajn kursojn en la fervojaj oficejoj kaj specialan kurson por profesiaj artistoj.

P.P.

HINDO-ĈINUJO

La Esperanto-movado en Hindoĉinujo datumas nur de la jaroj 1931-1932. Antaŭ 1931, kelkaj izolaj amanoj jam eklernis Esperanton, sed la movado enradikiĝis sur nia teritorio nur depost la alveno de S-ro Péraire, franca esperantisto, en Aŭgusto 1931.

Helpita de S-roj T. T. Binh kaj H. B. Duong, li paroladis franclingve en Hanoi, antaŭ 100 personoj, rakontante lian vojaĝon per biciklo tra Eŭropo, Rusujo kaj Ĉinujo, kaj pruvigis la valoron de Esperanto kiel helplingvo dum tiu vojaĝo.

Unu jaro forpasis, dum kiu la izolaj esperantistoj klopodis kuniĝi sub la gvido de S-ro Guérineau, la pioniro de la hindoĉina movado. Dumtempe, S-ro H. B. Duong publikigis propagandan Esperanto-kurson en 10 lecionoj en la duonsemajna franclingva ĵurnalo *La Nova Anamujo*. Tiu kurso bone sukcesis. Post multaj klopodoj, oni finfine sukcesis starigi Esperanto-grupon en Tonkinio. Prezidis S-ro J. Lan, universitata profesoro en Hanoi. Fariĝis sekretarioj S-roj Guérineau kaj B. H. Duong.

En Septembro 1932, la grupo organizis publikan paroladon kaj du kursojn en Hanoi. La paroladon ĉeestis la Direktoro de la Publika Instruado en Hindoĉinujo kaj la urbestro en Hanoi. La unuan kurson gvidis S-ro Salles, kaj, post kelkaj lecionoj, S-ro Guérineau, laŭ franca lernolibro. La duan kurson gvidas S-ro H. B. Duong, laŭ anama lernolibro de li verkita.

La unuan kurson sekvis granda amaso da lernantoj, i.a. S-ro N. V. Nhat, kiu tuj entuziasme eniris la movadon kaj fariĝis poste fervora propagandisto. Inter la anamaj esperantistoj de la unua tempo, krom S-ano Nhat, ni

devas mencii la nomojn de S-anoj T. D. Kinh, N. C. Môn, B. N. Thi, D. V. Thuyêt, P. T. Thanh (en Hanoi), N. D. Binh, N. T. Cat (en Bac-ninh), T. V. Thao (en Haiphong), kiu, ĉu sekvinte la kurson en Hanoi, ĉu memlerninte Esperanton, pli malpli aktive laboris por la propagando.

Fine de 1932, gvidante sian kurson en Hanoi, S-ano H. B. Duong, kiu estas poŝtoficisto, estis devigata foriri por Vinh (Anamujo), kie li klopodis starigi grupon, sed vane.

En 1934, S-ano N. C. Môn, kiu estas radio-oficisto, foriris por Koĉinĉinujo, kie, pli bonŝanca ol S-ano Duong en Vinh, li sukcesis, post du jaroj, starigi grupon.

En Tonkinio, la du jaroj 1933-34 estas la plej aktivaj en la historio de la landa movado.

En Bac-ninh, S-ano Binh, instruisto, verkis anaman lernolibron. S-ano Cat, instruisto, preparis anaman ŝlosilon.

En Haiphong, S-ano Thao, skolt-trupestro kaj privata lernejestro, instruis Esperanton al siaj lernantoj kaj skoltoj.

En Hanoi, S-ano Thanh gvidis kelkajn kursojn de la grupo. S-ano Kinh zorgis publikigon de la bulteno de la grupo. S-ano Thuyêt fariĝis kasisto de la grupo.

S-ano Nhin senlace publikigis Esperanto-kurson kaj propagandajn artikolojn en anamaj ĵurnaloj kaj en du franclingvaj gazetoj *La Nova Anamujo* kaj *La anama patrujo*. Samtempe, li publikigis en *Heroldo de Esperanto* plurajn artikolojn, precipe rakontojn tradukitajn el la anama lingvo, i.e., *Flustris la fluto*, *La ŝtoniĝinta edzino*, *La tragedia idilio*, ktp. La novelo *De koro al koro* gajnis al li premion de novel-konkurso organizita de *Heroldo de Esperanto*. Tio pruvas ke la anamaj esperantistoj povas jam fari ion bonan post tre mallonga tempo.

En Oktobro 1934, okaze de la propaganda dusemajno en Francujo, publikan paroladon en Hanoi preparis S-ano Nhin kaj faris la prezidanto, S-ro J. Lan, antaŭ 300 personoj. Tiu parolado, kiu bone sukcesis, tamen, estis la lasta vivsigno de la Tonkina Grupo.

Ekde 1935, unu post la alia, silentis, forlasis la movadon la fervoruloj de la unua tempo.

Sola, S-ano Nhin daŭre gvidis en Hindoĉinujo la kurson per korespondado, kiun organizis la S.F.P.Ē. en Francujo.

Februaro 1936: samtempe reiris Francujon la du fervoraj esperantistoj francaj: S-roj Guérineau kaj Lėjus.

1935-1936: Dum la Koĉinĉina Grupo vivetas, la Tonkina Grupo bone dormas.

Sed ne tuj malesperu! Nova lumo ekbriletas. Tiun esperon donas la Ĝenerala Poŝt-Direktoro en Hindoĉinujo, S-ro Duteilh, fervorega esperantisto franca, kiu alvenis ĉi tien en Majo 1936. Ĝis nun (Decembro 1936), S-ro Duteilh, pro siaj multegaj okupoj, ankoraŭ nenion povis fari por la movado. Tamen li promesis al S-ano Nhin, kiu plurfoje vizitis lin, ke li espereble povos eklabori por Esperanto nur de la komenco de 1937. S-ano Nhin estas studonta kun li planon de reorganizo. Jam, kiel skolt-trupestro en Hanoi, li ĵus malfermis en Decembro 1936, Esperanto-kurson por siaj skoltoj. Espereble revigliĝos la movado . . . Espereble stariĝos nova "Franc-Anama Esperanto-Asocio" . . . Espereble . . . Ni esperu!

Notoj: (1-a) Franca Hindoĉinujo konsistas el 5 regionoj: 3 el ili, Tonkinio, Anamio, kaj Koĉinĉinio, kvankam administracie dividitaj, formas spirite unu landon: Anamujo (en anama lingvo, An-Nam aŭ Viêt-Nam), kun unu popolo (Anamoj); unu historio, unu lingvo, samaj partoj. Tonkinio estas la norda parto, Anamio la centra parto kaj Koĉinĉinio la suda parto de Anamujo.

(2-a) Ĉar la guberniestraro hindoĉina persekutas komunismon, ni petas la rusajn esperantistojn ne skribi al anamaj esperantistoj kaj peti korespondadon kun ili. Tio tre certe mortigus nian movadon en Hindoĉinujo.

N.V.N.

HISPANUJO

La Esperanto-movado, en Hispanujo, tre antaŭeniris dum la lastaj jaroj. Fondiĝis pluraj Esperanto-grupoj en preskaŭ ĉiuj hispanaj urboj. Hispana Esperanto-Asocio, landa asocio, kiu gvidas la Esperanto-movadon en tiu ĉi lando, atingis grandajn sukcesojn ĉe la popola medio, ankaŭ ĉe la diplomatio, kie ĝi atingis gravan kaj konstantan subvencio de la Ministerio por Publika Instruado, por disvastigo de la Esperanto-propagando. Ankaŭ la Nacia Patronaro por Turismo interesiĝis pri Esperanto kaj subvencis nian landan asocion por ke ĝi eldonu belan gvidlibron pri la marborda urbo Santander. Valencia Patronaro por Turismo ankaŭ eldonis belan faldprospekton

pri tiu ĉi urbo, kie la Esperanto-movado estas tre grava ; ankaŭ estas citindaj Santander, Zaragozo, Ferrol, Terrelavega, Barcelono kaj Madrid, kie la Esperanto-grupoj laboras tre vigle. Malfacile estas fiksi la nombron da esperantistoj, ĉar la plejmulto ne aniĝas en la Esperanto-organizaĵoj, sed la multnombraj Esperanto-kursoj, kiujn klarigas niaj fervoraj samideanoj, kaj la lerno-libroj venditaj pravas tre klare la gravan paŝon, kiun nia movado antaŭeniris.

Ankaŭ oni eldonas diversajn Esperanto-revuojn ; plej citindaj estas " Hispana Esperanto Gazeto," " Kataluna Esperantisto," " Nia Vivo," kaj aliaj de la laborista movado, inter ili " Popola Fronto " de Valencio.

H.E.A. havas 700 membrojn.

J.M.

HUNGARUJO

Hungara Esperanto Federacio.

Adreso : Budapest VII., Damjanich-u. 43

Oficiala organo : *Hungara Heroldo*, adreso : Redaktoro Prof. J. de Mihalik, Sashalom, Bejczy-u. 1.

Prezidanto : D-ro Āgost de Benárd, bravtitola.

Afergvid. prez. : Prof. Jozefo de Mihalik.

Vicprez. : Julio Baghy, direktoro Oszkár Auguszty.

Kasisto : Todor Kovács.

Konsuloj en 20 lokoj de la lando. Pro popolkultura celo oni eldonis en 1936 kajeron pri princo Francisko Rákóczi II.

Celo : Uzi la lingvon por utilo de la nacio, helpi la interkomprenon, paciĝon kaj reciprokan estimon inter la nacioj.

En Hungarlando funkciis en 1936 la Hungara Esperanto-Federacio, al kiu apartenis la Hungarlanda Esperanto-Societo, la Pedagogia Societo kaj kelkaj grupoj.

Plej efike laboris en *Budapest* la E.R.A.-klubo, aranĝante regule kursojn, kunvenojn, festojn, ofte kune kun aliaj societoj.

La federacio provis efike helpi la laboron kaj aranĝis okaze de la viena kongreso, kun subvencio de la ĉefurba magistrato, antaŭ-kaj post-kongresojn kun tre bonaj sukcesoj. Dum la postkongreso estis ankaŭ la Landa Kongreso, soleninta la dudekkvinjaran jubileon de la verkistoj Kalocsay kaj Baghy.

Bone funkciis en kelkaj urboj la gazetservo de H.E.S., kaj en provinco precipe la nova grupo *Ujpest* montris vivkapablon. Vigla vivo estas ankaŭ en la esperanta grupo de la Nacia Societo en urbo *Pécs*.

La Federacio eldonis la unuan kajeron por popularigi hungarajn historiajn personojn, komencante novan popolklerigan laboron. Precipe multon klopodis la afergvidprezidanto, prof. Mihalik. La multaj fremdlandaj gastoj atestis pri la bonintenca esperantista vivo en Hungarujo kaj certe oni ĝoje legas, ke la denove eklaboranta Katolika Esp. Societo intencas kun aprobo kaj sub ĉefprezido de la hungara ĉefepiskopo, prinĉprimato dro. Serédi la aranĝon de *katolika esperantista mondkongreso* en jaro 1938. Nova prezidanto de la Katolika Esp. Soc. fariĝis agema parlamentano Jozefo Petajnek. Menciinda estas la arte aranĝita stando de E.R.A. ĉe la printempa Internacia Foiro, kiu siajn reklamojn ankaŭ en Esperanto eldonis.

La du serioj de oficialaj poŝtkartoj kun esp. tekstoj estas daŭre en cirkulado. La eldonejo "Literatura Mondo" daŭrigis aperigi belajn kaj valorajn verkojn.

La *Landa Kongreso* okazos en 1937 en urbo *Ujpest* apud Budapest ; oni esperas, ke multaj el la kongresanoj de Varsovio uzos la okazon viziti la hungarajn esperantistojn, centron de nia literaturo.

P.B.

ISLANDO

Tute mankas raportoj pri nombro de la membroj de la Federacio de islandaj esperantistoj. La organizo estas tre malforta. Sed la intereso de la publiko por Esperanto neniam estis tiel granda kiel nun. Esperanto estas instruata per la ŝtata radio en Reykjavík. En la porinstruista lernejo en Reykjavík—ankaŭ ŝtata lernejo—nun okazas Esperanto-kurso. Hektografita gazeto elvenas en Isafjördur, "Mateno." Adreso : Mateno, Box 116, Isafjördur.—Adreso de la Federacio estas : Poŝtkesto 7, Hafnarfjördur.

O.K.

KATALUNUJO

Nacia Asocio: Kataluna Esperantista Federacio.— Adreso. Carrer València 245 enl. Barcelona.—Presorgano “Kataluna Esperantisto.” Membroj 350.—Asocia agado: organizo de ĉiujara kongreso kun Internaciaj Floraj Ludoj, propagando, instruado, interligado de la grupoj kaj unuopaj esperantistoj.

Seke de la civila milito, malvigligiĝis kelkaj agadoj de nia movado en Katalunujo, kiel organizo de liberaj aŭ publikaj kursoj, organizo de Kongreso kaj Floraj Ludoj, aperado de “Kataluna Esperantisto” k.a. sed vigligiĝis aliaj aŭ novaj aspektoj: enkonduko de Esperanto en oficialajn lernejojn, uzado de Esperanto por radiosendado de informoj pri la milito, utiligado de esperantaj servoj por perado inter amikoj aŭ parencoj de militkaptitoj aŭ disigitaj familianoj, ktp.

Esperanto-servo de la milito estas en la adreso Via Laietana 32, Barcelona. Ankaŭ la Delegito de I.E.L. laŭeble peradas de sia adreso Carrer de València 245, Barcelona.

D.D.

NEDERLANDO

Dum la lastaj jaroj la Esperanto-movado en Nederlando regule disvastiĝas. La ĉefaj esperanto-organizoj, kiuj prizorgas la ĉiujaran intensan propagandon en la diversaj medioj estas: Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo, Rom-Katolika Esperanto-Unuiĝo “Nederlanda Katoliko,” Nederlanda Esperanto-Asocio “La Estonto Estas Nia” (la landa organizo aliĝinta al I.E.L.) kaj la Nederlanda Kristana Esperanto-Unuiĝo. Krome ekzistas ankoraŭ kelkaj aliaj pli malpli gravaj esperanto-societoj. i.a. la Ned. Esp. Gruparo, konsistanta el kelkaj grupoj ekzistintaj en 1934 el L.E.E.N. Laŭtakse (precizaj nombroj ne povas esti donataj) estas ĉ. 9,000 esperantistoj organizitaj en ĉi tiu lando je la fino de 1936. Rilate al la multjara propagando tiu nombro estas sufiĉe malalta kompare al la miloj da nederlandanoj, kiuj iam konatiĝis kun nia lingvo. Estas rimarkinda fakto ke la esp-organizoj nur malrapide kreskas, ke ĉiujare ekzistas preskaŭ tiom da personoj el la societoj, kiom aliĝis. La kaŭzoj estas diversaj, kompreneble la nuntempa malbona ekonomia situacio ludas gravan rolon. Tamen ĉiujare denove estas organizataj multaj kursoj kun miloj da lernantoj, dum centoj da esperantistoj partoprenas la ekzamenojn.

La oficiala subteno de diversaj instancoj estas sufiĉe bona. En diversaj komunumoj la urbestroj disponigas salonojn por la kursoj, aŭ fakorganizoj subtenas la movadon, speciale la Federacion de Lab. Esperantistoj. Konataj estas la faktoj, ke la nederlanda registaro ĉiujare delegas reprezentanton al la Universala Kongreso, ke unu el la ĉi tieaj ekzamenaj komitatoj havas ŝtatan delegiton, ke la direkcio de la P.T.T. same kiel tiu de la Nederlandaj Fervojoj diversmaniere subtenas la movadon, ke la urbestro de Arnhem disponigis la t.n. Esperanton-Domon al la Internacia Cseh-Instituto en Hago. Dum la lastaj monatoj ankaŭ la eldonisto de *Heroldo* trovis sidejon en ĉi tiu lando. Multaj lokoj jam eldonis esperantajn broŝurojn, dum la radio-stacioj Hilversum I kaj II regule sendas kursojn, prelegojn. k.t.p. Estas nur kelkaj faktoj menciitaj, tamen oni notis jam diversajn aliajn pli malpli gravajn, sukcesojn de multjara propagando, kiuj multe kontribuas al la enradikiĝo de Esperanto en la nederlanda enloĝantaro.

Estas multaj esperantistoj en Nederlando, kiuj ĝisfunde pristudas nian lingvon kaj ĉiel klopodas teni ĝin pura kaj originala. Tio manifestas en la regula aperado de bonaj lerno-kaj leglibroj k.t.p., kies lingva stilo pli kaj pli perfektiga, eĉ tiel, ke ĝia influo estas sentebla eksterlande.

La landa asocio L.E.E.N., kies estraranoj plenumas siajn taskojn senpage, prizorgas diversajn gravajn servojn, i.a. libro-servon, gazetarservon, ekzamenan-komitaton kune kun F.L.E., bibliotekon, k.t.p. por siaj membroj; ĉiujare ĝi regule propagandas multajn kursojn. Menciinda estas, ke la ĵus eldonita lernolibro de tiu asocio jam havis grandan sukceson. Post ĝia oficiala aliĝo al I.E.L. multaj delegitoj estas nomitaj, kies reto regule disvastiĝas sub la lerta gvidado de la ĉefelegito.

Kompare al la areo kaj la nombro de enloĝantoj Nederlando staras en la unua vico de la esperanto-movado. Estas certe, ke estontece povos esti notataj pli da sukcesoj, se la aliaj landoj imitos tiun ekzemplon. La subteno de oficialaj instancoj kaj la eklerno de la lingvo en ĉiuj medioj de la socio ja multe dependas de la ĝenerala disvastiĝo en la tuta mondo.

M.

NORVEGUJO

Dum la jaro 1936 la Esperanto-movado entute progresis en Norvegujo. La progreso ne estas granda, espereble despli certa.

La 27an de Januaro N.E.L. festis sian 25-jaran jubileon. Okaze de ĝi okazis radioelsendo. 40 gazetoj enhavis artikolojn pri la afero. La jubileo entute estis bona propagando.

Oni ellaboris agadplanon por la jaroj 1936-37, kaj la laboro dum la jaro okazis laŭ ĝi. La rezulto de la unua jaro ne estas brila, sed oni rikoltis multajn spertojn.

La membronombro altiĝis de 425 por 1935 ĝis 500 je la jarfino. Aliĝintaj estas 24 kluboj, kontraŭ 16 en 1935. Fondiĝis 10 kluboj, kaj okazis 18 kursoj en la diversaj partoj de la lando. Partoprenis ilin ĉ. 400 personoj.

N.E.L. eldonis dum 1936 nur unu malgrandan libron, nome *Norvega Kantareton* kompilitan de f-ino *Liv Sandberg*, la lerta red. de Esperantobladet. Oni krome prilaboras grandan Esperanto-norvegan vortaron.

En la Ŝtata Radio okazis 8 disaŭdigoj aranĝitaj de N.E.L.

La gazetaro—kiel kutime—estas sufiĉe favora. La Gazetara Komitato de N.E.L. (prez. A. Jensson) dissendas notojn pri Esperanto ĉiusemajne al ĉ. 140 norvegaj gazetoj, t.e. pli ol duono de la taggazetaro. Ĝi registris dum 1936 1,350 artikolojn k.c. pri Esperanto en pli ol 150 gazetoj kaj ĵurnaloj. En 1935 la nombroj estis 100 gazetoj kaj 900 art. Tiu ĉi pergazetara propagando tre bone funkcias, kaj ĝia valoro estas sufiĉe granda. Ĉar ĝi ankaŭ kostas malmulte, ĝi estas rilate al la elspezoj eble la plej efika propaganda laboro. Ni tamen sentas mankon de internacia centra gazetarservo.

Dum Novembro vizitis nian landon S-ro Joseph R. Scherer, kiu faris lumbildprelegojn en kelkaj urboj. De post septembro rondvojaĝas la Tirola Kvaro Edelweiss, kiu dum 1936 faris prezentadojn en 60 lokoj antaŭ proks. 10 mil homoj. La kvaroj samtempe faras bonan propagandlaboron.

N.E.L. komencis starigon de sliparo pri ĉiuj norvegaj esperantistoj konstateblaj. Oni konstatis ke troviĝas esperantistoj en ĉ. 300 lokoj—1933 : 225.

La 13/3 mortis nia malnova samideano Honoratus Bonnevie, L.K., honora membro de U.E.A. kaj de N.E.L. Li testamentis al N.E.L. ĉiujn siajn Esperantajojn kaj parton de sia postlasita kapitalo.

La impresoj pri la jaro 1936 estas : Fortiĝo de la organizado, progreso kaj nombre kaj kvalite. La nombroj pri korespondado kaj la laboroj de la Ligo entute montras konsiderindan kreskon.

La estraro estas ĝis la jarkunveno en majo la sama kiel en 1935, nome : prez. S-ro E. Stjernesund ; vicprez. : F-ino Liv Sandberg ; ĝen. sekr. : S-ro Arnfinn Jensson ; sekr. : S-ro Carl Støp-Bowitz ; kasistino : F-ino Esther Grønneberg.

Eble nia plej granda venko estas, ke ni sukcesis igi la Fremdultrafikan Asocion por Oslo kaj Ĉirkaŭaĵoj aranĝi internacian tradukkonkurson. La celo estas : nacilingva represo en la eksterlanda gazetaro de tri artikoloj pri Oslo publikigitaj en Esperanto kaj dissenditaj al la tuta mondo. La konkurso gvidas nia komisiulo por turismo, F-ino *Liv Sandberg*.

La konkurso ankoraŭ ne estas finita, kaj pri la rezulto estas tro frue ion diri. Sed la intereso montrita estas granda, kaj verŝajne ĝi estas la plej granda siaspeca konkurso ĝis nun entreprenita.

N.E.L.

Lingvo-Libro kvaronjara gazeto informas vin plej detale pri nia lingvo kaj pri la Esperanto-libroj, sur 64 grandformataj paĝoj. Abonprezo por tuta aro du respondkuponoj. Por tri ekzempleroj, sendataj al sama adreso, kvar respondkuponoj. Mendebla ĉe ĉiu librovendisto kaj ĉe Literatura Mondo, Budapest IX. Soroksári-ut. 38, Hungarujo.

NOVZELANDO

La agado de la Novzelanda Esperanto-Asocio plifaciligis dum 1936 per la ŝanĝo de la personaro de la Registaro en Novembro, 1935, kiam enoficiigis Laboristara Partio, kies programo entenas la jenan projekton: *La universala lingvo—Esperanto—estu en la lecionaro de ŝtatlernejoj.*

La N.Z.E.A. membraro pligrandiĝis de 101 ĝis 127 financaj anoj. Funkciadis 11 kluboj. Samideanoj kelkloke celas starigi aliajn dum 1937. La financa situacio de N.Z.E.A. plifortigis per profito de £7.

Okazis la 8a nacia kongreso ĉe Christchurch je Novjaro, 1937; sed tiaj kongresoj okazis ĉiujare de post 1929.

La Novzelanda Esperanta ĵurnalo, *La Interna Ideo* daŭras progresi kaj atingis ĝian duan jaron. Ĝi bone servas la Novzelandan Esperantistaron, kaj posedas kelkajn abonantojn el transmaraj landoj.

Por la unua fojo, la N.Z.E.A. estis reprezentita ĉe Universala Kongreso (28a, ĉe Wien).

Traduka Provo de N.Z.E.A. (por unuajaraj klublernantoj, kaj okazigita sub persona kontrolo de respondeca kluboficisto) altiris 53 kandidatojn. Pro diversaj kaŭzoj, tamen, nur 29 ekzameniĝis, el kiuj 26 sukcesis.

Turismo: Post petoj de N.Z.E.A. kaj de la ĉefdelegito de U.E.A. dum kelkaj jaroj, kaj post prezento de du-tri rezolucioj de naciaj kongresoj, la registara Departemento por Turismo kaj Propagando decidis eldoni en Esperanto apartan tradukon de angla priskribo de turista broŝuro. La decido estas grava, ĉar ĝi portas oficialan akcepton kaj uzon de Esperanto.

La ĉefa celo de la propagando de N.Z.E.A. estas la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Tiacele, la N.Z.E.A. verkis kaj prezentis petskribon al la Ministro por Publika Eduko. Je skribtempo, N.Z.E.A. atendas la oficialan decidon en 1937, kiam la registaro plene konsideros kaj esploros la edukan laborplanon en Novzelando.

W. H. K.

PORTUGALUJO

Antaŭ la kontraŭstaro de la portugala registaro kaj la deviga fermigo de ĉiuj esperantistaj asocioj en Oktobro 1936, vikle laboris en Portugalujo kaj precipe en Lisbono la sekvantaj elementoj:

Lisboa (ĉefurbo de Portugalujo)—

Esperantista Sekcio de Touring Club de Portugal.

Esperantista Sekcio de Popola Portugala Universitato.

Laborista Esperantista Societo—Nova Vojo, kun ĵurnalo *Portugala Esperantisto*.

Laborista Esperantista Societo—Antaŭen.

Ligo de l'Okcidentaj Esperantistoj.

Grupo—Lumo kaj Progreso (1a filio de Nova Vojo).

Grupo—Fratiga Stelo.

Grupo—Nova Sento.

Grupo—Frata Unuiĝo de Alfamo.

Portugala Instituto de Esperanto.

Portugala Teritorio de I.E.L.

Esperantista Sekcio en “Blindula Instituto—Antonio Feliciano de Castilho.

Radio-Stacio CT 1AA (dissendoj per mallongaj ondoj).

Radio-Stacio CT 1GL /Radio Club Português (dissendoj per mezlongaj ondoj/paroladoj kaj kursoj).

Radio-Stacio CT 1AN /Radio-Graça (dissendoj per mezlongaj ondoj/paroladoj kaj kursoj).

La ĵurnalo *A Vida Social* propagandis per dufojmonata paĝo.

La ĵurnalo ĉiutaga *Republica* propagandis per dufojmonata paĝo kaj multaj konstantaj informoj kaj artikoloj.

Paga kurso per korespondado en la programo de “Komerca Portugala Lernejo” (Escola Comercial Portuguesa por Correspondência).

Kurso en la Scienca Fakultato—Politeknika Lernejo (ĉeesto de studentoj de ĉiuj fakultatoj).

Barreiro

Laborista Esperantista Societo “Progresemaĵoj Amikoj.”

Coimbra

Koimbra Esperantista Grupo.

Funchal

Madejra Esperantista Societo "Atlantika Perlo."

Gelfa (Minho)

Malsanula Esperantista Grupo "Norda Stelo."

Setubal

Disvastiga Stelaro.

Silves

Esperantista Grupo "Verda Stelo."

En ĉiuj asocioj estis funkciaj kursoj kaj la delegitoj de I.E.L. (37) senteme laboris tra la tuta lando kaj kolonioj. Notindaj la propagandigaj ekskursoj de "Progresemaj Amikoj" "Nova Vojo" kaj "Antaŭen." En "Nova Vojo" interese gaŭso kurso de "Historio de Esperanto" gvidita de la malnova kaj tre konata kaj kompetenta esperantisto Luzo Bemaldo.

Oni pensas ke la hitlera ondo, blovata de misteraj nekonsciaj pensoj, flugis okcidenten ĝis la portugalaĵ superaj instancoj, altirante ilin al abisma maljusteco. Hieraŭ oni oficiale permesis la uzadon de la Esperanta distingilo sur la maniko de la policaj militvestoj; hodiaŭ, la samaj superaj instancoj oficiale ordonas la neuzadon de la emblemo, malgraŭ la oficiala konstato de bonaj turismaj servoj de la policistoj. Hieriaŭ, ili konstatis ke la Esperantista Sekcio de Touring Club de Portugal honeste kaj patriote laboras en la diskonigo de la turismaj portugalaĵ belaj; hodiaŭ, sen iu ajn ekspliko, klarigo, komprenigo, ili senkonsciencioproĉe konsentas, dum ĉirkaŭ du monatoj, la policiajn sigelojn ĉe la pordoj de la Sekcio. Oni ne povas dubi la nacismon de Brazilo, de Italujo, de Japanlando kaj tiuj-ĉi landoj uzas Esperanton, utiligas Esperanton, tute je profito de siaj intencoj. Esperanto, ĉiam kaj ĉiam, estas neŭtrala por ĉiu kaj ĉiuj.

Jen rapida noteto pri laborrezultoj kiuj ĝojigas nin.

Kiam movado atingas ĉi-tiun nivelon, ĝi estas kontentiga, malgraŭ oficialaj perfertoj.

S.C.

SVEDUJO

3-jara laborplano.—Por la periodo 1935-1937 Sveda Esperanto-Federacio (S.E.F.) starigis t.n. 3-jaran laborplanon por la estraro kaj la kluboj. Tiu laborplano inter

alie enhavis detalan tabelon pri la dezirinda nombro de membroj en ĉiuj lokaj kluboj. Kaj la dezirinda nombro egalas la kvadratan radikon de la loka loĝantaro.

Membronombro.—En la jaro 1936 S.E.F. atingis membronombrom de ĉ 3,000. Al la federacio apartenis 130 kluboj.

"Esperanto-semajno."—La lastan semajnon de Septembro estis organizita en la tuta lando "Esperanto-semajno." Kiel speciala propagandilo estis vendata la septembra numero de Sveda Esperanto-gazeto, kiu enhavis valorajn artikolojn i.a. de prof. Björn Collinder, fregatkapitano Arvid Flory, D-ro Börje Brilioth kaj lektoro Bjarne Beckman, De la propaganda numero vendiĝis 20,000 ekz.

Koresponda kurso.—En la aŭtuno 1936 aperis nova koresponda kurso, kiu tuj fariĝis bona reklamilo. En kelkaj monatoj pli ol 2,000 personoj komencis studi tiun kurson. La prezo de tiu kurso estas malalta, nur 1 svedan kronon.

Eksterlandaj instruistoj.—La jenaj eksterlandaj instruistoj faris gravajn servojn al la sveda movado pere de kursgvidado kaj prelegado: S-ino Madeleine Haudebine, S-roj Alinger-Ajo, T. Morariu, A. Rois, kaj Fr. Szilagy.

Prelegistoj.—En la jaro 1936 estis organizitaj prelegvojaĝoj por: F-ino Elinjo Pähn el Estonio, S-ro J. Scherer el Usono, S-ro L. Sinha el Hindujo, kaj S-ro T. Thordarson el Islando.

Enlanda gazetaro.—S.E.F. starigis gazetan servon, per kiu la gazetaro en la tuta lando konstante ricevis informojn pri Esperanto-novajoj eksterlandaj. Regule 30 tagaj gazetoj aperigis tiujn novajojn.

Eksterlanda gazet servo.—Sved-Internacia Gazet servo (The Swedish International Pressbureau) daŭrigas la ĉiusemajnan dissendon de novajoj el Svedlando al ĉ 80 Esperanto-reprezentantoj en 30 landoj. Tiu ĉi fako estas unu el la plej sukcesaj rilate al la praktika utiligado de Esperanto.

Ekspozicio.—"La fluganta ekspozicio" de S.E.F. fariĝis tiel ŝatata de la aliĝintaj kluboj, ke estis necese aranĝi duan ekspozicion.

Modelaj prelegoj.—La estraro kompletigis la jam multobligitajn prelegojn per "La signifo de Esperanto en la internacia paclaboro." Je la jarfino 1936 estis ankaŭ multobligitaj kelkaj svedlingvaj teatraĵoj, celantaj Esperanto-propagandon. La skribitaj prelegoj kaj teatraĵoj estis lueblaj de la Esperanto-kluboj.

Esperanto-gazeto.—De la oficiala revuo Sveda Esperanto-gazeto aperis regule ĉiumonate ĉ 4,000 ekz. Ĉiuj kluboj kaj izolaj membroj de S.E.F. sen speciala abono ricevas po 1 ekz. de la gazeto.

Librovendado.—Eldona Societo Esperanto, kiu grandparte estas posedaĵo de S.E.F., prizorgis la librovendadon kaj la eldonon de kelkaj novaj libroj. En la jaro 1936 oni vendis librojn por la sumo de ĉ 30,000 sved. kr.

Ekzamenoj.—Sveda Esperanto-Instituto estas la ekzamena instituto de Svedlando. En 1936 la instituto ekzamenis 1 personon por la Instruista atesto, 44 por la Supera ekzameno, kaj 117 por la Elementa ekzameno.

Radiaj dissendoj.—Universitata profesoro Björn Collinder prelegis dum la jaro 1936 ĉiumonate unufoje en la sveda radio pri la temo “Kompara lingvoesploro.”

Turistvojaĝoj.—Esperanta Turista Komisiono aranĝis en 1936 plurajn grandajn grupvojaĝojn al Estonujo. Speciale alloga por la ĝenerala publiko estis la t.n. “E.T.K.-libertempo,” por kiu la turistoj enpagis certan sumon kaj ricevis ne nur vojaĝbiletojn sed ankaŭ loĝejon kaj manĝon. E.T.K. prizorgis 453 turistojn al Estonio kaj akiris bonan famon kiel fidinda kaj ŝatata turistoficejo kiam temas pri libertempaj ekskursoj al Estonujo. Cetere E.T.K. ankaŭ gvidis 50 kongresanojn al la Viena kongreso tra la urboj Praha kaj Budapest.

Estraro de S.E.F.—Prez.: Red. Paul Nylén. Vicprez.: Rektoro Sam Jansson. Sekr.: Ernfrid Malmgren. Vicekr.: Verner Hägglund. Kasisto: Sven Bolin. Anstataŭanto: Henning Halldor.

TURKUJO

La Esperanto-Movado bedaŭrinde ne estas en Turkujo bone konata, spite ke ni Turkoj travivas lastatempe nekredeble grandajn kaj gravegajn sociajn, naciajn, kaj kulturajn evoluciojn. La grandaj turkaj popolpartoj, kiuj loĝas en diversaj partoj de Eŭropo kaj Azio uzas la komunan turkan lingvon, kiu post adapto de latinaj literoj evoluigas tre rapide. La turka alfabeto nun estas iomete simila al tio de Esperanto. Kaŭzo por disvastigi la facile lerneblan Esperanton inter turkaj popoloj tial jam ekzistas: nur oni devas esti tre prudenta kaj atentema ne miksi la esperantan aferon kun aliaj internaciaj sociaj aferoj, ĉar tio povus endanĝerigi la movadon en la lando.

H.C.G.

URUGVAJO

La jaro 1936 estis vera vipo por la urugvaja esperantista movado: tri fervoraj kaj bonaj samideanoj marŝis al tiu lando de kie oni neniam revenas; Andrés Di Landro, dum jaroj Vic-Delegito de U.E.A. kaj trezoristo de U.E.S.; S-ro Enrique Muñoz, unu el la plej malnovaj esperantistoj de nia lando: S-ro Muñoz ĉeestis Universalajn Esperantajn Kongresojn kiel oficiala Delegito de urugvaja ŝtata estraro. Laste mortis S-ro Enrique Legrand, ankaŭ fervora esperantisto kaj sufiĉe konata kiel scienca homo. La vera urugvaja movado estas tre malforta. Propagando tre malmulta; nur iuj ĵurnalaj artikoletoj aŭ anoncetoj. Unu kurso okazis dum la jaro kun malmultaj ĉeestantoj, kaj la “Urugvaja Esperanto Instituto” gvidas alian kurson per poŝto.

Ni intencas proponi “senpagan Esperantan Kurson” por la proksima jaro en nia nacia Universitato. Baldaŭ ni sendos tian demandon al la universitata estraro.

En nia lando laboras fervore por Esperanto nur S-ro James Schnoerr, S-ro Rodolfo Garcia, S-ro Jacobo Marinovich kaj mi.

P.C.

ESPERANTO KAJ RADIO.

RAPORTO de la INTERNACIA RADIO-KOMISIONO KOMISIITA de I.E.L.

Denove pasis unu jaro, sed mi jam antaŭe devas diri, ke ĉi tiu jaro ne estis unu el la plej sukcesaj. La krizo en Esperantujo sufiĉe grave influis ankaŭ la laborojn de la Komisiono. Tamen ni ankaŭ povis noti sukcesojn; ĉefe en Danujo, Ĉeĥoslovakujo kaj Francujo pli kaj pli naciaj radio- kaj tag-gazetoj publikigas la Esperanto-Radio-Programon kaj la Radio-Club-Espérantiste de Francujo ĉiam pligrandigis sian membraron.

Laborstato.—En la jaro 1936 la Komisiono prilaboris 1807 Esperanto-dissendojn el 86 sendstacioj en 19 landoj. Sole la prezidanto forsendis ĉirkaŭ 1000 sendaĵojn.

Sukcesoj.—Sekve de tiu senlaca laboro la sukceso estis neatendite ampleksa. Granda nombro de gravaj naciaj radio-jurnaloj kaj tag-gazetoj nun regule publikigas la Esperanto-Radio-Programon eldonita de I.R.S. kaj miloj da legantoj ĉiusemajne estas atentigitaj pri la Esp.-movado kaj ĝia vera internacia disvastiĝo.

Esperanto-Radio-Programo (E.R.P.).—La E.R.P. mem, kiun kompilis la prezidanto de la Komisiono, aperis en la tuta jaro ĉiumonate. La kompilado de tiu programo ofte kaŭzas multajn senutilajn laborojn kaj mi per tio ankaŭ petas la Radio-parolantojn kaj kursgvidantojn de la sendstacioj subteni nian laboron kaj raportoj po monate pri la Esp.-dissendoj regule ĝis la 12a ĉiumonate.

Radio-Rubriko de "Heroldo."—Precipe laŭdinda estas la rapideco, per kiu la redakcio de Heroldo publikigas la enirintajn informojn. Nur per la semajna gazeto *Heroldo* estas eble, sekvi al la rapidege ŝanĝiĝantaj Radio-dissendoj de la sendstacioj.

Radio-Parto en la Jarlibro de la Esperanto-Movado.—Grave estas, ke en la Jarlibro de la Esperanto-Movado eldonata de I.E.L. oni aranĝis Radio-parton. Malgraŭ tio, ke ankaŭ la kolekto de tiu materialo kaŭzis multan laboron kaj kvankam la materialo ne estas plen-plena, ĉi tiu parto estos la bazo de niaj laboroj en la venonta vintro.

Zamenhof-Festoj en Radio.—Sendube efika kaj facile atingebla propaganda entrepreno estas la aranĝo de Zamenhof-festoj en Radio la 15 de Decembro. Jam kelkaj sendstacioj aranĝis tiun feston parte de si mem, parte laŭ instigo de la Komisiono. Kelkaj kunligis la

feston kun Esperanto-koncerto, Esperanto-deklamoj ktp. En aliaj sendstacioj nur estis eble atingi mallongan paroladon pri Zamenhof kaj lia verko.

Program-Anoncado en Esperanto.—La celo de la laboro de la Komisiono estas ke la sendstacioj anoncu la nomon, la paŭzon kaj la programon en Esperanto.

Sed por sukcesi je tiu celo, mankas ankoraŭ grava antaŭkondiĉo: Radio-frazaro kaj Radio-vortaro.

Subteno de la Radio-Parolantoj.—Ĉefa tasko, al kiu la Komisiono dediĉas la plej gravan atenton estas la subteno de la Radio-parolantoj. La subteno okazas unuavice per publikigo de la dissendoj kaj informo pri la adreso de la sendstacio en la E.R.P. kaj pere de la Kunlaborantoj en la Esperanto-gazetaro kaj naciaj Radio-jurnaloj. Momente la Komisiono serĉas ĉie Radio-kunlaborantojn, kies tasko estas, atentigi la esperantistojn al tiuj dissendoj kaj prizorgi, ke ili aŭskultas la aranĝojn kaj raportas al la sendstacioj, por ke la sendsocietoj vidu, ke la aranĝoj trovas ankaŭ la atenton de la aŭskultantaro. La Komisiono intencas varbi Kunlaborantojn en ĉiu Esperanto-grupo kaj volas instigi la starigon de Radio-Komisiono en ĉiu nacia societo.

Estontaj taskoj.—La ĝisnuna laboro de la Komisiono ĉefe celas krei la bazon por efikplene prilabori la antaŭnomitajn problemojn. Sukcesoj nur malrapide atingeblaj. Tamen ŝajnas, ke la ĝisnunaj sukcesoj, konsiderante la treege malgrandan nombron da agantaj personoj, estas sufiĉe gravaj. Mi esperas, ke estos eble en la venonta jaro sur la fundo de la faritaj spertoj kaj per helpo de niaj kunlaborantoj, malnovaj kaj novaj, pligrandigi la sukcesojn kaj servi tiel al nia movado kaj al grava progreso de l'homaro, ĉu Radio, ĉu Esperanto.

Atingi ĉi tiun celon nur estos eble en komuna kunlaborado de multaj laboremaj gesamideanoj. Al ĉiuj, kiuj subtenis min en la lasta jaro mi diras ankaŭ per tiuj ĉi linioj mian plej koran dankon. Tute aparte mi dankas al la I.E.L. kiu per financa subteno kiel per sia morala helpo kaj aŭtoritato senteble helpis al nia laboro.

Ni estas certaj, ke ĉiuj ankaŭ en estonteco subtenos mian laboron. Same mi esperas, ke ĉiuj, kiuj ĝis nun staris flanke de niaj penadoj trovas ankaŭ la vojon al ni por helpi al nia fincelo:

Esperanto kiel Radio-Lingvo!

GUSTAV HENRIKSSON, *Prezidanto.*
Helsingborg, Svedujo, en Februaro, 1937.

STATO DE LA RADIO-STATISTIKO EN LA JARO 1936

Lando Sendstacio	Paroladoj en Esper- anto	Esp. kur- soj	Dissendoj ĝis fino de	
			1935	1936
Aŭstrujo				
Graz	33	32	329	394
Innsbrück	33	32	289	354
Klagenfurt	33	32	289	354
Linz	33	32	242	307
Vorarlberg	33	32	96	161
Salzburg	33	32	204	269
Wien	33	32	330	395
Belgujo				
Kortrijk	40	—	—	40
Brazilo				
Rio-de-Janeiro, P.R.F.5.	44	—	—	44
Rio-de-Janeiro, P.R.A.3.	—	6	—	6
Britujo				
North Regional	1	—	64	65
Ĉeĥoslovakujo				
Brno	12	—	173	185
Bratislava	12	—	87	99
Košice	12	—	21	33
Moravska Ostrava	45	—	34	79
Praha	12	—	60	72
Danujo				
København	1	—	361	362
Estonujo				
Tallinn	53	—	390	443
Tartu	53	—	269	322

Lando Sendstacio	Paroladoj en Esper- anto	Esp. kur- soj	Dissendoj ĝis fino de	
			1935	1936
Francujo				
Alpes-Grenoble	—	48	194	242
Bordeaux-la-Fayette	1	—	—	1
Cannes	1	—	207	208
Juan-les-Pins	22	17	207	246
Lille P.T.T. Nord	48	44	372	464
Limoges P.T.T.	—	48	135	183
Lyon-la-Doua	23	1	521	545
Radio-Lyon	—	39	140	179
Marseille-Provence	2	—	213	215
Nice	—	2	207	209
Paris P.T.T.	—	48	416	464
Tour Eiffel	—	—	116	116
Hispanujo				
Barcelona	9	—	—	9
Radio-Walence	17	—	—	17
Islando				
Reykjavik	—	18	24	42
Italujo				
Roma	47	—	82	129
Roma 2.R.O.	30	—	30	60
Milano	—	—	60	60
Jugoslavujo				
Ljubljana	4	—	236	240
Nederlando				
Hilversum I. V.A.R.A.	13	—	—	13
Hilversum II.	35	—	—	35
Huizen	—	—	386	386
Norvegujo				
Bergen	3	—	4	7
Fredrikstad	3	—	4	7
Oslo	3	—	77	80
Notodden	3	—	34	37
Porsgrund	3	—	34	37
Rjukan	3	—	34	37

Lando Sendstacio	Paroladoj en Esperanto	Esp. kur- soj	Dissendoj ĝis fino de	
			1935	1936
Polujo				
Kraków	9	—	87	96
Warszawa	9	—	72	81
Portugalujo				
Funchal C.T.3.A.Q. ..	115	—	—	115
Lisboa	—	—	51	51
Lisboa C.T.1.A. ..	—	—	56	56
Sovet-Unio				
Leningrad	126	—	535	661
Minsk	26	—	937	963
Svedujo				
Helsingborg	—	—	64	64
Karlskrona	2	—	63	65
Stockholm	8	—	46	54
29 relajsoj	232	—	927	1159
Svislando				
Genève	—	—	626	626
Sottens	30	—	117	147

Sendstacioj 86 en 19 landoj.

LAŬLANDA RADIO-STATISTIKO, 1936.

LANDO	Paroladoj en Esperanto	Esp. kur- soj	Dissendoj ĝis fino de	
			1935	1936
Alĝerio	—	—	32	32
Aŭstralio	—	—	115	115
Aŭstrujo	231	224	1779	2234
Belgujo	40	—	286	326
Brazilo	44	6	80	130
Britujo	1	—	64	65
Ĉeĥoslovakujo ..	93	—	375	468
Danujo	1	—	361	362
Dancigo	—	—	308	308
Egiptujo	—	—	2	2
Estonujo	106	—	697	803
Finnlando	—	—	20	20
Francujo	97	247	3062	3406
Germanujo	—	—	5850	5850
Hispanujo	26	—	616	642
Hungarujo	—	—	30	30
Ĥinujo	—	—	36	36
Irlando	—	—	3	3
Islando	—	18	24	42
Italujo	77	—	186	263
Japanujo	—	—	394	394
Javo	—	—	6	6
Jugoslavujo	4	—	436	440
Kanado	Informoj mankas		—	—
Koreo	—	—	15	15
Latvujo	—	—	7	7
Litovujo	—	—	393	393
Meksiko	—	—	61	61
Nederlando	48	—	506	554
Norvegujo	18	—	249	267
Novzelando	—	—	104	104
Polujo	18	—	201	219
Portugalujo	115	—	107	222
Sovet-Unio	152	—	2643	2795
Svedujo	242	—	1644	1886
Suez	—	—	1	1
Svislando	30	—	1023	1053
Turkujo	—	—	1	1
Urugvajo	—	—	83	83
Usono	—	—	415	415
Sumo	1343	495	22215	24053

VARSOVIO

Pro la okaziĝo de la Universala Kongreso ĉi tiun jaron en Varsovio, la sekvanta artikolo pri tiu urbo sendube interesos niĝan membrojn.

Varsovio (Warszawa—elp. Varŝava) estas ĉefurbo de Polujo. Laŭ legendo Varsovio estas fondita en la XI. jarcento, laŭ la historiaj esploroj ĝi estas fondita en la XIV. jarcento. De Varsovio ne apartenas al la plej antikvaj urboj de Polujo. De la jaro 1569 ĝi estas traktata kiel ĉefurbo de Polujo kaj dum longa tempo troviĝis sub diversaj fremdaj estradoj. En la jaro 1918 ĝi fariĝis ĉefurbo de la libera, sendependa Polujo.

Varsovio kalkulas nun ĉ. 1,300,000 loĝantojn kaj estas fokuso de politika kaj kultura vivoj de la tuta lando. Varsovio estas sidejo de ŝtatrezidanto, registaro, parlamento (Sejmo), ministerioj, fremdaj legacioj kaj aliaj gravaj aŭtoritatoj.

En Varsovio troviĝas ankaŭ multaj altlernejoj: Universitato, Pola Libera Universitato, Politeĥniko, Superaj Lernejoj por Komercio, Terkulturo, Politikaj Sciencoj, Ĵurnalistoj kaj aliaj. Ekzistas ankaŭ Instituto por Korpa Edukado (unu el la plej modernaj en Eŭropo).

Kulturajn postulojn de la loĝantoj priservas teatroj: Pola, Nacia, Opero kaj multaj aliaj regnaj kaj privataj. La teatra arto troviĝas je tre alta nivelo, kion konstatas ankaŭ multaj eksterlandanoj. Estas ankaŭ filharmonio kaj konservatorio.

Troviĝas ankaŭ en la urbo diversaj muzeoj kaj bild-galerioj. El la muzeoj ni notu unuavice Nacian, troviĝanta nun en bela nova konstruaĵo kaj Militistan, preskaŭ unikan en Eŭropo pro multaj objektoj, dediĉitaj al la milita medio dum multaj jarcentoj. El la bildgalerioj kaj salonoj vizitinda estas t.n. "Zacheta" (elp. Zaĥenta) kie troviĝas bildoj de polaj majstroj Matejko, Siemiradzki kaj aliaj.

Por legemuloj estas je dispono bibliotekoj: Publika, Nacia, Universitato kaj aliaj enhavantaj centmilojn da volumoj.

La ĉirkaŭrigardon de la urbo estas plej oportune komenci de la centro de Varsovio: placo je nomo de Marŝal Piłsudski (antaŭe Saksa), iame estinta antaŭkorto de la Saksa Palaco el la XVIII. jarcento (rezidejo de polaj reĝoj el la Saksa Dinastio). Antaŭ la palaco troviĝas monu-

mento al princo Poniatowski, ministro de milito de Varsovia Duklando (1807-1812) kaj skulptita de Thorvaldsen. Malantaŭ la monumento troviĝas Tombo de Nekonata Soldato. Post la palaco etendiĝas Saksa Ĝardeno kun skulptaĵoj el la XVIII. jarcento. Proksime al la palaco troviĝas Ministrejo por Eksterlandaj Aferoj. Kelkajn paŝojn de la placo ni troviĝas sur Teatra Placo, kies unuflankon okupas la urba domo kaj magistrato, la alian empira Granda Teatro (Operejo) kaj Nacia. De la Teatra Placo ni nin direktas al la malnova parto de la urbo, survoje vidante Ministrejojn de Terkulturo. Proksime al ĝi troviĝas belegaj salonoj, pentritaj de Bacciarelli, Pliersch, Canaletto kaj aliaj enhavantaj multajn belartaĵojn. (La kastelo estas vizitinda kaj vizitebla.)

Tute proksime al la Kastelo troviĝas Katedralo de S-ta Johano, gota konstruaĵo alikonstruita en la XIX. jarcento. Pro graveco de diversaj enlandaj okazintaĵoj estintaj en ĝi la Katedralo havas grandan historian signifon.

Ĉe la Katedralo komenciĝas la malnova parto de la urbo. Al la centro de la "Malnova Urbo" kondukas mallarĝaj stratoj kun antikvaj domoj, enhavantaj karakterizajn koridorojn kaj kortojn. Meze de la "Malnova Urbo" troviĝas placo Rynek (Vendejo), ĉiuflanke borderita de belaj domoj, el la XVI. kaj XVII. jarcentoj. Rimarkinda estas unu el la stratetoj de tiu ĉi urbparto ĉizita el ŝtono kiel ŝtupararo.

Estanta jam en ĉirkaŭaĵoj de la "Malnova Urbo" ni ne preterlasu la t.n. palacon de Pac (nun Distrikta Juĝejo) ĉe Miodowa str., kies duonrondan pordegon ornamas granda gipsa bareliefo, prezentanta Konsulon Flaminus, anoncanta liberecon al grekaj urboj en Korinto. De tiu ĉi palaco ni direktas nin al Placo Krasinski, kie troviĝas belega domego, baroko, el fino de la XVII. jarcento. Ambaŭflanke troviĝas sur ĝi bareliefoj, prezentantaj duelon de Marcus Aurelius kun Gallus kaj alvenon de Cezar al Romo. Nun en tiu ĉi placo estas la Supera Juĝejo. Sur la placo troviĝas du malnovaj putoj kaj antaŭ nelonga tempo starigita monumento al Jan Kiliński, botisto kaj kolonelo, nacia heroo el insurekcio de j. 1794.

Laciĝinte de la vagado tra la stratoj de la malnova urbparto kaj vizitinte ankaŭ kelkajn preĝejojn el la XIV., XV., XVI. kaj XVII., jarcentoj ni trovas nin ĉe strato Krakova Antaŭurbo, kie troviĝas Industria Muzeo kun Etnografia Fako, Ĉefministrejo, Sciencakademio. Sur la sama strato troviĝas monumentoj al la plej granda pola

poeto Adamo Mickiewicz kaj al la fama scienculo Nikolao Kopernik, projektita de Thornvaldsen. Kontraŭe de tiu ĉi monumento troviĝas preĝejo de S-ta Kruco kun rimarkinda statuo antaŭ ĝi, prezentanta Kriston sub la Kruco.

La daŭrigo de la "Krakova Antaŭurbo" formas strato "Nowy Swiat" (Nova Mondo), unu el la plej ĉefaj stratoj de la urbo. Flankenigante de ĝi ni povas iri al Placo de Napoleono kun ĉefpoŝtejo kaj la plej alta domo en Varsovio. Irante pluen tra Nowy Swiat, ni atingas aleon Jerozoliman, kiu maldekstren (kiel aleo de 3-a de Majo) kondukas al la nova konstruaĵo de "Nacia Muzeo" kaj la plej bela kaj longa ponto en Varsovio je nomo de Princo Poniatowski.

Daŭrigo de Nowy Swiat estas Aleo Ujazdowska, borderita de belaj palacetoj, ŝatata promenejo de varsovianoj. En la Aleo troviĝas ankaŭ Botanika Ĝardeno, Ujazdova Parko kaj Łazienki, la plej bela kaj granda parko de Varsovio (ĉ. 66 ha.)

Ĉefornamo de Łazienki estas belega palaceto, konstruita de la reĝo Stanislao Aŭgusto en la XVIII. jarcento kaj enhavanta multajn belartaĵojn de majstroj Bacciarelli, Piersch, Pinck kaj aliaj. Apud la palaca lago troviĝas unika en Eŭropo teatro sur insulo. Ankaŭ en Łazienki troviĝas aliaj palacetoj, statuoj kaj monumento al la reĝo Jan III. Sobieski (projekto de Pinck). En Łazienki troviĝas monumento al Frideriko Chopin, videbla ankaŭ de la Aleo Ujazdowska. En fino de la Aleo apud Łazienki troviĝas empira palaco, Belvedero rezidejo de Marŝalo Piŝudski. Nun muzeo.

De Belvedero ni direktas nin al Placo de Lublina Unio (Plac Unii Lubelskiej) kun monumento al la mortintaj aviadistoj. De la placo estas videbla tre impona konstruaĵo de Ŝtata Instituto por Higieno, tre interesa kaj nepre vizitinda al la interesuloj. Ĉe la placo de Lublina Unio komenciĝas la ĉefa strato de la urbo Marŝalkowska (elp. Marŝalkovska). En ĝia mezo troviĝas la ĉefstacidomo nun tute alikonstruata. En flankaj stratoj de Marŝalkowska troviĝas belegaj konstruaĵoj de Politeĥniko, moderna domo de Interurba Telefoncentro, Filharmonio, Pola Sparkaso kaj aliaj. Ankaŭ de tiu strato ni rapide povas atingi la novajn modernajn kvartalojn de la urbo.

Esperantistojn unuavice certe interesos lokoj kunligitaj kun la vivo de la Majstro kaj historio de nia movado. En la hebrea tombejo ĉe str., Okopowa, sur la plej honora loko troviĝas tombo de D-ro L. L. Zamenhof kun monumento

"starigita de Tutmonda Samideanaro." Apude estas tombo de Lia vivkamaradino Klara kaj iom pli malproksime troviĝas du tomboj de Leono kaj Felikso Zamenhof. En la apuda katolika tombejo estas tomboj de niaj unuaj pioniroj Grabowski, Zakrewski kaj aliaj. Ĉe la strato Zamenhofa 9 (antaŭe "Dsika"—Sovaĝa), troviĝanta en la malriĉa hebrea kvartalo, en la domo kie loĝis kaj laboris la Majstro estas enmurigita marmora tabulo dum la Postkongreso en la jaro 1931. Ankaŭ en la domon, kie loĝis kaj mortis Grabowski ĉe str. Hoża 42 (angulo de Marszałkowska) dum la VI. Tutpola Esperanta Kongreso en jaro 1933 oni enmurigis belan memortabulon. Nun vico estas por la domo ĉe str. Królewska 41, kie pasigis siajn lastajn vivospirojn nia neforgesebla Majstro, Kreinto de la lingvo internacia Esperanto, D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof.

I. DRATWER.

Tuj decidon prenu:
Varsovion venu!

LA ROLO DE LA DELEGITOJ POR LA PRAKTIKAJ SERVOJ

La delegitoj plenumas en I.E.L. plej gravan rolon. Dank'al ili kaj al la maniero, laŭ kiu ili konsentas plenumi sian rolon, la organizo de la praktikaj servoj povos, aŭ ne, fariĝi realaĵo.

Instrukcioj jam precizigis ilian rolon dum la pasintaj jaroj. Sed fakte ili sin okupis ĝenerale nur pri turismaj aferoj. La momento venis por peti la delegitojn en la grandaj centroj, ke ili bonvolu pligrandigi sian rolon laŭ la komuna deziro.

Ni tuj diras, ke ni ne intencas trudi novan ŝarĝon al la delegitoj. Ni nur volas proponi al tiuj, kiuj havas eblecon helpi al ni iom pli multe ol antaŭe, kelkajn taskojn, kiuj eble instigos ilin al novaj iniciatoj.

En la malgrandaj urboj oni kredeble nenion devos ŝanĝi. En la grandaj male, la lokaj organizaĵoj povos, se la nuna delegito ne deziras plimultiigi sian esperantistan laboron, meti apude la vicdelegiton aŭ fakan delegiton, kiu havos specialan taskon.

La rolo de la delegito iom aliformiĝis de l'momento, kiam I.E.L. fariĝis la sola esperantista centro, funkcia samtempe por la propagando kaj por la praktikaj servoj. La delegito ĉesas esti komisiita nur por la praktikaj servoj; li devas zorgi ankaŭ por la ĝenerala propagando. En la urboj, kie ne ekzistas propaganda grupo, li reprezentas ĉiurilate la asocion, kaj lia unua devo estas tie varbi novajn membrojn por I.E.L.

Pri liaj funkcioj, ŝajnas utile ilin precizigi. Estas dezirinde, ke la agado de la delegitoj celu ĉefe tri laborkampojn. Ĝi samtempe utilu al la komerco, al la turismo, kaj al la kultura interrilato.

I. *Komerco.*—(a) La delegito donu informojn pri komercaj aferoj. Se ekzistas en lia komunumo komerca ĉambro aŭ informasocio, li turnu sin al ili; kaj tiel li eventuale povos limigi sian laboron al traduko de la demanda letero.

(b) La delegito akceptu kaj konservu komercajn cirkulerojn, prospektojn, k.t.p. Unufoje ĉiujare, prefere en la aŭtuno, li aranĝu en montrejo de iu komerca firmo ekspozicion per helpo de la ricevitaj dokumentoj. La delegito devas pri ĉiu dokumento doni malgrandan resumon en sia gepatra lingvo. La loka Esperanto-grupo devas helpi por la organizo de tiu ekspozicio.

(c) La delegito vizitu la lokajn komercajn firmojn kaj asociojn, kiuj vendas varojn eksterlanden, kaj instigu ilin pretigi en Esperanto cirkulerojn, prospektojn, gvidfoliojn, k.t.p. La loka esperantista grupo helpu la delegiton prepari la dokumentojn. Se temas pri longaj tradukoj, la koncerna firmo devas pagi la faritan laboron. La pres- kaj sendkostojn pagu kompreneble la firmo.

Kiam la delegito vizitas la firmojn por fari siajn proponojn pri reklamo per Esperanto, li havu en manoj statistikajn dokumentojn pri la disvastiĝo de esperanto en la diversaj medioj.

II.—*Turismo.*—(a) La delegito informu la esperantistajn turistojn, parole aŭ letere, pri vidindaĵoj, vojaĝeblecoj, hoteloj, prezoj, k.t.p.

(b) Li akceptu kaj konservu turismajn broŝurojn, cirkulerojn kaj gvidfoliojn. Unufoje ĉiujare, prefere en la printempo, li aranĝu ekspozicion en montra fenestro de iu vendejo. Se la loka esperantista grupo posedas propran afiŝtabulon aŭ keston, la turismaj broŝuroj povos esti montrataj pli ofte. Cetere la turisma ekspozicio estu aranĝata proksimume kiel la komerca.

(c) La delegito instigu laŭpove la lokajn turismajn asociojn eldoni siajn gvidfoliojn kaj broŝurojn en Esperanto. Pri la agmaniero, li sekvu la konsilojn sub Ic.

III.—*Kultura interrilato.*—La delegito laŭpove respondu al demandoj pri kulturaj, juraj, literaturaj kaj sciencaj aferoj. Lia rolo estu precipe: serĉi en la hejmgregiono statistikajn informojn, kopii en bibliotekoj kaj muzeoj maloftajn dokumentojn, k.t.p.

IV.—*Konigo de la delegito.*—(a) La ĝenerala publiko estu informata pri la nomo kaj adreso de la delegito. Prefere sur la muro de la domo, en kiu loĝas la delegito, estu tre videbla I.E.L.-ŝildo kun la nomo de la delegito. Tia ŝildo

kun adresinformo estu ankaŭ metata laŭeble en la fervoja stacio, poŝta domo, komerca ĉambro, urbdomo kaj ĉe la enirejo de la urbo.

(b) La delegito informu la redakcion de la loka komerca gvidlibro pri siaj nomo kaj adreso, por enpresio.

(c) Tuj kiam li estas elektita, kaj poste, ĉiujare, en la mezo de januaro, la delegito sendu al la lokaj gazetoj, en sia gepatra lingvo, informon kun la peto, ke oni aperigu artikoleton pri liaj funkcioj.

V.—*Honorofico*.—Senpage donu la delegito mallongajn informojn pri petitaj demandoj. La demandinto nur kunsendu internacian respondkuponon por kovri la poŝtelspezojn. Se tamen farita demando postulos oferon de konsiderinda tempo, la delegito, post tuja enketo, respondu al la petinto, ke informo estos sendata kontraŭ monsumo kompensanta la tempo-perdon. Ĉiu oferita horo estu kompensata per 1 ĝis 1,50 svisa franko. Krom tio, transportaj kaj aliaj elspezoj de la delegito estu kompensataj.

La delegito ĉiam akurate plenumu sian funkcion kaj tuj respondu al faritaj demandoj.

La agadkampo de la delegito ne estu limigata, kaj laŭbezone li ĝin pligrandigu.

La iom vasta laborprogramo, kiun ni proponas hodiaŭ al la iniciatemo de la delegitoj, celas kelkajn novajn punktojn, kiuj montriĝis gravaj. Estas klare, ke la plej multaj delegitoj kun plezuro sekvas la ĉi-suprajn konsilojn, por tiel grandigi la efikecon kaj praktikan valoron de I.E.L.

SE NE ESTAS DELEGITO

en via urbo, kaj vi estas preta kaj kapabla tiel agi, bonvole sciigu al la Ĉef-Delegito por via lando, aŭ, se tiu ne ekzistas, al la Centra Oficejo de I.E.L.

GRAVA NOTO

La nuna jarlibro enhavas la nomojn de la delegitoj aliĝintaj ĝis la fino de Februaro, 1937.

Sed multaj tiaj aliĝoj ankoraŭ alvenas ĉiutage, kaj detaloj pri tiuj troviĝas en la "Oficiala Informilo" kiu aperas ĉiusemajne en *Heroldo de Esperanto* kaj ĉiumonate en *Esperanto Internacia*.

Krome, se eble, **kaj tio dependas de la subteno de la Esperantistoj**, ni eldonos en la aŭtuno jarlibran suplementon kun listo de la aldonoj kaj ŝanĝoj, kaj ni sendos ĝin senpage al ĉiu membro.

Por ke tio estu farebla, tamen, ni bezonas vian helpon en la varbado de novaj membroj. La centra oficejo sendos aliĝilojn kontraŭ peto.

Ĉi-kune ni sendas kelkajn specimenajn I.E.L.-glumarkojn, kiujn vi povas meti sur la kovertojn de viaj leteroj al aliaj Esperantistoj. Se vi deziras ricevi pliajn, ni sendos po 50 kontraŭ unu internacia respondkuponon.

Ĉef-Delegitoj de I.E.L.

- Aŭstrujo .. Gustav Weber, Neue Burg, Heldenplatz, Wien, I.
- Brazilo .. Luiz da Costa Porto Carreiro Neto, Rua 24 de Maio 424, Rio de Janeiro.
- Britujo .. Fred Wadham, Holmbury, Woodcote Hurst, Epsom (Surrey)
- Bulgarujo .. Ivan Kotov, Nacia Banko, Ruse.
- Danlando .. Martin Palsberg, Nyborggade 3, Aarhus.
- Francujo .. Célestin Rousseau, 2, Rue Alfred de Vigny, Bécon-les-Bruyères (Seine).
- Hungarujo .. Pál Balkanyi, Creditbank, Budapest 507.
- Litovujo .. Liudas Alseika, Žemtvark, Ukmergė.
- Nederlando .. Pieter Hendrik Mooij, Teunisbloemlaan 19, 's Gravenhage.
VĈD : Jozef Ravestein, Pomonalaaan 55, 's Gravenhage.
- Norvegujo .. Ragnv. Rian, Box 178, Trondheim.
- Polujo .. Michał Chmieliński, str. Krasynskiego, Wydział Dróg Wodnych Urz. Woj., Toruń.
- Portugalujo .. J. de Saldanha Carreira, Av. Duque de Loulé 50. III., Lisboa.
- Svedujo .. Karl Wästfelt, Lundagatan 44 uppg. 2 IV, Stockholm.
- Urugvajo .. Pedro Casas, Str. San José 1123, Montevideo.
- Usono .. Donald E. Parrish, 328 W. 46th St., Los Angeles (California)

Perantoj de I.E.L.

- Brazilo .. Brazila Ligo Esperantista, Av. Marechal Floriano 212, Rio de Janeiro.
- Britujo .. Brita Esperantista Asocio, 142 High Holborn, London, W.C.1.
- Ĉeĥoslovakujo .. Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko, Uralské nám. 447, Praha XIX.
Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakio, Klotildenstrasse 6-II, Reichenberg.
- Grekujo .. D-ro Anakreon Stamatiadis, Str. Rodou 21, Athenai.
- Italujo .. Esperanto-Centro Itala, Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano.
- Japanujo .. Japana Esperanto-Instituto, Hongoo Motomači, Tokio.
- Jugoslavujo .. D-ro Ivo Lapenna, Deželićeva str. 44-II, Zagreb.
- Katalunujo .. Ferdinand Montserrat, Str. Provenza 75, 2º, 3a, Barcelona.

RIMARKOJ PRI LA ADRESARO DE LA DELEGITOJ KAJ GRUPOJ

Tiu ĉi Adresaro estas ordigita ĝis la 15a de Februaro 1937. Por ĉiuj postaj ŝanĝoj aŭ korektoj de la Delegita Adresaro oni vidu la "Oficialan Informilon de I.E.L."

Krom la adresoj de la Delegitoj ni aldonis noton pri la lokaj Esperantistaj organizaĵoj kun ilia adreso, kunvenejo kaj laŭeble la tago kaj horo de la kunvenoj. Tiuj informoj plejparte estas senditaj pere de la Delegitoj; respondecon pri tiuj informoj ni ne akceptas.

La personoj pretaj preni sur sin la taskon de Delegito, Vicdelegito aŭ Fakdelegito, kie I.E.L. ankoraŭ ne estas reprezentata, bonvolu skribi al la Landa Ĉefdelegito aŭ al la Centra Oficejo.

MALLONGIGOJ

ĈD = Ĉefdelegito	L = lundo
D = Delegito	M = mardo
VD = Vicdelegito	Mk = merkredo
FD = Fakdelegito	Ĵ = ĵaŭdo
EG = Esperantista grupo	V = vendredo
EO = Esperanto-oficejo	S = sabato
Adr. = adreso	D = dimanĉo
Ejo = kunvenejo	

La tagoj kaj horoj de la grupo-kunvenoj estas notitaj inter krampoj. Ekzemple: (L 20.30) = kunveno lunde 20.30 h. La steletoj *** antaŭ teksto indikas pagitajn reklamojn de entreprenoj.

La Redakcio de la Jarlibro ne respondecas pri la tekstado de supraj detaloj, severe kopiitaj laŭ la informoj senditaj de la delegitoj.

REGULARO PRI LA SERVO DE INFORMPETO

Fundamenta Principo: Ĉiu membro rajtas uzi la servojn de la Delegitoj. La servoj mem estas senpagaj, sed la uzanto devas repagi la elspezojn de la Delegito.

Oni rajtas peti informojn pri: Komerco, industrio, trafiko, laboro, dungo, salajroj, turismo, instruado, junulaj, studentaj kaj virinaj aferoj, ktp. Pri fakdemandoj oni skribu rekte al la faka Delegito, se tia ekzistas.

Oni ne povas peti informojn pri: Komerca pago-kapablo, morala indeco de persono (konfidencaj informoj). Tamen, tiukaze la Delegito rajtas interrilati kun loka agentejo, kiu sin okupas pri tio.

La Delegito rajtas rifuzi servojn, kies plenumon li juĝas kontraŭa al sia honoro aŭ konscienco.

Plendoj: Informpeto ne respondita de la Delegito normale sep tagojn post ĝia ricevo, rajtigas la petinton plendi ĉe la Centra Oficejo, kiu enketos. Oni ankaŭ plendu okaze de malbone farita servo.

Atentu: 1. Skribu tre legeble, precipe la adreson. Tiu-ĉi estu skribata ĉiam en nacia lingvo kaj per latinaj literoj.

2. Skribu sur la adresflankon post la nomo, la titolon Delegito de I.E.L., tiel, ke se la Delegito forestas, la letero estu transdonata al la Vicdelegito.

3. Aldonu post la subskribo la kuponon pri servopeto kaj ripetu sur ĉiu sendaĵo la plenan adreson. Stampo kun adreso estas rekomendata.

4. Aldonu al la informpeto respondkuponon (eĉ se ĝi estas presaĵo).

5. Skribu ĉiam en Esperanto, la oficiala lingvo de I.E.L. La uzo de nacia lingvo nuligas la rajton al plendo.

6. Afranku sufiĉe la korespondaĵon.

7. Ne forgesu, ke la delegiteco estas honora ofico, kiun la Delegito akceptis por utili al Esperanto. Sekve faciligu lian taskon, ne ĝenante lin per petoj tute malgravaj.

Ĉi tiuj reguloj validas laŭsence ankaŭ por la rilatoj kun la Centra Oficejo de I.E.L.

Dum Vojaĝo: Ĉar la Delegito plej ofte ne disponas libere pri sia tempo, la membroj vojaĝantaj skribe informu la Delegiton pri sia vizito, almenaŭ 24 horojn antaŭe.

La Delegito havas la devon helpi la vojaĝanton. Sed oni memoru, ke ne estas la tasko de la Delegito atendi la fremdulojn en la stacidomoj, ilin akompani, fari komisionojn por ili ktp.

ACOROJ

Açores — Arquipelago dos Açores

Portugala. Konsistas el 9 insuloj kun sume 254,000 loĝantoj.

Angra do Heroísmo. 10,000.

D: J. F. d'Avila, instruisto, Str. Mousinho d'Albuquerque, 82.

Ponta Delgada (San Miguel). 35,000.

D: D-ro Lúcio S. de Miranda, matematika profesoro, Rua de Teófilo Braga, 12.

ALĜERIO

Algérie

Ain-Temouchent (Oran). 18,258.

D: C. D. Djian, studento, 29 Rue Pasteur.

Alger. 220,000.

EG: S-ro Marchal, 43 Rue Michelet.

Oran (Oran). 200,671.

D: F-ino G. Hélouin, instruistino, 13 Rue Béranger.

EG: êe la D.

Philippeville (Constantine). 65,000.

D: A. Arcamone, komercifcisto, 28 Rue d'Austerlitz.

EG: Adr.: êe la D., Ejo: Lernejo F. Buisson, Rue du 3ème Bataillon d'Afrique (Mk 18).

Tlemcen (Oran). 40,000.

D: Prof. J. Delor, Collège de Garçons.

ARGENTINO

Argentina — Republica Argentina

Peranto: Giordano Bruno López, San Pedrito 341,
Buenos Aires.

Buenos Aires. 2,388,645.

D: A. Villafranca Blanco, artvitrajisto, Str. Chacabuco 617.

VD: G. B. López, muzikinstruisto, San Pedrito, 341.

FD (Komerco): P. Doubek, mekanikisto, Bolivar 1590, 2o. piso.

EG: Argentina Esperanto-Asocio. Adr. kaj Ejo: Misiones 369 (ĉiutage 20-23).

EG: SAT-Amikara Rondo. Adr. kaj Ejo: Altolaguirre 2652.

Córdoba. 235,000.

D: M. Espinosa, elektro-inĝeniero, Str. Belgrano 539.

VD: J. Scolnik, kuracisto kaj profesoro de franca lingvo, str. Humberto I., No. 2160.

Guatimozin (Cordoba). 900.

D: I. Miličić Ivotov, komercisto, Guatimozin, F.C.C.A.

Ibarlucea (Santa Fé). 500.

D: F. De María, fervojofcisto, Ibarlucea, F.C.C.C.

La Plata (Buenos Aires). 200,000.

D: S. F. Querin, stenografisto, 17-1267-La Plata.

Perez Millan (Buenos Aires). 2,000.

D: I. M. Rodríguez, kompostisto, Perez Millan, F.C.C.C.

Pergamino (Buenos Aires). 30,000.

D: J. Abraham, komizo, Calle La Plata No. 71.

EG: "Nova Sento." Adr. kaj Ejo: Calle Azcuénaga 753. (D 16).

Rosario (Santa Fé). 450,000.

D: H. J. Ceretti, fervojo kaj radio-inĝeniero, Str. 9 de Julio 3301.

VD: R. Palleja, okulkuracisto, str. Entre Rios No. 583.

EG: Esperanta Asocio de Rosario. Adr: êe la D.

Ejo: strato Balcarce 450 (L. Mk. 20, S 17).

EG: Esperanto-Radio-Centro. Adr: êe la D. Ejo: Strato Balcarce 450 (M kaj V. 20).

Argentina Santa Fé. 140,448.

Aŭstralia *D:* S. Marani, mekanikisto, 25 de Mayo 3086, Santa Fé, F.C.C.A.

Viedma (Rio Negro).

D: P. Miglietta, Rivadavia 58.

AŬSTRALIO

Australia — Commonwealth of Australia

Brisbane (Queensland). 310,000.

D: O. H. Behncken, ŝtaticisto, c/o Taxation Office, George Street.

Leongatha (Victoria). 1,000.

D: W. Gray, farmisto, Whelan's R.O.

Melbourne (Victoria). 1,100,000.

D: R. R. Rawson, 169 Exhibition Street.

VD: F-ino V. Cox, stenografistino, "Las Rosas," 31 Albany Crescent, Surrey Hills, E.10.

Newcastle (New South Wales). 100,000.

D: F. V. Taylor, instruisto, Central School, Broadmeadow.

Perth (West Australia). 447,745.

D: E. A. Walker, brikmasonisto, Box 391, G.P.O.

Sydney (New South Wales). 1,260,000.

D: L. E. Pfahl, koloristo, 64 Brighton Street, Croydon.
EG: Adr.: F. McCullum, 35 Brisbane Street, Milson's Point. Ejo: 6 Innes Road, Milson's Point (V. 19).

Tamworth (New South Wales). 12,000.

D: R. Cleary, ŝaf-kulturisto, Box 157 P.O.

Wellington (New South Wales). 5,000.

D: T. L. Enderby, sukerajisto, 106 Lee Street.

Aŭstra

AŬSTRUJO

Österreich — Republik Österreich

Ĉefdelegito: G. Weber, Int. Esperanto-Muzeo, Neue Burg, Heldenplatz, Wien I.

Amstetten (N.Ö.). 10,000.

D: J. Biberauer, orgenisto kaj muzikinstruisto, Ybbsstrasse 28.

Bisamberg (N.Ö.). 2,000.

D: H. Steiner, kortega konsilisto, Bundesstrasse 154.

Blumau (N.Ö.). 152,400.

D: H. Buchgraber, stenotipisto, Teesdorferstrasse 4, Blumau ap. Felixdorf.

Ebelsberg (O.Ö.). 3,000.

D: J. Neuhofer, fervoj-eks-ĉefinspektoro, Ufer 24.

Edensee (O.Ö.). 10,000.

VD: Fr. Weisskirchner, dentisto, Marktgasse 1.

Edelschrott (Steiermark). 737.

D: M. Kreutzer, maŝinisto en elektra uzino, Edelschrott 21.

Gmünd (N.Ö.). 5,000.

D: H. Waldhäuser, librotenisto, Walterstrasse 171.

Gross Siegharts (N.Ö.). 2,232.

D: H. Nowotny, pordisto, Mühlgasse 60.

Innsbrück (Tirol). 70,000.

D: R. Kühbacher, bakisto, Mandelsbergerstrasse 3/II.
EG: Adr. kaj Ejo: "Goldener Hirsch" gastejo, Seilergasse 9. (M. 20).
EG: "Espero." Adr.: M. Stöckl, Mentlgasse 5. Ejo: Lebensmittelmagasin, Bruneckerstr. 4. (V. 20).

Klagenfurt (Kärnten) 29,671.

D: O. Müller, urba oficisto, St. Veiterstrasse 21.
EG: Aŭstria Esperanto-Asocio, loka grupo Klagenfurt. Adr.: P. Komposch, St. Veiterring 5. Ejo: Kafejo Lerch, Wienergasse 10 (Mk. 20).

Aŭstra *EG*: Karawanken (loka grupo de Aŭstria Esperanto-Federacio). Adr.: M. Laschitz, Schmelzhütte 12, St. Ruprecht b/Klagenfurt. Ejo.: gastejo Holzleger en Weidmannsdorf.

Köflach (Steiermark).

D: W. Rogler, Dr. Dollfusstr. 250.

Korneuburg (N.Ö.). 10,000.

D: H. Steiner, kortega konsilisto, Bundesstrasse 154, Bisamberg ĉe Korneuburg.

Krems a.d. Donau (N.Ö.). 15,000.

D: Fr. Stanke, komercisto, Gartenäugasse 2.

EG: Adr.: S-ro Reg. Rat. G. Kern, Schillerstrasse 20. Ejo.: Piaristenkonvikt (M. 20).

Linz a.d. Donau (O.Ö.). 110,000.

D: J. Mraz, fakinstruisto, Aubergstrasse 43/1.

VD: J. Kugler, poŝtĉefoficisto, Dr. Holz knechtstrasse 7/I. Esperanto servo (Tel. 18-56).

Mauerkirchen (O.Ö.). 1,300.

D: F-ino L. Koneberg, Heiligengeistr. 167.

Mödling (N.Ö.). 20,000.

D: D-ro A. Casari, profesoro, Achsenaugasse 16.

Ried i.I. (O.Ö.).

D: J. Hellwagner, Lubergasse 5.

Riedau (O.Ö.).

D: F-ino F. Wilflingseder, Riedau 89.

Rodaun bei Wien (N.Ö.). 2,500.

D: Fr. Braun, ŝtata ĉefadministristo emerita, Schubertgasse 1.

Salzburg. 60,000.

D: Rud. von Lidl, librotenisto, Schwarzstr. 1.

FD (Komerco): H. Hinterhuber, apotekisto, Linzergasse 7.

EG: Neŭtrala Grupo. Ejo: Gastejo Schwarz. Rössl, Bergstr. (Mk. 20).

EG: "Verda Stelo." Adr.: S-ro K. Flach, Gstätteng. 41.

EG: Studenta grupo de I.K.U.E. Adr.: Prof. D-ro Christianell, Borromaum, Parsch.

Schruns (Montafon, Vorarlberg). 2,000.

D: H. Neyer, komercisto, Schruns Nr. 40.

VD: F-ino M. Obexer, oficistino, Ausserlitzstr. 409.

Sigmundsherberg (N.Ö.). 1,000.

D: D-ro L. Scheuer, kuracisto.

VD: Ed. Bauer, fervoja oficisto, Sigmundsherberg Nr. 46.

EG: "Estonteco." Adr.: direktoro K. Wolf. Ejo: lernejo (M 18).

Stammersdorf bei Wien.

VD: S-ino Fr. Zeitler.

Steinakirchen a. Forst (N.Ö.). 800.

D: H. Zant, instruisto, Steinakirchen a. Forst 27.

Steyr (O.Ö.). 23,000.

D: H. Zeller, drogisto, Schlüsselhofgasse 25.

VD: F-ino E. Tillian, komercifocistino, Spitalskystr. 10.

EG: Supra Aŭstria Esperanto-Unuiĝo, Grupo Steyr. Adr.: Ferd. Wimmer, arkitekto, Wolfenstr. 1. Ejo: Gastejo R. Weinhäupl, Grünmarkt 3 (Mk. 20).

Strasswalchen (Salzburg). 3,500.

D: F-ino L. Ruhsmayr, poŝtoficistino.

VD: S. Jesinger, komercisto.

Taiskirchen i.I. (O.Ö.). 2,600.

D: F. Barth, jun. helplaboristo, Taiskirchen i.I. 53.

Unter-Tullnerbach (N.Ö.). 2,000.

D: J. Schamanek, burĝlerneja eksdirektoro.

Vöcklabruck (Atterseegebiet, O.Ö.). 3,900.

D: F-ino B. Fohler, Gmundnerstrasse 43.

EG: Libera esperanta rondo. Adr. kaj Ejo: ĉe la D. (V).

Aŭstra

Vöcklamarkt (O.Ö.). 4,000.

D: J. Brenneis, pensionano, Vöcklamarkt-Mörasing Nr. 9.
EG: Ejo: Gastejo al la "Bona Paŝtisto," Vöcklamarkt 39 (J 20).

Waidhofen a. Thaya (N.Ö.). 3,000.

D: S-ino P. Pirchan, Hauptplatz 99.

Wien. 1,850,000.

ĈD: (Aŭstrujo) G. Weber, fakinstruisto, Int. Esperanto-Muzeo, Neue Burg, Heldenplatz, Wien I.

VD: R. M. Frey, kalkuloficisto, Bechardgasse 14, Wien III.

VD: H. Kellner, direktoro de ĉeflernejo, Aichholz-gasse 15, Wien XII.

FD (Kontraŭalkohola kaj kontraŭtabaka movado): W. Mudrak, bankoficisto, Beatrixgasse 19-9, Wien III.

FD (Studentaj aferoj): M. R. Frey, studento, Alserstr. 63 A., Wien VIII.

EG: "Esperanto-Klubo." *Adr.:* Int. Esp. Muzeo, Neue Burg, Heldenplatz, Wien I. *Ejo:* I. Wallnerstrasse 6, ebena etaĝo dekstre 1-a pordo. (M 18.30).

EG: "Katolika Unuiĝo Esperantista" (K.U.E.). *Adr.:* L. Chiba, Schaumburgergasse 5-II-25, Wien IV. *Ejo:* I. Ebendorferstrasse 6, duon-etaĝo "Reichsbund d. kathol. Jugend" (Mk. 18).

EG: Esperanto-Societo: "Fideleco." *Adr.:* D-ro K. Klečka, kort. kons., Phillipsgasse 7-4, Wien XIII. *Ejo:* Kafejo "Michelbeuern," Kutschberg. 1., Wien XVIII. (M 15).

EG: "Danubio" Esperanto-Societo. *Adr.:* R. Čech, VII., Lindengasse 8-11. *Ejo:* Alserstr. 63a, Wien VIII., vestiblejo, dekstren (L 20).

EG: "Koloman Kalocsay." *Adr. kaj Ejo:* Löblichgasse 3, Wien IX. (Mk. 19.30).

Zell a.d. Pram (O.Ö.). 2,530.

D: F. Aichhorn, ĝardenisto.

Aŭstra

BELGUJO

Belga

Royaume de Belgique — Koninkrijk België

Peranto: G. Van den Bossche, 21 Willemsstraat, Antwerpen
Tel. 732.99. Poŝtĉeko 4109.91.

Aalst. 38,000.

D: R. de Kegel, industriisto, 58 Denderstr. Tel. 239.

Antwerpen—Anvers. 500,000.

D: G. Vermandere, komercisto, 15 Wetstraat. Tel. 536.42. Poŝtĉeko 585.79.

VD: A. Faes, 16 Marché aux Souliers. Tel. 267.21.

VD: M. Jaumotte, ĵurnalista, 44 Av. de Bruyn, Wilrijk-Antwerpen. Tel. 777.58. Poŝtĉeko 1700.10.

VD: W. de Schutter, ĵurnalista, 3 Smedenstraat, Wilrijk-Antwerpen. Tel. 780.62. Poŝtĉeko 1495.08.

EG: Reĝa Esperanto-Grupo "La Verda Stelo." *Adr.:* Schoenmarkt, 16, Marché aux Souliers. *Ejo:* Hotelo "Witte Leeuw," Frankrijklei, 4, Avenue de France. (S. 20.30).

EA: Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj. *Adr.:* S-ro J. van Deun-Jespers, Turnhoutsche baan 277, Borgerhout (Antverpeno).

Esperanto-Domo, Willemstraat 21. Sidejo de: Belga Ligo Esperantista, E.G. La Verda Stelo, K.S. Belga Esperanto-Instituto. Vendejo de ĉiuspecaj Esperantaj.

*** *Servo por Propagando kaj Turismo.* Oficejo por Fremdul-Trafiko, Leysstraat 9, Antwerpen. Tel. 201.03. Petu en Esperanto kaj naciaj lingvoj informojn, gvidilojn, prospektojn pri Antverpeno, la artrezorejo, la mondhaveno.

Renkontejo de la Esperantistoj

Antwerpen, Hotelo "Progrès" Restoracio, Kafejo.

61 Avenue de Keyser. Tel. 353.81 & 300.07.

Angulo de l'Avenue, vide al la Centra Stacidomo.
Estro: Mathias Thiel.

Moderna Komforto. Banoj. Centra hejtado. Varma kaj malvarma fluanta akvo en ĉiuj ĉambroj. Malvarmaj pladoj. Tagmanĝoj je fiksa prezo aŭ laŭ karto. Artois-bieroj.

Brugge-Bruges. 52,000.

D: F-ino Y. Thooris, 4 Rue de l'Outre. Tel. 320.86.

VD: K. de Coster, 9 St. Gilliskerkstraat.

EG: Bruĝa Grupo Esperantista, Reĝa Societo. Adr.: ĉe la D. Ejo: Hôtel du Cornet d'Or, 2 Place Simon Stévin. (M. 20).

Bruxelles-Brussel. 215,000. (Kun antaŭurboj 870,000).

D: D-ro P. Kempeneers, kuracisto, 19 Avenue de Montjoie, Uccle-Bruxelles. Tel. 44.53.00. Poŝtĉeko 131.11.

VD: Th. Kerremans, predikanto, 75 Vier Windenstraat, Molenbeek-Brussel.

FD (Blinduloj): S-ino F. Staes-Vandervoorde, 11 Avenue de la Liberté, Koekelberg-Bruxelles. Tel. 26.22.95.

FD (Filatelio): R. Brihay, privata sekr., 44a Rue de l'Orge, Ixelles-Bruxelles.

FD (Instruado): F-ino A. Jennen, lernejestrino, 72 Rue d'Albanie.

FD (Ĵurnalismo): R. Debel, 334 Rue Léopold 1er, Jette-Bruxelles.

FD (Komerco): Jos. Derks, entreprenisto, 226 Rue Rogier, Schaerbeek-Bruxelles.

FD (Konstruaĵoj): R. Picquet, arkitekto, 132 Rue Berkendael. Tel. 44.80.67. Ixelles.

FD (Kuracistoj): D-ro R. Maes-Dubois, kuracisto, 16 Rue Botanique, Bruxelles 3. Tel. 17.03.81.

FD (Teknika instruado): J. Alofs, Avenue de la Villégiature, 16 Woluwe St. Lambert, Bruxelles.

EG: Esperantista Brusela Grupo. Adr.: Nieuwenhovestr. 77, Uccle. Ejo: Hôtel Albert 1er, 10 Place Rogier (L.20).

EG: "Nia Estas La Estonto" (N.E.L.E.), sekcio de F.L.E. Adr.: 3 Pieter Van Humbeekstr., Brussel (West). Ejo: "Breughel" 37, Emiel Jacquainlaan (Ĵ 20).

Charleroi (Hainaut). 30,000.

D: V. Demoulin, telegrafisto, 40 Rue Bayet.

EG: Esperanto-sekcio B.L.E.—Cercle Polyglotte. Adr.: 81 Rue de la Villette, Marcinielle-Charleroi. Ejo: Salle de la Bourse. (Mk. 19).

Deurne (Antwerpen). 65,000.

D: O. E. M. Van Dyck, librotenisto, 55 Lundenstr., Deurne-C.

Ekeren (Antwerpen). 13,000.

D: F-ino D. Janszen, oficistino, 124 Kattenberg.

Gent-Gand (Oost-Vlaanderen). 250,000.

D (ĉefe pri tekniko kaj scienco): C. Vandevelde, inĝeniero, 230 Peter Benoitlaan, Gentbrugge (Poŝto Meirelbeke).

FD (Instruistaj aferoj): F-ino J. Nachtergaele, instruistino, 56 Puinstraat.

FD (Urbaj kaj komercaj aferoj): Fr. De Man, urba oficjestro, 131 Rabotlaan.

FD (Turismo): S-ino M. De Rijcke, 223 Kortrijkschestraat.

EG: Adr.: ĉe la D. Ejo: Lernejo Nova Strato Sankta Petro 45. (Mk. 19).

Hasselt (Limburg). 25,000.

D: P. Van Genechten, rentulo, 11 Place Léopold.

Huy (Liège). 14,000.

D: A. Landenne, kalkulisto, 2 Rue des Brasseurs.

Kortemark (West-Vlaanderen). 4,500.

D: A. Vanderper, agrikulturisto.

Kortrijk (West-Vlaanderen). 40,000.

D: R. Vanfleteren, juvelisto, 17 Mgr. De Haerlaan.

VD: A. Cognie, tajloro, 11 Moeskroenstraat.

EG: Sekcio de Flandra Ligo Esperantista. Adr.: ĉe la VD. Ejo: Kafejo "De Tuin," Yzerweglaan 5 (Mk 20).

La Louvière (Hainaut). 25,000.

D: A. Tassin, industriisto, 1 Rue St. Joseph.

VD: E. Jacques, 122 Rue Arthur Warocqué.

EG: Esperanta Grupo de la Centra Regiono. Adr.: V. Dauchot, sekretario, Rue G. Boël. Ejo: Brasserie Centrale, Drapeau Blanc (V 19.30).

